1354 I

P. KROPOTKIN

# ETIKO

I


MUZEUM ESPERANCKIE
ESPERANTO - MUZEO
SOPOT
ul./str. Łokietka Nr 5

Sennacieca Asocio Tutmonda

Paris - Leipzig - Moskvo

# ETIKO

Józef Toczyski
Gdańsk
ul. Krosno 29 m. 5
POLLANDO



P. KROPOTKIN

4297138

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

P. KROPOTKIN

# ETIKO

## I

ZORGIS PRI LA TRADUKO
EL RUSA LINGVO
I. S. A. B.



ELDONFAKO DE S. A. T.
COLMSTRASSE 1-III, LEIPZIG - 0-27

Esper 1354 I

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

Biblioteka Uniwersytecka KUL

1001147354

# AVERTO DE LA ELDONFAKO

En ĉi-tradukaĵo, la legantoj renkontos kelkajn neologismojn pri kies neceseco kaj taŭgeco ni mem ne volas juĝi nek respondi.

Por konformiĝi al deziresprimo de la V-a S. A. T.-Kongreso (Wien) ni intencis anstataŭigi tiujn neologismojn per terminoj pli konataj kaj ne malpli celtrafaj kaj precizaj. Tiucele ni provis interrilati kun la tradukintoj. Sed la tempo pasis kaj respondo al niaj leteroj ne alvenis. Konsiderante ke nelojala estus perforti la tradukaĵon sen speciala permeso de la aŭtoroj, ni do lasis senŝanĝe tiujn neologismojn, kaj ĉiun el ili signis per steleto (*). Fine de la libro, sur apartaj paĝoj, oni trovos klarigojn (sinonimojn, analogajn terminojn, ekzemplojn, k. t. p.) pri ĉiu neologismo.

Ni lasu al la estonteco la zorgon decidi ĉu la enkondukitaj neologismoj estas necesaj kaj trafe elektataj. Tiel farante ni obeos la saĝajn konsilojn de la aŭtoro de esperanto.

# ANTAŬPAROLO

Esperanto estas internacia lingvo precipe de la laboraj klasoj. Jen kial estas speciale necese eldonadi en Esperanto la librojn, kiuj celas plej larĝajn rondojn de loĝantaro kaj kiuj antaŭ ĉio rilatas al la problemoj de internacieco, de internacia komunikiĝo kaj unuiĝo, kiuj traktas pri idealoj de la evoluo de homa personeco, pri idealoj de la evoluo fizika, intelekta, emocia, estetika kaj sociala — t. e. etika — kaj vola.

Ekzistas verkistoj, kiuj faris precipe multe en tiu direkto. La plej eminentaj el ili estas : Tolstoj, Lavrov, Emerson, Ruskin, Thoreau kaj Kropotkin.

Tolstoj donis idealojn de la morala evoluo kaj per sia vivo, per siaj helaj, koloraj literaturaj figuroj, per siaj verkoj, konstatis la grandan socian signifon de la intelekte evoluinta personeco.

Lavrov prezentis al ni idealon de la intelekta evoluo kaj pruvis la grandegan socian signifon de la intelekte evoluinta, « kritike pensanta » personeco.

Ĉe Emerson ni trovas la idealon de la vola evoluo kaj pruvojn de la grandega socia signifo de la personeco kun forte disvolvita volo.

Ruskin donis idealojn de la estetika evoluo kaj montris grandan socian signifon de la estetiko, kaj ankaŭ per sia vivo kaj agado montris eblecon kaj signifon de la plej intima interligo kaj de la plej intima interefiko inter la estetika kaj etika evoluo.

Thoreau donis brilan ekzemplon de la ideala kaj penetranta amo al la naturo kune kun profundega kompreno de la naturo.

Sed precipe larĝaj idealoj por la evoluo de la homa personeco estas donitaj de Kropotkin : — la idealo de la fizika disvolviĝo, realigata en neceseco de fizika laboro por ĉiu homo, la idealo de ĉiuflanka intelekta evoluo, kies ekzemplo estas mem Kropotkin. Tuŝinta en siaj verkoj preskaŭ ĉiujn fakojn de homaj scioj, la idealojn de morala kaj socia evoluo, la idealojn de la socivivo, kiu disponigas plenan liberecon por la elmontriĝo de la persono kaj de ĝia vola agado, la idealojn de la socivivo, bazita sur interhelpo kaj kooperado, sur la sento de solidareco, sur profunda respekto al la homa personeco, kaj sur la rekono de ĝia plej alta valoro kaj plena netuŝebleco.

Jen kial estas precipe necesa la esperanta eldono de Kropotkin-verkoj kaj antaŭ ĉio de lia *Etiko;* necesa ĝuste nun, en la periodo de retaksado de ĉiuj valoraĵoj, en la periodo de ruinigo de la malnova mondrigardo, de la malnova sociordo, kaj konstruiĝo de la novaj mondrigardo kaj sociordo. Por krei novan mondkoncepton kaj novan sociordon estas necesaj science argumentitaj etikaj konstrueroj, kiel gvidaj steloj, kiel fontoj de la inspiro. Kaj ĝuste tielaj estas la etikaj konstruaĵoj de Kropotkin, forte argumentitaj per la faktaro de la biologio kaj sociologio.

N. KABANOV.

*Novembro 1924, Moskvo.*

# ETIKO

## ĈAPITRO UNUA

### La moderna bezono konstrui fundamenton de la moralo (1)

*La sukcesoj de la scienco kaj filozofio dum la lasta jarcento. — La progreso de l' moderna tekniko. — La kreeblo de la etiko bazanta sur la natur-sciencoj. — La modernaj moralteorioj. — La ĉefa manko de l' modernaj etiksistemoj. — La teorio de la porekzista batalo; ĝia malĝusta interpretado. — La interhelpo en la naturo. — La naturo ne estas amorala*. — La unuaj instruoj pri moralo estas akirataj de la homo el observado de l' naturo* (2).

Kiam ni revuas la grandozajn* sukcesojn de l' natursciencoj en la daŭro de la 19-a jarcento kaj vidas ti-kion ili promesas al ni en sia plua evoluo, ni ne povas ne konscii, ke antaŭ la homaro aperas nova periodo de ĝia

(1) Tiu-ĉi ĉapitro unue aperis anglalingve en la revuo *Nineteenth Century*, en aŭgusta numero de la jaro 1904.

(2) La resumoj de l' ĉapitroj estas faritaj de K-do N. Lebedev.

vivo, aŭ almenaŭ ke ĝi tenas en siaj manoj ĉiujn rimedojn por aperigi tiun novan epokon.

Dum la lasta jarcento, sub la nomo de l' scienco pri homo (antropologio), la scienco pri primitivaj soci-instituaĵoj (prahistoria etnologio) kaj la historio de religioj, — estas kreitaj novaj branĉoj de la kono, kiuj malkovras al ni absolute novan koncepton pri la tuta evoluprocedo de l' homaro. Aliflanke, danke al la eltrovoj en la sfero de fiziko koncerne strukturon de astroj kaj de la materio ĝenerale, kreiĝis nova kompreno pri la vivo de l' universo. Samtempe la antaŭaj doktrinoj pri origino de la vivo, pri la situo* de la homo en la kosmo, pri esenco de la racio, estis radikale ŝanĝitaj rezulte de rapida evoluo de l' vivscienco (biologio), la apero de l' teorio pri disvolvo (evoluteorio) kaj ankaŭ dank' al la progreso de l' scienco pri psika vivo (psikologio) de la homo kaj de l' animaloj*.

Kiam oni diras, ke en ĉiuj siaj fakoj (eble escepte la astronomia) la sciencoj pli progresis dum la 19-a jarcento ol dum ajnaj pasintaj tri aŭ kvar jarcentoj, — tio ne estas ankoraŭ sufiĉa. Necesas retroveni je pli ol du jarmiloj en la epoko de la disfloro de filozofio en antikva Grekio por trovi la saman vekiĝon de la homa penso. Sed eĉ tiu ĉi komparo estus neĝusta, ĉar tiutempe la homo ne jam atingis tian regadon super tekniko, kian ni vidas nun ; kaj ĝuste la evoluo de l' tekniko ebligas al la homo liberiĝi de la sklavlaboro.

Samtempe evoluis en la moderna homaro aroge-kuraĝa inventospirito, kiun envivigis la ĵusaj sukcesoj de l' sciencoj. La rapide sinsekvintaj inventoj tiagrade kreskigis la produktivon de l' homa laboro, ke por modernaj civilizitaj popoloj fine ekestis atingebla tia ĝenerala bonstato, pri kiu oni eĉ ne povis revi dum la antikvo, mezepoko, aŭ la unua duono de la 19-a jarcento. Unuafoje la homaro povas aserti, ke ĝia povo kontentigi ĉiujn siajn bezonojn superis la mem bezonojn, ke nun ne plu necesas ŝarĝi la jugon de l' mizero kaj humiliĝo sur tutaj homklasoj por bonstatigi la malmultajn kaj faciligi al ili pluan spiritevoluon. La ĝenerala kontento neniun ŝarĝanta per la premanta kaj senpersoneciga laboro fariĝas nun ebla, kaj la homaro povas fine rekonstrui sian tutan soci-vivon sur la principoj de l' justo.

Ĉu sufiĉos al la modernaj civilizitaj popoloj la konstrua socikreivo kaj kuraĝo por utiligi la konkirojn de la homa penso al la ĝenerala bono? Malfacile estas antaŭdiri. Sed la solo estas senduba : la ĵusa disfloro de l' scienco jam kreis la spiritan atmosferon, necesan por funkciigi konformajn fortojn kaj ĝi jam donis al ni necesajn konojn por efektivigo de tiu granda tasko.

Retroveninte al la sama filozofio de l' naturo, malatentita depost la antikva Grekio ĝis kiam Bacon vekis la sciencan esploron el ĝia longa dormetado, la moderna scienco konstruis

la fundamenton de l' kosmogonio, liberigita de supernaturaj hipotezoj kaj de la metafizika « mitologio de la pensoj », — kosmogonio tiom granda, poezia kaj inspira kaj tiom penetrita de la spirito libereca, ke ĝi certe kapablas ekvivigi novajn fortojn. La homo ne plu bezonas meti la vestojn de l' superstiĉo sur siajn idealojn de la morala belo kaj sur siajn ideojn pri la juste konstruita socio ; li plu ne bezonas atendi la socirekonstruon flanke de la Plejsaĝulo. Li povas prunti siajn idealojn el la naturo, kaj el la studo de ĝia vivo li povas ĉerpi la bezonatajn fortojn.

Unu el la ĉefaj akiraĵoj de la moderna scienco estis, ke ĝi pruvis la *nedetrueblon de la energio,* malgraŭ ĉiuj eblaj modifoj. Por la fizikistoj kaj matematistoj* tiu penso estis riĉa fonto de diverspecaj malkovroj ; esence per ĝi estas penetritaj ĉiuj modernaj esploroj. Sed ankaŭ la filozofia signifo de tiu eltrovo estas egale grava. Ĝi kutimigas la homon kompreni la vivon de l' universo kiel seninterrompan, senfinan ĉenon de l' transformiĝoj de la energio : mekanika movo povas iĝi sono, varmo, lumo, elektro ; kaj inverse, ĉiu el tiuj energispecoj aparte estas transformebla en aliujn. Kaj inter ĉiuj ĉi-transformiĝoj la estiĝo de nia planedo, la laŭgrada evoluo de ĝia vivo, ĝia fina malkomponiĝo estonta kaj retroveno al la granda kosmo, ĝia absorbiĝo en la universo estas nur senfine etaj fenomenoj — simpla minuteto en la vivo de l' astromondoj.

La samo okazas ankaŭ ĉe la studo de l' organa vivo. La esploroj faritaj en la vasta interregiono, kiu apartigas la neorganan mondon de la organa kaj kie la plej simplaj vivoprocedoj ĉe malsuperaj fungoj estas apenaŭ distingeblaj kaj tamen nesufiĉe de la kemia atommovado, konstante okazanta en la komplikaj korpoj, — ĉi-esploroj forigis de la vivofenomenoj ilian misteran, mistikan karakteron. Samtempe niaj vivkonceptoj tiom vastiĝis, ke ni kutimas nun konsideri la amasiĝon de materio en la universo — ĉu en solida, ĉu fluida, ĉu gasa formo (al la lasta apartenas nebulozoj en la stela mondo) kiel ion vivantan kaj pasanta la samajn ciklojn de l' evoluo kaj malkomponiĝo, kiel tiuj de la vivestaĵoj. Plue retroveninte al la pensoj iam ĝermintaj en la antikva Grekio, la moderna scienco, paŝo post paŝo, finobservis la mirindan evoluon de l' vivestaĵoj de la protozooj, apenaŭ nomindaj « organismoj », ĝis la senfina diverso de l' vivestaĵoj, kiuj nun loĝigas nian planedon kaj belkronas ĝin. Kaj fine kutimiginte nin al la penso, ke ĉiu vivestaĵo prezentas grandegmezure la produkton de l' medio, en kiu ĝi vivas, la biologio solvis unu el la plej grandaj enigmoj de la naturo : ĝi eksplikis* la adaptiĝon al la vivkondiĉoj, renkontataj de ni ĉiupaŝe.

*Eĉ en la plej enigma vivelmontro,* en la penso- kaj sento-sfero, kie la homa intelekto perceptas la procedojn mem, per kies helpo ĝi fiksas la impresojn ricevatajn elekstere, eĉ

en tiu malplej esplorita sfero, la homo sukcesis ĵeti la rigardon en la mekanismon de la penso per esplormetodoj uzataj en la fiziologio.

Fine en la vasta regiono de homaj instituoj*, moroj kaj leĝoj, superstiĉoj, kredoj kaj idealoj estis ĵetita tia brila lumo de la antropologiaj skoloj de historio, leĝoscienco kaj socia ekonomio, ke oni povas diri kun certo, ke la celado al « la pleja feliĉo por la plejo da homoj » jam ne plu estas revo, nek utopio. *Ĝi estas ebla.* Kaj plie estas ankaŭ pruvita, ke la bonstato kaj feliĉo ĉu de la tuta popolo ĉu de aparta klaso ne povas esti bazitaj eĉ provizore sur la premado super aliaj klasoj, nacioj aŭ rasoj.

La moderna scienco atingis tiamaniere duoblan celon. Unuflanke ĝi donis al la homo tre valoran lecionon de modesto. Ĝi instruas al la homo sin konsideri nur kiel senfine eta universo. Ĝi elpuŝis la homon el malvasta egoista apartiĝo kaj forigis lian memfidon, pro kiu li konsideris sin la centro de l' universo kaj speciala zorgato de l' kreinto. Ĝi komprenigas al la homo, ke ekster la granda Tuto nia « Mio » estas nulo, ke « Mio » ne povas eĉ sin defendi sen iu « Vio ». Kaj aliflanke la scienco samtempe montris kiel potenca estas la homaro en sia progresanta evoluo, se ĝi scipove utiligas la senliman energion de l' Naturo.

Tiamaniere la scienco kaj la filozofio hav-

igis al ni materian forton, samkiel pensliberon, ambaŭ necesaj por estigi en la vivo agantojn, kiuj kapablus konduki la homaron sur la nova vojo de l' ĝenerala progreso. Ekzistas tamen unu sciencobranĉo, kiu restas post aliuj. Tiu branĉo estas la etiko, — la doktrino pri la fundamento de l' moralo.

La doktrino, konforma al moderna stato de l' scienco kaj kapabla utiligi ties konkirojn por konstrui fundamenton de l' moralo sur larĝa filozofia bazo, la doktrinon, kiu donus al la civilizitaj popoloj la inspiran forton por la granda venonta rekonstruo, — tia doktrino ne estas ankoraŭ aperinta. Kaj tamen ĝia bezono estas ĉiuloke kaj ĉiumomente sentata. Novan realan moralsciencon, same liberigitan de l' religia dogmismo, superstiĉoj kaj metafizika mitologio, kiel jam estas liberiĝinta la moderna naturscienca filozofio kaj samtempe inspiritan de sublimaj* emocioj kaj helaj esperoj, sugestataj al ni per la moderna kono pri homo kaj lia historio — jen kion insiste postulas la homaro.

Nenia dubo ekzistas pri la eblesto de tia scienco. Se la naturesplorado havigis al ni la principojn de l' filozofio, kiu ampleksas la vivon de l' tuta universo, la evoluon de vivestaĵoj sur la tero, la leĝojn de l' psika vivo kaj la evoluon de l' socioj, — do la sama esplorado devas al ni havigi naturan esplikon* pri la fontoj de morala sento. Ĝi devas montri al ni kie ripozas la fortoj, kapablaj levadi

la moralsenton ĝis la ĉiam pli granda alteco kaj pureco. Se la meditado al la universo kaj intima konateco kun la naturo povis naski altan inspiron ĉe la grandaj naturistoj kaj poetoj de la 20-a jarcento, se la penetrado en la profundon de l' Naturo povis plivigligi la pulsadon de la vivo ĉe Gœthe, Byron, Shelly, Lermontov dum observado al muĝanta ventego, al kvieta kaj majesta montoĉeno aŭ malluma arbaro kun ĝiaj loĝantoj, — kial do pli profunda penetro en la vivon de l' homo kaj de lia sorto ne povus egale inspiri poeton? Kaj kiam la poeto trovas ĝustan esprimon por sia sento de komuneco al la kosmo kaj sia unueco kun la tuta homaro, li ekkapablas inspiri milionojn da homoj per sia impulso. Li sentigas en ili la plej bonajn fortojn, li vekas en ili la deziron iĝi ankoraŭ pli bonaj. Li vekas en homoj ĝuste tiun ekstazon, kiun oni antaŭe konsideris kiel religian atribuaĵon.— Kaj efektive, kion prezentas la psalmoj, en kiuj multaj vidas la plej altan esprimon de religi-emocio, aŭ la plej poeziaj partoj de la sanktaj libroj de l' oriento? Ja nur provojn esprimi ekstazon de la homo dum la meditado al la universo, ja nur vekiĝon en li de la sento pri poezio de l' naturo.

La bezono pri realisma etiko estis sentata jam dum la unuaj jaroj de l' scienca Renaskiĝo, kiam konstruante la fundamenton por renaskiĝo de l' sciencoj Bacon skizis ankaŭ la elementajn trajtojn de la empira scienca etiko,

malpli detale ol tion faris liaj adeptoj sed kun tia larĝa ĝeneraligo, kiun atingis nur nemultaj kaj kiun oni malmulte superis eĉ niatempe.

La plej bonaj pensistoj de la 17-a jarcento daŭrigis labori samdirekte, penante verki etiksistemojn sendependaj de la religiaj ordonoj. *Hobbes, Cudworth, Locke, Shaftesbury, Paley, Hutcheson, Hume* kaj *A. Smith* kuraĝe laboris en Anglio por solvi tiun problemon, ĝin ĉiuflanke studante. Ili indikis naturfontojn de l' morala sento kaj en siaj difinoj de moralaj taskoj ili plejparte (escepte Paley) sin bazis same sur la grundo de l' pozitiva kono. Diversavoje ili penadis kunigi « intelektismon » (raciecon) kaj « utilismon » (teorio pri utileco) de Locke kun « moralsento » kaj « sento de Belo » de Hutcheson, kun « teorio de asociado » de Hartley kaj kun etiko de la sento de Shaftesbury. Traktante la celojn de l' etiko kelkiuj el ili jam parolis pri tiu « harmonio » inter memamo kaj zorgo pri siaj familianoj, kiu ekludis tian rolon en la etikteorioj de la 19-a jarcento; kaj ili ĝin traktis interlige kun la « aspiro al laŭdo » de Hutcheson kaj kun « simpatio » de Hume kaj A. Smith. Fine, se ili estis en embaraso doni racian eksplikon* al la sento de l' devo, tiam ili sin turnis ĉu al la influo de religio en prahistoria epoko, ĉu al la « denaska sento », ĉu al la pli-malpli modifita teorio de Hobbes, kiu opiniis, ke la leĝoj

UNIWERSYTECKA KUL BIBLIOTEKA

kaŭzas socion kaj ke primitiva sovaĝulo estas malsociema animalo.

La francaj materialistoj kaj enciklopediistoj diskutis pri la problemo samdirekte iom pli akcentante je memamo kaj penante akordigi du malajn inklinojn de l' homa naturo: — mallarĝe personecan kaj sociecan. Ili pruvis, ke socia vivo nepre akcelas la evoluon de la plej bonaj ecoj de l' homa naturo. *Rousseau* kun sia racia religio estis la liganta ĉenero inter materialistoj kaj kreduloj. Kuraĝe traktante sociajn problemojn de la epoko, li influis multe pli ol aliuj. Aliflanke eĉ ekstremaj idealistoj, kiel *Descartes* kaj lia adepto-panteisto *Spinoza* kaj eĉ certatempe la transcenda idealisto *Kant,* ne plene kredis ke moralaj principoj devenas el revelo*. Tial ili provis meti sub la etikon pli larĝan bazon ne tamen rifuzante je la ideo pri superhoma origino de morala leĝo.

Kun ankoraŭ pli granda forto, la sama celado trovi la realan bazon por etiko aperas en la 19-a jarcento, kiam tuta vico da bone pripensitaj etiksistemoj estis kreita sur bazo de l' memamo (egoismo), aŭ sur la « homaramo » (Auguste Comte, Littré, k. m. a. iliaj adeptoj, malpli konataj) sur la « simpatio » kaj « intelekta identigo de sia personeco kun la homaro » (Schopenhauer), sur la utilismo, t. e. « utileco » (Bentham, Mill) kaj fine sur la evoluteorio (Darwin, Spencer, Guyau). Ni jam ne parolas pri sistemoj kiuj neas la moralon.

Devenantaj de *Larochefoucauld* kaj *Mandeville*, ili estis evoluigitaj en 19-a jarcento de Nietzsche kaj de kelkaliuj, kiuj pledis por la suverenaj rajtoj de l' persono, sed samtempe celis levi la moralnivelon per siaj akraj atakoj kontraŭ la duonecaj moralkonceptoj de l' moderno.

Du etikteorioj, *pozitivismo* de *Comte* kaj *utilismo* de *Bentham*, profunde influis, kiel estas konate, sur la pensadon de nia epoko. El la ambaŭ tiu de Comte metis sian stampon sur ĉiuj sciencesploroj, per kiuj fieras la moderna scienco. Ili donas ankaŭ komencon al la tuta grupo de derivitaj sistemoj ; kaj preskaŭ ĉiuj distingindaj modernaj esploristoj de psikologio, evoluteorio kaj antropologio riĉigis la literaturon pri etiko per pli-malpli memstaraj kaj altvaloraj studoj. Sufiĉas se ni mencios el ili *Feuerbach*, *Bain*, *Leslie Stephen*, *Proudhon*, *Wundt*, *Sidgweek*, *M. Guyau*, *Jodl* ne parolante pri multaj aliuj, malpli konataj. Fine ni menciu ankaŭ fondiĝon de multaj etik-asocioj por vasta propagando de moraldoktrinoj, kiuj ne estas bazitaj sur la religio. Samtempe estiĝis, en la unua duono de la 19-a jarcento, grandoza* movado, laŭekstere ekonomia kaj esence profunde etika sub la nomoj : « fourrier'ismo », « owen'ismo », « saint-simon'ismo » kaj, iom poste, « internacia socialismo » kaj « anarkismo ». Ĉi-movado, ĉiam pli kaj pli kreskanta, celas kun helpo de ĉiulandaj laboristoj ne nur revizi

la ĉefajn bazojn de ĉiuj moralkonceptoj, sed ankaŭ rekonstrui la vivon tiel, ke ĝi malfermu novan paĝon por moralkonceptoj de la homaro.

Povus ŝajni, ke post tiom da raciismaj etiksistemoj, kreitaj dum lastaj du jarcentoj, ĉio enportata en tiun regionon estas aŭ ripeto de la jam dirito, aŭ provo sintezi diversajn partojn de la antaŭe prilaboritaj sistemoj. Sed jam la fakto, ke la ĉefaj sistemoj de la 19-a jarcento — pozitivismo de Comte, teorio de utileco (utilismo) de Bentham kaj Mill kaj altruista evoluismo (t. e. teorio pri socia evoluado de la moralo) proponita de Darwin, Spencer kaj Guyau, — ĉiu aldonis ion esencan al teorioj de antaŭuloj, — jam sole tiu fakto pruvas, ke la etikproblemo ne estas ankoraŭ elĉerpita.

Se ni prenos sole la tri lastajn teoriojn, ni konstatos, ke Spencer bedaŭre ne utiligis ĉiujn faktojn, kiuj troviĝas en la rimarkinda prietika skizo de Darwin, en lia *Origino de homo,* dume Guyau enkondukis en la esploron de moralaj impulsoj tian altgrade gravan elementon, kian reprezentas superfluo de energio en sentado, pensado kaj volado kaj kiu ne jam estis atentata de antaŭaj esploristoj.

La fakto mem, ke ĉiu nova sistemo povis enporti novan kaj gravan elementon jam pruvas, ke la scienco pri moralimpulsoj estas ankoraŭ tre malmulte formiĝinta. Efektive,

oni rajtas diri, ke tio eĉ neniam okazos, ĉar novaj aspiroj kaj novaj fortoj, kreotaj de novaj vivkondiĉoj ĉiam restos konsiderendaj laŭmezure de la plua progresado de la homaro.

Tamen estas sendube, ke ne unu el etik-sistemoj, kreitaj en la 19-a jarcento povis kontentigi eĉ la kleran parton de la civilizitaj popoloj.

Flankenlasante multnombrajn filozofiajn studojn, en kiuj la malkontentigo de moderna etiko estas klare esprimita [1], ni trovas plej bonan pruvon en certa retroveno al idealismo, kion ni povas konstati ĉe la fino de la 19-a jarcento. Manko de poezia inspiro en la pozitivismo de Littré kaj H. Spencer kaj ilia nekapablo doni kontentigan respondon al la grandaj problemoj de l' moderno ; la malvasto de kelkaj konceptoj, per kiu distingiĝas la ĉefa filozofo de la evoluteorio — Spencer ; plue, la fakto, ke la plipostaj pozitivistoj malakceptas la humanajn teoriojn de la francaj enciklopediistoj, — ĉio ĉi akcelis fortan reakcion profite al iu nova mistike religia idealismo. Kiel tute juste diras Fouillée, la unuflanka interpretado de l' darvinismo donita al ĝi de la ĉefaj reprezentantoj de l' evoluteorio (kaj dum unuaj dek du jaroj post apero de

---

[1] Sufiĉas citi tie ĉi kritikajn kaj historiajn verkojn de Paulsen, Wundt, Leslie Stephen, Lichtenberger, Fouillée, De Roberti kaj de multaj aliaj.

*Origino de specoj* mem Darwin ne protestis eĉ per unu vorto kontraŭ tia interpreto) sendube precipe fortigis la kontraŭulojn de la pernatura eksplikado* pri la morala esenco de la homo, t. n. « naturismo ».

Komencinte per kontraŭdiroj al kelkaj eraroj de la naturscienca filozofio, la kritiko baldaŭ ekatakis ankaŭ la pozitivan konon ĝenerale. Oni komencis solene proklami la « bankroton de l' scienco ».

Tamen al la scienculoj estas konate, ke ĉiu ekzakta scienco ĉiam progresas de unu « proksimiĝo » al aliu, t. e. de unua proksimuma ekspliko* pri tuta vico de fenomenoj al la sekvanta, pli ekzakta alveriĝo. Sed tiun simplan veron tute ne deziras scii la « kreduloj » kaj ĝenerale la mistikamantoj. Kiam ili ekscias, ke en la unua proksimiĝo troviĝas neĝustaĵoj, ili rapidas deklari pri « bankroto de l' scienco » ĝenerale. Dume la sciencistoj konas, ke la plej ekzaktaj sciencoj, kiel ekzemple astronomia, progresas ĝuste per tia vojo de pograda alveriĝo. Estis granda eltrovo — ekscii, ke ĉiuj planedoj turniĝas ĉirkaŭ la suno, kaj la unua « alveriĝo » estis supozi, ke ili rondiras ĉirkaŭ la suno. Poste oni trovis, ke ili moviĝas laŭ iom oblongaj cirkloj, t. e. elipsoj. Tio estis la dua alveriĝo. Ĝin sekvis tria alveriĝo, kiam ni eksciis, ke ĉiuj planedoj turniĝas laŭ ondoformaj linioj, konstante devias ti-aliun flankon for de l' elipso kaj neniam pasas precize la saman vojon. Fine nun, kiam

ni scias, ke la suno ne estas senmova, sed mem kuras en la spaco, — la astronomoj penas difini la karakteron kaj la situon de la spiraloj laŭ kiuj kuras la planedoj, ĉiam formante iom ondoformajn elipsojn ĉirkaŭ la suno.

La samaj transiroj de unu proksimuma solvo de problemoj al sekvanta, pli preciza solvo, okazas en ĉiuj sciencoj. Tiel, ekzemple, la natursciencoj nun revizas « unuajn alveriĝojn » rilate al vivo, psika agado, evoluo de vegetalaj kaj animalaj formoj, strukturoj de l' materio, k. t. p., kiuj estis atingitaj dum la epoko de la grandaj eltrovoj 1856-62 jaroj. Tiujn alveriĝojn estas necese revizi por atingi la sekvantan « alveriĝon », t. e. pluajn pli profundajn ĝeneralaĵojn. Do jen tiun revizadon (reekzamenadon) la profanuloj uzas por kredigi al aliuj, ankaŭ malpli kompetentaj, ke la scienco ĝenerale bankrotis en sia penado ekspliki * la grandajn problemojn de la kosmo.

Nuntempe oni tre ofte deziras anstataŭigi la sciencon per la « intuo », t. e. per simpla konjektado kaj blinda kredo. Multaj verkistoj retrovenante komence al Kant, poste al Schelling kaj eĉ Lotze, predikas nun « indeterminismon » (maldeterminismo), « spiritualismon », « apriorismon », « personecan idealismon », « intuon », k. t. p. kaj pruvas, ke la kredo kaj ne la scienco prezentas la forton de la vera kono. Tamen ankaŭ tio ne sufiĉis. Nun modas mistikismo de Sankta Bernardo kaj de nov-platonanoj. Aperas speciale postulo pri

« simbolismo », pri « nepercepteblo ». Estas eĉ renaskita la kredo al mezepoka Satano [1].

Estas vere, ke nek unu el tiuj novaj tendencoj atingis vastan kaj profundan influon. Sed oni devas konfesi, ke la publika opinio hezitas inter du ekstremoj : senespera celado retroveni al malkleraj mezepokaj kredoj kun ĉiuj iliaj superstiĉoj, idoladorado kaj eĉ la kredo al sorĉarto kaj aliflanke la glorado de « amoralismo » (senmoraleco) kaj respektego al « superaj karakteroj », nun nomataj « superhomoj », aŭ « superaj individuiĝoj » (supera esprimo de personeco), kiun Eŭropo jam spertis foje en la epoko de Byron'ismo kaj romantismo.

Kaj tial estas aparte necesa nun esplori, — ĉu efektive estas bazita la dubo koncerne la aŭtoritaton de la scienco en moralaj problemoj kaj ĉu la scienco ne liveras al ni la bazprincipojn de l' etiko, kiuj estante ĝuste esprimitaj povas respondi al modernaj postuloj.

La malgranda sukceso de la etiksistemoj, aperintaj dum la lastaj jarcentoj pruvas, ke la homon ne povas kontentigi sole la naturscienca ekspliko * pri la origino de morala sento. Li

---

(1) Komp. *Le mouvement idéaliste et la réaction contre la science,* par A. Fouillée, 2 eld. (« La idealismo movado kaj la reakcio kontraŭ la scienco ») ankaŭ *Le devoir présent,* par Paul Desjardins (La nuntempa devo), kiu havis 5 eldonojn dum mallonga tempo k. m. a.

postulas pravigon de tiu sento. En moral-problemoj la homoj ne volas sin limigi per nura ekspliko* pri fontoj de morala sento kaj per la indiko — kiel certaj kaŭzoj akcelis ĝian kreskon kaj subtiligon. Tio povas kontentigi ĉe la studo pri evoluhistorio de iu-ajn floro. Sed tie-ĉi ĝi ne sufiĉas. La homoj deziras trovi fundkaŭzon por kompreni la senton mem de la moralo. Kien ĝi nin kondukas? Ĉu al dezirindaj sekvoj, aŭ, kiel asertas kelkiuj, al malpliiĝo de la forto kaj de la kreivo en la homgento kaj finfine al ĝia degeneriĝo.

Se porekzista batalo kaj ekstermado de la fizike malplifortaj estas naturleĝo, nepre necesa por la progreso, tiam ĉu ne prezentas paca « industria stato », promesita al ni de Comte kaj Spencer, jam ekdegeneron de la homgento, — kiel tion asertas tiom emfaze Nietzsche. Kaj se tia rezulto estas nedezirinda, — ĉu ne devas ni efektive entrepreni la retaksadon de moralvaloroj, kiuj celas aŭ malakrigi la bataladon, aŭ almenaŭ malplidolorigi ĝin.

La ĉefan taskon de l' moderna realisma etiko prezentas (laŭ rimarkigo de Wundt en lia « Etiko ») antaŭ ĉio la difino de l' *morala c-e-l-o*, kiun ni aspiras. Sed tiu celo, aŭ celoj, kiom ajn idealaj kaj malproksimaj ili estu, devas tamen aparteni al la mondo reala.

La celo de l' moralo ne povas esti io « transcenda », t.e. superreala, kiel tion deziras kelkiuj idealistoj. Ĝi devas esti reala. Moralan

kontentiĝon ni devas trovi en la vivo, sed ne en iu eksterviva stato.

Kiam Darwin elpaŝis kun sia teorio pri « porekzista batalo » kaj prezentis tiun batalon, kiel ĉefan motoron de la progresiva evoluado, li rediskutigis per tio malnovan problemon pri morala aŭ senmorala aspekto de l' naturo. La origino de l' ideoj pri bono kaj malbono, kiu okupis la penson depost la tempo de Zend-Avesta, ree ekdiskutiĝis kun nova energio kaj kun pli granda profundo ol kiam-ajn. Darwin'-anoj prezentis la naturon kiel grandegan batalejon, kiu vidigus sole ekstermadon den * la malfortaj de la pli fortaj, pli lertaj, pli ruzaj. Rezultis, ke el la naturo la homo povis lerni nur malbonon.

Tiuj opinioj, kiel konate larĝe vastiĝis. Sed se ili estus ĝustaj, la filozofo-evoluisto estus solvonta profundan kontraŭdiron, portitan de li mem en sian filozofion. Li certe ne povas nei, ke la homo havas pli superan ideon pri « bono » kaj ke la kredo pri pograda venko de la bono super la malbono profunde penetris la homan naturon. Sed tiuokaze li devas ekspliki *, — de kie aperis tiu koncepto pri bono? De kie venas tiu kredo al la progreso? Li ne povas trankviligi sin per la epikura kredo, kiun poeto Tennyson esprimis per la vortoj : « kiel ajn el la malbono fine rezultos la bono ». Li ne povas prezenti al si la naturon « sangokovrita » — « red in tooth and claw » (kun ruĝaj dentoj kaj ungegoj), kiel skribis

la sama Tennyson kaj la darwinano Huxley, — ĉiuloke batalanta kontraŭ la elementoj de la bono, — la naturon, kiu per si mem neas la bonon en ĉiu vivestaĵo, ĉar tiam li ne rajtas aserti, ke « finfine » la bono tamen triumfos. Li devas almenaŭ diri, kiel li eksplikas* tiun kontraŭdiron.

Se la scienculo konfesas, ke la « sola instruo, kiun la homo povas eltiri de la naturo estas tiu pri la malbono », tiam li devas konsenti, ke ekzistas iu alia influo, eksternatura, eĉ supernatura, — kiu sugestas al la homo la ideon pri la « suverena bono » kaj kondukas la homaran evoluon al supera celo. Kaj tiamaniere li nuligos sian penon ekspliki* la evoluon de la homaro per agado de nuraj naturfortoj (¹).

Fakte la stato de la evoluteorio tute ne estas tiom malstabila* kaj ĝi tute ne venigas al tiaj kontraŭdiroj, kiajn trafis Huxley, ĉar la studo de la naturo neniel pravigas la suprenomitan pesimistan koncepton pri naturvivo, kiel tion estis montrinta jam Darwin mem en sia dua verko *Origino de homo*. La koncepto

---

(¹) Ĝuste tiel okazis al Huxley en lia lekcio « Evoluo kaj etiko », en kiu li komence refutis ekziston de ajna morala elemento en vivo de la naturo kaj per tio estis eldevigita konfesi etikan elementon *ekster* la naturo. Pli poste tamen li rifuzis ankaŭ de tiu vidpunkto en la postaldonita noto, en kiu li konfesis ekziston de etika elemento en socia vivo de animaloj.

de Tennyson kaj Huxley ne estas plena. Ĝi estas unuflanka kaj tial falsa. Kaj ĝi estas tiom pli *ne scienca*, ke Darwin mem montris la alian flankon de la vivo de l' naturo en aparta ĉapitro de la ĵus menciita verko.

En la naturo mem, skribis li, ni observas apud reciproka lukto alian kategorion de faktoj kun tute alia senco : la fakton de reciproka helpo interne de la speco mem. Kaj ĉi-faktoj eĉ *pligravàs ol la unuaj* ĉar ili estas necesaj por konservo de la speco kaj ĝia prospero. Tiun ekstreme gravan penson, kiun plejmulto da darwinanoj rifuzas atenti kaj kiun Alfred Russel Wallace eĉ neas, — mi penis disvolvi kaj konfirmis per multa faktaro en tuta vico da artikoloj, kie mi montris grandegan signifon de l' Interhelpo por konservado de animalspecoj kaj de la homaro kaj precipe por ilia *progresiva evoluo*, por ilia perfektiĝado (1).

Neniom peninte malgravigi la fakton, ke multego da animaloj sin nutras per specoj el aliaj animalklasoj, aŭ per pli malgrandaj specoj de la sama klaso, mi indikis, ke interbatalo en la naturo plej ofte *estas limita per lukto inter diversaj specoj*; sed ke *interne de ĉiu speco* kaj tre ofte eĉ interne de grupoj, formitaj el diversaj kunvivantaj specoj *la inter-*

---

(1) La revuo *Nineteenth Century*, 1890, 1891, 1892, 1894 kaj 1896 jaroj kaj la libro *Mutual Aid, a Factor of Evolution*, London (Heinemann). (Reciproka Helpo kiel Faktoro de Evolucio).

*helpo estas ĝenerala regulo.* Kaj tial la socia flanko de animalvivo ludas multe pli gravan rolon en vivo de la naturo, ol reciproka ekstermado. Ĝi estas ankaŭ multe pli vasta. Efektive, la kvanto de sociemaj specoj inter la remaĉuloj, plimulto da mordetuloj, multaj birdoj, abeloj, formikoj k.t.p., kiuj vivas ne per ĉasado kontraŭ aliuj specoj, estas tre signifa, kaj la nombro de individuoj en ĉiu el sociemaj specoj estas eksterordinare granda. Krome, preskaŭ ĉiuj rabaj bestoj kaj birdoj ankaŭ praktikas certagrade la interhelpon kaj precipe ti-kiuj ne degeneras pro rapida ekstermado ĉu flanke de la homo, ĉu alikaŭze. *La interhelpo estas la superreganta fakto de la naturo.*

Sed se la interhelpo estas tiom vasta, tio rezultas nur el avantaĝoj, kiujn ĝi donas al la uzantaj ĝin animalspecoj kaj kiuj tute aliigas la interrilaton de la fortoj malprofite al rabuloj. Ĝi prezentas la plej bonan armilon en la granda porekzista batalo, en tiu konstanta lukto de animaloj kontraŭ klimato, inundoj (superakvegoj), ŝtormoj, neĝoventoj, frostoj k.t.p., kiu konstante postulas de l' animaloj novajn adaptiĝojn al konstante aliiĝantaj vivkondiĉoj. La naturo, kiel tutaĵo, neniukaze jesas la triumfon de fizika forto, rapida kuro, ruzo, aŭ aliaj ecoj utilaj en lukto. Male, en la naturo estas observataj multaj specoj absolute malfortaj, kiuj havas nek kirason, nek fortikan bekon, nek faŭkon por sindefendi kontraŭ malamikoj kaj ĉiuokaze ne militemaj. Kaj malgraŭ tio ili prosperas

pli, ol aliuj en la porekzista batalo, kaj dank'al la propra al ili sociemo kaj reciproka defendo ili eĉ elpuŝas rivalojn kaj malamikojn, armitajn senkompare pli bone, ol ili. Tiaj estas formikoj, abeloj, kolomboj, anasoj, zizeloj k.a. mordetuloj kaproj, cervoj, k.t.p. Fine oni povas konsideri tute pruvita, ke dume la porekzista batalo egale kondukas al evoluo progresiva samkiel al malprogresiva, t.e. iufoje al plibonigo de la speco kaj alifoje al ĝia malbonigo, — praktikado de la interhelpo prezentas la forton, kiu ĉiam kondukas al progresiva evoluo. Por progresiva evoluado de la animalio, por disvolviĝo de longvivo, saĝo kaj de ti-kio estas nomata en la animalĉeno la « supera tipo », por ĉio-ĉi interhelpo prezentas la ĉefan faktoron. Tiunĉi mian aserton ĝis nun nek unu biologo refutis [1].

Do, estante necesa por *konservo, prospero kaj progresiva disvolvo de ĉiu speco*, la interhelpa instinkto fariĝis *konstanta instinkto* (a permanent instinct), kiel ĝin nomis Darwin, la instinkto, kiu *ĉiam funkcias* en ĉiuj sociemaj animaloj kaj inter ili ankaŭ sendube ĉe la homo. Jam en la mem komenco de l' animala evoluo aperis tiu instinkto kaj sendube ĝi estas metita en ĉiuj animaloj, ĉu superaj, aŭ malsuperaj, same profunde, kiel la instinkto de

---

[1] Vidu notojn de Lloyd Morgan pri tiu temo kaj mian respondon al ili.

patrineco, eble eĉ pli profunde, ĉar ĝi estas propra eĉ al tiaj animaloj, kiel moluskoj, certaj insektoj kaj grandparto da fiŝoj, kiuj apenaŭ posedas ian patrinecan instinkton. Tial Darwin tute pravis en la aserto, ke la instinkto de la « reciproka simpatio » ĉe sociemaj animaloj sin elmontris *pli kontinua*, ol la pure egoista instinkto de l' individua sinkonservo. Onikone li konsideris ĝin kiel embrion de l' morala konscienco. Tion bedaŭrinde tro ofte forgesas darwinanoj.

Sed ankaŭ tio ne sufiĉas. En la sama instinkto kuŝas embrio de tiuj sentoj de l' simpatio kaj parta identigo de l' individuo kun sia grupo, kiuj estas elirpunkto de ĉiuj altecaj etikaj sentoj. Sur tiu bazo evoluis pli supera sento de l' justo, aŭ egalrajto, egaleco; kaj poste aperis ankaŭ ti-kio estas kutime nomata sinofero.

Kiam ni observas, ke dekmiloj da diversaj akvobirdoj alflugas grandare de malproksima sudo por nesti sur deklivoj de « birdmontoj » sur la bordo de Norda oceano kaj vivas tie sen iaj malpacoj pro pli bonaj lokoj; ke aroj da pelikanoj pace kunvivas sur marbordo kaj ĉiu aro havas propran marregionon por fiŝkaptado; ke miloj da specoj de birdoj kaj mambestoj ti-ali-maniere atingas certan interkonsenton pri siaj nutroregionoj, nestolokoj, noktopasigejoj kaj ĉasregionoj sen ia intermilito; kiam ni fine observas, ke junbirdo, kiu ŝtelis kelkiom da pajleroj, aŭ branĉetoj el fremda nesto, estas pro tio atakata de siaj samgentanoj, — ni jam

ekrimarkas en la vivo de socianimaloj la komencon kaj eĉ disvolviĝon de la sento pri egalrajto kaj justo.

Kaj fine, kiam ni transiras en ĉiu animalklaso al la superaj reprezentantoj de tiu klaso (formikoj, vespoj kaj abeloj ĉe insektoj; gruoj kaj papagoj inter birdoj; superaj remaĉuloj, simioj kaj fine la homo inter mambestoj), ni observas, ke identiĝo de individuaj interesoj kun tiuj de la grupo kreskas laŭgrade de nia transiro al ĉiam pli superaj reprezentantoj de la klaso. Kaj tio certe donas neignoreblan indikon pri la naturorigino ne nur de etikembrioj, sed ankaŭ de la superaj etiksentoj.

Tiel evidentiĝas, ke la naturo ne sole ne instruas nin pri amoralismo (senmoraleco), t. e. indiferenta rilato al la moralo, kontraŭbatalenda kaj venkenda de iu malpropra al la naturo elemento; sed ni estas devigitaj konfesi, ke *la konceptoj mem pri bono kaj malbono kaj niaj konkludoj pri la « plej supera bono »* estas prunteprenitaj el la vivo de l' naturo. Ili nur estas reflekto sur homa rezonado de tio, kion la homo vidis en animalvivo. Kaj dum la plua socivivo kaj kaŭze de ĝi la nomitaj impresoj formiĝis en *ĝeneralan* koncepton pri Bono kal Malbono. Necesas rimarkigi, ke tie ĉi ni tute ne konsideras personaj juĝojn de eksterordinaraj homoj, sed la juĝon de l' plimulto. Tiuj juĝoj jam enhavas la elementojn de l' justo kaj reciproka simpatio, kiu ajn el sentuloj ilin posedu, samkiel

la konceptoj pri mekaniko, deduktitaj el observoj sur la tersurfaco estas aplikeblaj al materio ankaŭ en la interstela spaco.

La samon necesas konfesi koncerne pluan disvolviĝon de la homa karaktero kaj homaj instituaĵoj. La evoluo de la homo okazadis en la sama naturmedio kaj samdirekte. Krome la instituoj mem de l' interhelpo kaj subteno, kiuj formiĝis en homsocioj, ĉiam pli kaj pli montris al la homo, kian forton li ŝuldas al ili. En tia socimedio ĉiam pli kaj pli formiĝis la morala aspekto de la homo. Bazite sur moralaj studoj en la regiono de l' historio ni povas nur prezenti la historion de l' homaro el vidpunkto de l' evoluo de etikelemento, kiel evoluon de la propra al la homo bezono organizi sian vivon sur la principoj de l' interhelpo, komence en familivivo, poste en vilaĝa komunumo kaj en respublikoj de liberurboj. Kaj tiuj formoj de l' sociordo, malgraŭ regresivaj (malprogresivaj) intertempoj, mem ekestadis fontoj de la plua progreso.

Certe ni devas rifuzi de la penso ekspozi * la historion de la homaro en formo de kontinua (seninterrompa) evoluĉeno, daŭranta de la ŝtonepoko dumĝis la nunatempo. La evoluo de homaj socioj ne estis seninterrompa. Ĝi kelkfoje rekomencadis en Hindio, Egipto, Mezopotamio, Grekio, Romio (Roma imperio), Skandinavio kaj Okcidenta Eŭropo, — ĉiufoje devenante de l' primitiva « tribo » kaj poste de vilaĝa komunumo. Sed se ni esploros

apartajn evoluliniojn, — ni certe konstatos en ĉiu el ili kaj precipe en la evoluo de la Okcidenta Eŭropo depost la falo de l' Roma imperio, konstantan pliampleksiĝon de la ideo pri reciproka subteno de tribo al gento, al nacio kaj fine al universala alianco de nacioj. Aliflanke, malgraŭ kelkatempaj retromovadoj, kiuj okazadis eĉ en la plej civilizitaj nacioj, ni vidas tamen (almenaŭ inter la reprezentantoj de progresiva penso ĉe civilizitaj popoloj kaj en progresivaj popolmovadoj) la deziron konstante ĝeneraligi la cirkulantajn ideojn pri la homa reciprokeco kaj justo. Ili evidentigas la tendencon plibonigi la karakteron de reciprokaj rilatoj kaj samtempe estas rimarkebla la aperado, en formo de idealo, de la konceptoj pri ti-kio estas atinginda dum la plua evoluo.

La fakto mem, ke la malprogresivaj t. e. retro-movadoj, kiuj okazadis kelkatempe ĉe diversaj popoloj, estas konsiderataj de la civilizita parto de l' socio kiel pasantaj nenormalaj fenomenoj, kies reveno estas antaŭforiginda, — tiu fakto pruvas, ke la etika kriterio (mezurilo) nun estas pli supera, ol antaŭe. Kaj samgrade kiel kreskas la rimedoj por kontentigi la bezonojn de l' loĝantaro en civilizitaj socioj kaj tiamaniere liberiĝas la vojo al pli alta kompreno de la justo rilate al ĉiuj, — laŭ sama mezuro la etikaj bezonoj neeviteble ĉiam pli kaj pli subtiliĝas.

Do, el vidpunkto de la scienca realisma

etiko, la homo povas ne nur kredi la moralan progreson, sed ankaŭ science bazi tiun kredon, malgraŭ ĉiuj pesimismaj lecionoj de li ricevitaj. Li vidas, ke la kredo al la propreso, kvankam ĝi komence estis nur simpla supozo, hipotezo (ja en ĉiu scienco la supozo antaŭiras la sciencan eltrovon), tamen ĝi estis tute ĝusta kaj nun estas pravigata de la scienca kono.

---

# ĈAPITRO DUA

## Aperetantaj elementoj de nova etiko.

*Kio baras la progreson de l' moralo.— Disvolviĝo de la sociema instinkto. — La inspiriva forto de l' evolua etiko.— Ideoj kaj moralkonceptoj.— La devosento. — Du specoj de l' moralaj agoj. — Signifo de memagivo. — Bezono pri individua kreado. —* Interhelpo, Justo, Moralo *kiel ĉef-principoj de scienca etiko.*

Se empiraj filozofoj bazante sur la natur-scienco ĝis nun ne pruvis ekziston de konstanta progreso en moralkonceptoj (kiu estas nomebla la bazprincipo de evoluo) — kulpas pri tio precipe spekulaj filozofoj, t. e. ne-sciencaj. Ili tiel obstine neis la empiran naturan originon de l' moralsento ; ili tiom lertumadis en subtilaj silogismoj por atribui al la moralsento supernaturan originon ; kaj ili tiom paroladis pri « antaŭdestino de la homo », pri la « celo de la ekzistado », pri la « celoj de la Naturo kaj Kreado », ke neevitebla estis la reakcio kontraŭ la mitologiaj kaj metafizikaj konceptoj, formiĝintaj ĉirkaŭ tiu problemo. Samtempe la modernaj evoluistoj pruvinte, ke

en animalio ekzistas persista porvivbatalo inter diversaj specoj, ne povis allasi, ke tia kruda fenomeno, kaŭzanta tiom da sufero inter la sentuloj estus la esprimo de la Plej Superulo. Kaj tial ili neis, ke en ĝi estas trovebla iu ajn etika elemento. Nur nun, kiam oni komencas konsideri la pogradan evoluon de la specoj, de diversaj homrasoj, hominstituoj kaj de la mem etikprincipoj, kiel rezulton de natura evoluo; nur nun ebliĝis, sen trafi supernaturan filozofion, la studado de diversaj fortoj, partoprenintaj en la evoluo, kaj inter ili de la signifo, kiun havas la interhelpo kaj la kreskanta reciproka simpatio en rolo de natura morala forto.

Sed se tio ĝustas, tiam ni venas al la treege grava momento por la filozofio. Ni rajtas konkludi, ke la leciono, akirata de la homo el la studo de l' naturo kaj el sia propra ĝuste komprenita historio, — konsistas en la konscio pri konstanta ekzisto de la *duobla aspiro*: unuflanke — *al sociemo*, aliflanke — al la rezultanta el ĝi pli granda intenso de la vivo kaj sekve pli granda feliĉo por la *individuo* kaj pli rapida ĝia progreso: fizika, intelekta kaj morala.

Tia duobla aspiro estas distinga trajto de la vivo ĝenerale. Ĝi estas ĉiam propra al la vivo kaj prezentas unu el ĉefaj ĝiaj ecoj (unu el ĝiaj atributoj) sendepende de la vivaspekto sur nia planedo, aŭ ajnaloke. Kaj tio estas ne metafizika aserto pri la « universeco de la mo-

rala leĝo » kaj ne simpla supozo. Se ne konstante kreskus la sociemo kaj sekve la vivintenso kaj la diverso de la vivsentaĵoj, — la vivo ne estus ebla. En tio kuŝas ĝia esenco. Se tio mankas, la vivo malpliiĝas, komencas degeneri, malaperi. Ĉi-tion oni rajtas konsideri pruvita leĝo de l'naturo.

Tial rezultas, ke la scienco ne nur subfosas la fundamenton de la etiko, sed male ĝi donas *konkretan* (perobjektan) *enhavon* al nebulozaj, metafizikaj asertoj, farataj de la transcenda, t. e. supernatura etiko. Kaj laŭ la mezuro de sia ĉiam pli profunda penetrado en la naturvivon la scienco atribuas al la evoluisma etiko — la etiko de disvolvo — *filozofian certon* tie, kie la transcenda pensulo povis bazi sole sur nebulozaj konjektoj.

Ankoraŭ malpli bazita estas ofte ripetata riproĉo al la pensado, apogata sur studo de la naturo. Simila pensado, oni diras, povas nin venigi nur al ekkono de iu senemocia, matemata* vero. Sed tiaj veroj malmulte influas nian konduton. Plejbonkaze la studo de l'naturo povas sugesti al ni amon al la vero; sed la *inspiro* por tiaj altaj emocioj (émotions), kiel p. e. la « senfina boneco » (infinite goodness) estas liverebla nur de la religio.

Ne estas malfacile pruvi, ke tia aserto estas sur nenio bazita kaj tial estas malvera. La amo al la vero jam konsistigas la pliparton — la plibonan parton — de ĉiu morala instruo. La saĝaj religiuloj tion plene komprenas.

Koncerne la koncepton pri « bono » kaj pri aspirado al ĝi, la ĵus menciita « veraĵo », t. e. ke la interhelpo estas la ĉeftrajto en la vivo de ĉiuj estuloj, — sen ajna dubo prezentas inspirivan veraĵon ; kaj tiu veraĵo siatempe trovos indan esprimon en la poezio de l'naturo, ĉar ĝi havigas al la ekkono de l'naturo novan trajton, — la trajton humanecan. Gœthe kun sia penetremo de l' panteista genio tuj komprenis tutan ĝian filozofian signifon, kiam li estis aŭdinta de la zoologo Eckermann la unuan aludon pri ĝi (1).

Ju pli proksime ni konatiĝas kun la primitiva homo, des pli kaj pli ni konvinkiĝas, ke el la vivo de animaloj, kun kiu li vivis en intima komuneco, — li akiris unuajn lecionojn pri kuraĝa defendo de siaj samfamilianoj, pri sinoferado porutile al sia grupo, pri senlima, gepatra amo kaj pri la utilo de la sociemo ĝenerale. La konceptoj pri « virto »

---

(1) Vidu Eckermann « Konversadoj kun Gœthe » (« Gespräche ») 1848, Vol. III, Pĝ. 219-222. Kiam Eckermann rakontis al Gœthe, ke birdido elnestiĝinta, post kiam li mortpafis ĝian patrinon estis rifuĝita de patrino alispeca, — Gœthe forte emociiĝis. « Se, li diris, tiu fakto okazeblos ĉiuloke, ĝi klarigos l'on diecan en la naturo ». La zoologoj komence de la XIX jarcento, kiuj studis la vivon de animaloj sur la amerika kontinento, ankoraŭ neloĝita de la homoj, kaj tia naturisto, kiel Brehm, konfirmis, ke efektive la fakto, notita de Eckermann, sufiĉe ofte renkontiĝas en la vivo de animaloj.

kaj «malvirto» estas konceptoj zoologiaj, sed ne ekskluzive homaj.

Krome, apenaŭ necesas insisti pri la influo de ideoj kaj idealoj sur moralkonceptojn, samkiel pri la inversa influo de l'moralaj konceptoj sur intelektan fizionomion de ĉiu epoko. La menskonstituo kaj mensevoluo de certa socio povas iafoje alpreni tute falsan direkton influite de diversaj eksteraj cirkonstancoj : avido de riĉiĝo, militoj, k. s. Aŭ male, ili povas atingi grandan alton. Sed ambaŭokaze la intelekteco (intelektnivelo) de certa epoko ĉiam profunde influas sur la formiĝon de moralaj konceptoj en la socio. La samo veras rilate al apartaj individuoj.

Sendube, la pensoj — *la ideoj* — prezentas *fortojn*, laŭ diro de Fouillée; kaj ili estas etikaj, moralaj fortoj, kiam ili estas ĝustaj kaj sufiĉe ĝeneralaj, por esprimi la veran vivon de l'naturo en ĝia tuta kompleto, sed ne sole unu ĝian flankon. Ĉi-tial unua paŝo por konstrui moralon, kapablan daŭre influi la socion, estas fondi ĝin sur firme starigitaj veraĵoj. Efektive, unu el ĉefaj baroj por ellaborado de kompleta etiksistemo konforma al modernaj postuloj, estas, ke la sociologio ankoraŭ trovigas en infanperiodo. La sociologio ĵus finis kolektadon de materialoj kaj nur komencas ilin esplori por difini probablan direkton de l'plua homarevoluo. Sed tie-ĉi ĝi ankoraŭ ĉiam trovas amason de fortiĝintaj antaŭjuĝoj.

La ĉefa postulo nun metata antaŭ la etiko

estas trovi en filozofia studado de l' objekto komunecon inter du vicoj de malaj sentoj en homo kaj tiamaniere helpi al homoj trovi ne kompromison, ne interkonsenton, sed ilian sintezon, ilian ĝeneraligon. Kelkaj el tiuj sentoj logas la homon subigi al si personacele aliujn; dum la altaj sentoj logas lin unuiĝi kun aliuj por komunapene atingi certajn celojn. La unuaj respondas al unu elementa bezono de l'homo — al la bezono de batalo, dum la duaj respondas al alia, ankaŭ elementa bezono: la deziro de unuiĝo kaj reciproka simpatio. Tiuj du sentogrupoj certe devas interbatali; sed trovi ilian sintezon en ia formo estas absolute necesa. Tio des pli necesas, ke la moderna homo, kiu ne havas certajn konvinkojn por kompreni tiun konflikton, perdas sian aktivan forton. Li ne povas allasi, ke la sangverŝa batalo por posedo, kondukata inter apartaj homoj kaj nacioj, estu la lasta vorto de l'scienco. Kaj samtempe li ne kredas, ke la problemo estas solvebla per predikado de frateco kaj abnego, kiun estis faranta en daŭro de tiom da jarcentoj la kristanismo, neniam sukcesinte atingi fratecon de popoloj kaj homoj kaj eĉ ne la reciprokan toleremon de diversaj kristanaj doktrinoj. Kaj kio koncernas la doktrinon de komunistoj, — granda plimulto da homoj samkaŭze ne kredas la komunismon.

Do, la ĉefa tasko de l' etiko estas nun helpi al la homo trovi solvon de tiu fundamenta kontraŭdiro.

Tiucele ni estas zorge studontaj antaŭ ĉio la rimedojn, kiujn uzis la homoj diversepoke por el penaro de apartaj individuoj akiri la plejan bonstaton por ĉiuj sen paralizi samtempe la individuan energion. Ni devas ankaŭ studi la tendencojn, kiuj aperas nun en la sama direkto ĉu en formo de la jam farataj timemaj provoj, ĉu en formo de ankoraŭ latentaj farebloj, entenataj en la moderna socio, por atingi la bezonatan sintezon. Kaj ĉar neniu nova movado okazis sen vekiĝo de certa entuziasmo, necesa por venki inerton de mensoj, tial la fundamenta tasko de nova etiko devas prezenti sugestadon al la homo de la *idealoj, kiuj kapablas veki entuziasmon*, kaj doni al homoj fortojn por efektivigo de ti-kio povas unuigi individuan energion kun laboro por komuna bono.

La bezono pri reala idealo igas nin ekzameni la ĉefan kontraŭdiron, metatan al ĉiuj sistemoj de nereligia etiko. Al ili mankas, oni al ni diras, necesa aŭtoritato; iliaj konkludoj ne povas veki sentojn de la *devo, de sindevigo*.

Estas tute ĝuste, ke la empira etiko neniam pretendis tian sindevigon, kian, ekzemple, postulas la dekalogo de Moseo... Estas vere, ke kiam Kant almetis kiel « kategoria imperativo » de ĉiu moralo la regulon : « agu tiamaniere, ke la maksimumo de via volo povu samtempe servi kiel ĝenerala leĝo », li estis pruvanta, ke ĉi-regulo bezonas nenian superan

sankcion por esti rekonita kiel universale deviga. « Ĝi prezentas, — li diris, — *necesan* formon de pensado, — « kategorion » de nia intelekto ; ĝi ne estas deduktita el iuj utilismaj konsideroj, t. e. el konsideroj pri utilo.

La moderna kritiko, komencante de Schopenhauer tamen montris, ke Kant eraris. Li *ne pruvis*, kial la homo devas obei lian « ordonon », lian imperativon. Kaj estas interese, ke el la mem rezonado de Kant rezultas, ke la sola motivo, pro kiu lia ordono povas pretendi ĝeneralan aprobon, estas ĝia socia *utilo*. Kaj tamen kelkaj el la plej bonaj paĝoj de Kant-verkoj estas ĝuste tiuj, kie li pruvas, ke neniukaze la motivoj pri utilo estas konsiderendaj, kiel fundamento de l' moralo. Esence li verkis belan ditirambon pri devosento, sed li trovis por tiu sento neniun alian bazon, escepte la internan konsciencon kaj lian deziron konservi harmonion inter siaj intelektaj konceptoj kaj siaj agoj (1).

La empira moralo certe ne celas kontraŭmeti ion-ajn al la religia ordono, esprimata

---

(1) Pliposte li, cetere, iris pluen. El lia filozofia teorio de kredo (« Religion innerhalb der Grenzen der blossen Vernunft ») eldonita de li en 1792 j. oni vidas, ke se li komencis per kontraŭmetado de racia etiko al antikristanaj doktrinoj tiutempaj, — li finis per konfeso de la « nekoncepteblo de morala kapablo, kio indikas ĝian diecan originon ». V. : Kant-verkaro, eld. de Hartenstein, v. VI, pĝ. 143-144.

per la vortoj : « Mi estas cia Dio » ; sed la profunda kontraŭdiro, kiu daŭras ekzisti en la vivo inter la kristanaj doktrinoj kaj la reala vivo de socioj, sin nomantaj « kristanaj », forprenas la forton de la supremenciita riproĉo. Krome, necesas ankaŭ diri, ke la empira moralo ne estas tute senigita de certa konvencia sindevigo. Diversaj sentoj kaj agoj, nomataj depost Auguste Comte « altruismaj », estas facile divideblaj je du grupoj. Ekzistas agoj nepre necesaj, se ni deziras vivi en socio... kaj neniam decus ilin nomi altruismaj : ili havas karakteron de reciprokeco kaj ili estas farataj de individuo por ĝia propra intereso, samkiel ĉiu ago de sinkonservo. Sed inter ĉi-agoj ekzistas ankaŭ aliaj agoj, kiuj neniel havas karakteron de reciprokeco. Kiu faras similajn agojn, tiu fordonas siajn fortojn, sian energion, sian entuziasmon, atendante nenian rekonon, nenian rekompencon. Kaj kvankam ĝuste ĉi-agoj estas ĉef-motoroj de morala perfektiĝo, tamen ili estas neniel konsidereblaj kiel devigaj. Kaj malgraŭ tio la ambaŭspecaj agoj estas konstante konfuzataj de moralistoj kaj kaŭze de tio ni trovas en etikproblemoj tiel multe da kontraŭdiroj.

Tamen oni povas facile liberiĝi de tiu konfuzo. Antaŭ ĉio estas klare, ke pli bone oni ne miksu la taskojn de la etiko kun tiuj de la leĝdono.

La moraldoktrino eĉ ne solvas la pro-

blemon, — ĉu ekzistas, aŭ ne, bezono pri leĝdonado. La moralo staras super tio. Efektive ni konas multe da prietikaj verkistoj, kiuj neis la neceson de iu-ajn leĝdono kaj rekte apelis (vokis) al la homa konscienco. Kaj en la frua periodo de la Reformacio ĉi-verkistoj ĝuis sufiĉe grandan influon. Esence, la taskoj de la etiko ne estas: insisti pri mankoj de la homo kaj riproĉi lin pri liaj « pekoj ».

Ĝi devas influi en *pozitiva* direkto, apelante al la plej bonaj instinktoj de la homo.

Ĝi determinas kaj eksplikas* la nemultajn bazprincipojn sen kiuj nek la animaloj, nek la homoj povus vivi socie. Sed plue ĝi apelas al io pli alta: al amo, kuraĝo, frateco, memestimo, al la vivo konforma kun la idealo.

Fine ĝi diras al la homo, ke se li deziras vivi tiel ke ĉiuj liaj fortoj trovu plenan elmontron, li devas unufoje por ĉiam ĉesi kredi, ke estas eble vivi, ignorante alies bezonojn kaj dezirojn.

Nur ti-kiam estas starigita certa harmonio inter individuo kaj tuta lia ĉirkaŭantaro oni povas proksimiĝi al tia vivo, — tiel diras la etiko, — kaj ĝi aldonas: — « Rigardu la naturon. Studu la pasinton de l'homa gento. Ili pruvos al vi, ke tio-ĉi veras ». Poste, kiam la homo iakaŭze hezitas — kiel li kondutu en certa okazo, — la etiko helpevenas al li kaj

montras: kiel li mem dezirus, ke oni agu rilate al li en simila okazo (1).

Cetere, eĉ tiakaze la etiko ne indikas rigoran kondutlinion, ĉar la homo mem devas taksi la valoron de diversaj aperantaj ĉe li argumentoj. Al ti-kiu ne povas toleri iun-ajn malsukceson senutile ni konsilus riski. Same senutilas konsili al energioza junulo singardemon de maljuneta homo. Li respondos al tio, kaj tute prave, per la vortoj profunde-veraj kaj belaj, tiuj de Egmont al la maljuna grafo Olivier en la dramo de Gœthe: — « Kvazaŭ pelataj de nevideblaj fantomoj la sunĉevaloj de la tempo kuras kun la malpeza ĉaro de mia sorto. Kaj restas al ni nur kuraĝe teni la kondukilon kaj evitigi la radojn — jen de la ŝtono maldekstre, jen de la abismo dekstre — dekie ni venas! — La floro devas flori, — diras Guyau — eĉ se la florado estas ĝia morto » (2).

Kaj tamen la ĉefa celo de l'etiko ne estas konsilado al ĉiu aparte. Ĝia celo estas pliĝuste meti antaŭ la homaro superan celon — la idealon, kiu pli bone ol ajna konsilo kondukas ilin instinkte al agado ĝustedirekta.

---

(1) La etiko ne diros al li: — « Vi devas jene agi », sed demandos lin: — « Kion vi volas — klare kaj definitive, sed ne pro la minuta humoro » (Paulsen, F., « System der Ethik ». 2 volumoj, Berlin, 1896, I, 20.

(2) M. J. Guyau « La moralo sen devigo kaj sankcio ».

Samkiel la celo de la eduko de racio konsistas en tio, ke ni kutimu fari tutan vicon da ĝustaj silogismoj preskaŭ senkonscie, — samtiel la celo de l' etiko estas krei en la socio tian atmosferon, ke la plimulto tute, t. e. senhezite, faru la agojn, kiuj kondukas al ĉies bonstato kaj al la plejebla feliĉo de ĉiu aparta individuo.

Tia estas fincelo de l' moralo. Sed por ĝin atingi ni devas liberigi niajn moraldoktrinojn de iliaj internaj kontraŭdiroj. Tiel p. e. la moralo, kiu predikas « bonfaradon » pro kunsento kaj kompato, enhavas mortigan kontraŭdiron.

Ĝi komencas per sankciado de la justo rilate al ĉiuj, t. e. de l' egalo aŭ de plena frateco, t. e. refoje la egalo, aŭ almenaŭ la egalrajto. Kaj tuje ĝi rapidas aldoni, ke oni ne bezonas tion celi. La unua estas neatingebla... Kaj kio koncernas la fratecon, formantan ĉefbazon de ĉiuj religioj, — ĝin oni ne devas kompreni laŭlitere: ĝi prezentis nur la poezian esprimon de entuziasmaj predikistoj. « Malegalo estas naturleĝo », — diras al ni religiaj predikistoj, oportunkaze rememorante la naturon. En tiu problemo ili instruas nin lerni el la naturo kaj ne el la religio, kritikinta la naturon. Sed kiam malegalo inter homoj iĝas tro frapanta kaj la sumo de la produktataj riĉaĵoj estas dividata tiom malegale, ke la plimulto da homoj devas vivi en plej terura mizero, tiam fariĝas sankta devo aldividi por

la malriĉulo la « aldivideblon », sen perdi sian privilegian staton.

Tia moralo povas, certe, daŭri kelkan tempon kaj eĉ longan tempon, se ĝin subtenas la religio interpretata de la reganta eklezio. Sed tuj kiam la homo ekrilatas al la religio kritike kaj serĉas konvinkojn, certigitajn de la racio anstataŭ blinda obeo kaj timo, — tiam simila interna kontraŭdiro jam ne povas longe daŭri. Ĝi estas forlasota — kaj ju pli baldaŭ, des pli bone. Interna kontraŭdiro estas por ĉiu etiko la mortverdikto kaj la vermo subfosanta la homan energion.

* * *

Unu fundamenta kondiĉo estas plenumenda de ĉiu moderna etikteorio. Ĝi ne devas kateni la memagivon de l' individuo eĉ por tia alta celo, kia estas la bono de la socio, aŭ de la speco. Wundt en sia bonega revuskizo de etikaj sistemoj rimarkigis, ke komence de la « kleriga periodo » en la mezo de la 18-a jarcento preskaŭ ĉiuj sistemoj de l' etiko fariĝas individuismaj. Sed tiu rimarko ĝustas nur ĝis certa grado, ĉar la rajtoj de l'individuo estis akcentataj kun aparta energio nur en unu regiono ekonomia. Sed ankaŭ tie-ĉi la individua libero restis en la praktiko, samkiel en la teorio, pli ŝajna, ol efektiva. Kio koncernas al aliaj regionoj — politika, spirita, arta, oni povas diri, ke laŭmezure kiel la

ekonomia individuismo estis firmigata kun ĉiam kreskanta forto, la subpremo den* individuo per la militorganizo de l' ŝtato, per ĝia eduksistemo kaj per ĝia mensa disciplino, necesa por subteno de l'ekzistantaj instituoj, — tiu subpremo ĉiam grandiĝis. Eĉ la plimulto da ekstremaj nuntempaj reformistoj en siaj anticipoj pri la venonta sociordo allasas kiel nedisputeblan premison la ankoraŭ pli grandan absorbon den* la individuo de la socio.

Tia tendenco nature aperigis proteston, esprimitan de Godwin en la komenco kaj de Spencer en la dua duono de la 19-a jarcento kaj kondukis Nietzsche al la aserto, ke ĉian moralon oni pli bone ĵetu for, se ĝi ne povas trovi alian fundamenton ol la oferado de la individuo al la interesoj de l'homaro. Tiu kritiko de la cirkulantaj doktrinoj pri moralo estas eble la plej karakteriza trajto de nia tempo, des pli, ke ĝian ĉefmotoron ne tiom prezentas nure-personeca aspiro al ekonomia sendependo (kiel tion elmontris en 18-a jarcento ĉiuj pledantoj por la individurajtoj, escepte Godwin), kiom la pasia deziro al *individua sendependo, por konstrui novan pli bonan sociordon,* en kiu bonstato por ĉiuj estu la bazo por plena disvolviĝo de la individuo (¹).

(¹) Wundt faras tre interesan rimarkon : « Se, — li diras, — ni ne estas trompataj de ĉiuj simptomoj, —

La nesufiĉa disvolviĝo de l'personeco (kondukanta al herdeco*) kaj de persona kreivo samkiel de l'iniciativo — estas sendube unu el la ĉefaj mankoj de nia tempo. La ekonomia individuismo ne plenumis siajn promesojn. Ĝi ne havigis al ni plenan evoluon de l'individueco... Samkiel en pratempo, la krea spirito en socia rekonstruo sinelmontras tre malrapide, kaj la imitado restas la ĉefa rimedo por disvastigo de progresivaj novaĵoj en la homaro. Modernaj nacioj ripetas la historion de barbaraj gentoj kaj de mezepokaj urboj, kiuj ambaŭ siatempe imite prenadis unu de alia politikajn, religiajn kaj ekonomiajn movadojn kaj iliajn «ĉartojn de libero». Tutaj nacioj lastatempe proprigis kun mirinda rapido industrian kaj militan civilizon de Eŭropo. Kaj tiuj-ĉi eĉ revizitaj, novaj eldonoj de l'malnovaj modeloj plej klare vidigas, — kiomgrade supraĵeca estas tiel nomata kulturo: kiom da simpla imito ĝi enhavas.

Do, tre nature estus meti la demandon: «Ĉu ne akcelas la disvastigitaj nun etikaj doktrinoj tiun imitan subiĝon? Ĉu ili ne tro multe penis fari el homo «idean aŭtomaton»

---

nun en la publika opinio okazas revolucio, en kiu la ekstrema individuismo de la klerigepoko cedas lokon al vekiĝo de l'universalismo de antikvaj pensuloj, kompletigita per la koncepto pri la libereco de l'homa individuo. Tiun plibonigon ni ŝuldas al la individuismo. («Etiko», pĝ. 459, germ. originalo).

(ideational aŭtomaton) de Herbart, absorbitan en meditado kaj plejgrade timantan la ventegon de pasioj ? Ĉu ne estas ĝustatempe defendi la rajtojn de la viva homo, plena de energio, kapabla forte ami la amindon kaj malami la malamindon, rajtojn de la homo ĉiam preta batali por la idealo, altiganta lian amon kaj praviganta liajn antipatiojn ? De post la tempo de antikvaj filozofoj ĉiam ekzistis la tendenco prezenti la « virton » kiel specon de « saĝo », instigantan la homon prefere « evoluigi la belecon de sia animo », ol lukti kontraŭ la malbonoj de sia tempo komune kun « nesaĝuloj ». Pliposte oni komencis nomi virto la « nereziston kontraŭ malbono kaj dumdaŭre de multaj jarcentoj persona « savo », ligita kun humileco antaŭ la sorto kaj kun pasiva rilato al la malbono, estis la esenco de l' kristana etiko. Tio rezultigis verkadon de subtilaj pruvoj favore al la « virta individuismo » kaj glorado de l' monakeja indiferento al la socia malbono. Feliĉe, kontraŭ tia egoista virto jam komencas reakcio kaj estas metata la demando : — Ĉu ne prezentas la pasiva rilato al malbono kriman malkuraĝon ? Ĉu ne pravas Zend Avesta, kiam ĝi asertas, ke aktiva batalado kontraŭ la malbona Arimano estas la unua kondiĉo de la virto (1). La morala

---

(1) C. P. Thiele. « Historio de religio en antikvo ». Gotha, 1903, II, pĝ. 163.

progreso estas necesa, sed sen morala kuraĝo ĝi estas malebla.

Tiaj estas kelkaj el la postuloj, metataj al la etiko kaj diferenceblaj en nuna kunpuŝiĝo de konceptoj. Ili ĉiuj kondukis al unu ĉefa penso. Estas bezonata nova kompreno de la moralo, unue en ĝiaj ĉefelementoj, kiuj devas esti sufiĉe larĝaj por doni novan vivon al nia civilizo, kaj due en ĝiaj aplikoj, kiuj estas liberigendaj de la restaĵoj de supernatura, transcenda pensado, samkiel de la mallarĝaj konceptoj de l' burĝa utilismo.

Elementoj por nova kompreno de l' moralo jam ekzistas. La signifo de l' sociemo kaj la interhelpo en la evoluo de l' animalio kaj en la historio de la homo, mi kredas, estas konsiderebla kiel pozitive fiksita scienca vero, libera de hipotezoj.

Plue ni povas konsideri pruvita, ke laŭmezure kiel la interhelpo fariĝas firmiĝinta kutimo en la homa socio kaj, tieldire, estas praktikata instinkte, tiu praktiko mem kondukas al evoluo de la *justosento* kun ĝia neevitebla sento de l' *egalo,* aŭ egalrajto kaj de la egaleca sindeteno. La penso, ke personaj rajtoj de ĉiu aparte estas same nerompeblaj kiel la naturrajtoj de ĉiu aliu, — tiu penso kreskas laŭmezure kiel malaperas klasdiferencoj. Kaj tiu penso fariĝas larĝe vastigita ideo, kiam la instituaĵoj de l' socio suferas konforman ŝanĝon.

Certa grado de identigo de sia persono

kun la interesoj de sia grupo ekzistis elnecese de la mem komenco de socia vivo, kaj elmontriĝas jam ĉe malsuperaj animaloj. Sed laŭmezure kiel la rilatoj de l'egalo kaj justo enradikiĝas en homaj socioj, — prepariĝas la grundo por plua kaj pli larĝa evoluo de pli subtilaj rilatoj. Dank'al ili la homo tiom kutimas kompreni kaj senti la efikon de siaj agoj sur la tuta socio, ke li evitas ofendi aliujn, eĉ ti-kiam li estas devigita rifuzi kontentigon de siaj deziroj. Li tiagrade identigas siajn sentojn kun la sentoj de aliaj kaj li pretas fordoni siajn fortojn pro alies utilo, sen atendi ian rekompencon. Tiaspecaj neegoismaj sentoj kaj kutimoj ordinare ne tute precize determinataj kiel *altruismo* kaj *sinofero*, — estas miaopinie sole nomindaj proprasence « moralo », kvankam la plimulto da verkistoj ĝis nun miksis ilin, sub la nomo de altruismo, kun simpla justosento.

*La interhelpo, — la justo, — la moralo,* — tiaj estas la sinsekvaj paŝoj de supreniĝanta vico de animstatoj, kiujn ni ekkonas ĉe la studo de la animalio kaj de la homo. Ili prezentas *organan neceson*, kiu en si mem portas sian pravigon, kaj kiu estas konfirmata de la tuta evoluo de l'animalio, komencante de l'unuaj ĝiaj ŝtupoj (en formo de kolonioj de plej simplaj animaloj) kaj pograde leviĝante ĝis la plej superaj homscioj. Parolante metafore ni havas tie ĉi la *ĝeneralan mondleĝon de l'organa evoluo.* Sekve de

tio la sentoj de l' interhelpo, justo kaj moralo estas profunde metitaj en la homo, kun tuta forto de la denaturaj instinktoj. Kaj la unua el ili, la instinkto de reciproka helpo, evidente estas la plej forta el ĉiuj, kaj la tria, disvolviĝinta pli malfrue, estas nekonstanta sento kaj estas konsiderata malplej deviga.

Simile al la bezono pri nutraĵo, rifuĝejo kaj dormo, ĉi tri instinktoj estas tiuj de la memkonservo. Kompreneble iafoje ili povas malfortiĝi sub la influo de certaj kondiĉoj, kaj ni scias multajn kazojn, kie ti-alikaŭze okazas malfortiĝo de ĉi-instinktoj ĉe kelkiuj anilmalgrupoj aŭ homsocioj. Sed tiam ĉi-grupo neeviteble malvenkas en la porekzista batalo: ĝi venas al dekadenco. Kaj se tiu grupo ne retrovenos al la kondiĉoj, necesaj por la vivokonservo kaj progresiva evoluo, t. e. al la Interhelpo, Justo kaj Moralo, tiam ĝi — estu ĝi gento, aŭ speco, — formortas kaj malaperas. Se ĝi ne plenumis la necesan kondiĉon de l' progresiva evoluo, ĝi neeviteble dekadencas kaj malaperas.

Tia estas la firma bazo, kiun donas al ni la scienco por verki novan etiksistemon kaj ĝin pravigi. Kaj tial anstataŭ proklami la «bankroton de l' scienco», ni estas nun ekzamenontaj kiamaniere konstrui la sciencan etikon laŭ la akiraĵoj de la modernaj esploroj, animitaj de l' evoluteorio.

# ĈAPITRO TRIA

## La morala principo en la naturo ([1]).

*La teorio de Darwin pri la origino de l' morala sento ĉe la homo. — La ĝermoj de l'moralaj sentoj ĉe la animaloj. — Origino de la devosento ĉe la homo. — La interhelpo kiel la ĝermofonto de l'etikaj sentoj ĉe la homo. — Sociemo en la animalio. — Interrilatoj de sovaĝuloj kun animaloj. — Estiĝo de la koncepto pri justo ĉe primitivaj gentoj.*

La laboro plenumita de Darwin ne limiĝis sole per la regiono de l' biologio. Jam en 1837-a jaro, kiam li ĵus estis farinta la ĝeneralan skizon de sia teorio pri la origino de la specoj, li skribis en la notlibro : « Mia teorio venigos al nova filozofio ». Kaj tiel efektive okazis. Enportinte la ideon de l' evoluo en la studadon de l'organa vivo li per tio malfermis novan epokon en la filozofio. Kaj la pli poste verkita de li skizo pri la evoluo de

([1]) Tiu ĉi ĉapitro estis presita en *Nineteenth Century*, 1905, Marto.

l' moralsento en la homo formis novan ĉapitron en la scienco pri la moralo (¹).

En tiu-ĉi skizo Darwin prezentis la veran originon de l' morala sento sub nova lumo kaj metis la tutan problemon sur sciencan grundon. Oni devas konfesi, ke kvankam liaj opinioj povas esti konsiderataj kiel pluevoluo de l'opinioj de *Shaftesbury* kaj *Hutcheson*, tamen li malfermis por la scienco pri la moralo novan vojon laŭ la direkto skize montrita de *Bacon*. Li iĝis tiamaniere unu el la fondintoj de etikaj skoloj, apud *Hume*, *Hobbes* kaj *Kant*.

La ĉefpenso de l' Darwina etiko estas esprimebla per malmultaj vortoj. Li mem tre precize difinis ĝin, en la unuaj linioj de sia skizo. Li komencis de laŭdo al la devosento, priskribante ĝin per bone konataj poeziaj vortoj : — « La devo estas mirinda penso, kiu efikas sur nin ne per kareso, kompato, aŭ iu minaco »... k. t. p.

Kaj tiun devosenton, t. e. moralan konsciencon, li eksplikis* « ekskluzive el la vidpunkto de l' naturscienco », — la ekspliko*, kiun, — aldonis li, — ĝis nun neniu angla verkisto provis doni (²).

---

(¹) En sia verko « Modernaj filozofoj » la dana profesoro Harald Höffding donis bonegan skizon pri filozofia signifo de Darwin'aj verkoj. (Rig. germ. trad. Leipzig, 1896, II, pĝ. 487 k. sekv.).

(²) « Origino de l' homo », ĉap. IV.

Propradire, similan eksplikon* jam *estis aludanta Bacon.*

Allasi, ke la morala sento estas akirata de ĉiu homo aparte dum lia vivo, — Darwin certe opiniis « almenaŭ neverŝajna el la ĝenerala vidpunkto de l'evoluteorio ». Li eksplikas* la originon de l'morala sento el la sento de l'sociemo, kiu ekzistas instinkte, aŭ denaske ĉe malsuperaj animaloj kaj kredeble ankaŭ ĉe la homo. La veran bazon de ĉiuj moralaj sentoj Darwin vidis en la « sociaj instinktoj, kaŭze de kiuj la animaloj trovas plezuron en la societo de siaj kamaradoj, en la sento de certa simpatio al ili, kaj en la farado por ili de diversaj komplezoj ». Plie Darwin komprenis la senton de l'simpatio (kunsento) en ĝia preciza senco, ne en tiu de kondolenco, aŭ de la « amo », sed en la senco de la « sento kamaradeca », de l'« reciproka impreseblo » — en tia senco, ke sur la homon povas influi la sentoj de aliu, aŭ de aliuj.

Post tiu unua tezo, Darwin plue montris, ke en ĉiu animalspeco, se en ĝi forte evoluas la penskapabloj, samgrade kiel ĉe la homo, — nepre evoluos ankaŭ la socia instinkto. Kaj la nekontentigo de tiu instinkto neeviteble kondukos la individuon al la sento de l'nekontento kaj eĉ de l'suferoj, se rezonante pri siaj agoj la individuo ekvidos, ke certakaze « la konstanta, ĉiam propra al li sociinstinkto cedis en li al iuj aliaj instinktoj, kiuj, kvankam plifortaj ĉi-momente, estas tamen mal-

konstantaj kaj ne lasas post si tre fortan impreson (1).

Tiamaniere la moralan senton Darwin komprenis tute ne kiel mistikan donon de nekonata kaj mistera deveno kiel ĝin prezentis al si Kant. — « Ajna animalo, skribis Darwin, posedanta difinitajn sociajn instinktojn — inkluzive la gepatraj kaj gefilaj interinklinoj, — nepre akiros moralan senton, aŭ konsciencon (« devokonscio » de Kant) tuj kiam ĝiaj intelektaj fortoj estos samgrade evoluintaj, kiel ĉe la homo.

Al tiuj du ĉefaj tezoj Darwin aldonis du akcesorajn.

Kiam evoluas la parola lingvo, — li skribis, — kaj jam aperas la eblo esprimi dezirojn de l' socio, tiam « publika » opinio pri tio, kiel ĉiu sociano devus konduti, nature fariĝas forta kaj eĉ la ĉefa gvidanto de l' konduto. Sed la influo de l' publika aprobo, aŭ malaprobo al la konduto plene dependas de la grado de disvolviĝo de l' intersimpatio. Ni konsideras signifozaj la opiniojn de aliuj sole pro tio, ke ni kunsimpatias (amikas) al ili. Kaj la publika opinio influas en morala direkto nur ti-kaze, se estas sufiĉe forte evoluinta socia instinkto.

La ĝusteco de tiu rimarko evidentas. Ĝi refutas la opinion de *Mandeville* (la aŭtoro

---

(1) « Origino de l' homo », ĉap. IV.

de la « abelfablo ») kaj de liaj pli-malpli malkaŝaj adeptoj en la 18-a jarcento, kiuj penadis prezenti la moralon kiel konvencian moraron.

Fine, Darwin menciis ankaŭ pri la *kutimo*, kiel unu el aktivaj fortoj por formado de nia rilato al aliuj. Ĝi plifortigas la socian instinkton kaj senton de reciproka simpatio kaj ankaŭ la obeon al la publika juĝo.

Esprimінte la esencon de siaj opinioj en ĉi-kvar tezoj Darwin poste malvolvis ilin.

Unue li ekzamenis la sociemon ĉe animaloj: kiagrade ili ŝatas resti en la socio kaj kiel malbone ili sin sentas solaj; ilian konstantan interrilatadon, ilian reciprokan avertadon kaj subtenon dum ĉasado kaj sindefendo. « Ekzistas neniu dubo, — tiel parolis li, — ke sociemaj animaloj sentas reciprokan amon, kiu mankas al plenaĝaj nesociemaj animaloj ». Ili povas ne havi grandan simpation unu al aliu en plezuroj, sed estas tute ordinaraj kaj plene pruvitaj la kazoj de reciproka simpatio en domaĝo, aŭ sufero. Kaj Darwin citis kelkajn el la plej frapantaj similaj faktoj. Kelkaj el ili, p. e. la blinda pelikano, priskribita de Stansbury kaj la blinda rato, kiuj estis nutrataj de iliaj samspecanoj, iĝis jam klasikaj ekzemploj.

« Samtempe, — daŭrigis Darwin, — krom amo kaj simpatio ni konas ĉe animaloj aliajn ecojn, same ligitajn kun la sociinstinktoj, kiuj de ni homoj estus nomataj la « moralaj ecoj ».

Kaj li citis kelkajn ekzemplojn de l' morala sento ĉe hundoj kaj elefantoj [1].

Estas ĝenerale kompreneble, ke por ĉiu komuna ago (kaj ĉe kelkaj animaloj tiaj agoj estas tute ordinaraj: la tuta vivo konsistas el tiaj agoj) estas postulata ekzisto de certe detenanta sento. Cetere oni devas diri, ke Darwin ne pristudis la demandon pri sociemo ĉe animaloj kaj pri la ĝermoj de l'moralaj sentoj ĉe ili en tia grado, kian bezonus la grava signifo de tiuj sentoj por lia etikteorio.

Transirante plue al la homa moralo Darwin rimarkigis, ke kvankam la homo, kia li formiĝis nun, havas malmulte da sociaj instinktoj, — li tamen estas sociema estaĵo, konservinta de tre fruaj tempoj certaspecan instinktan amon kaj kunsenton al siaj samspecanoj. Tiuj sentoj funkcias kiel duonkonscie instigaj (impulsivaj) instinktoj, al kiuj helpas la racio, la sperto kaj la deziro de aprobo flanke de aliuj.

« Tiamaniere, — konkludis li, — sociaj instinktoj, kiujn la homo devis esti akirinta jam sur tre primitiva evoluŝtupo, — kredeble jam ĉe siaj simiatraj prauloj, — ĝis nun restas kaŭzo por certaj liaj personaj agoj ». La cetero

---

[1] De tiam Herbert Spencer, kiu antaŭe rilatis negative al la moraleco ĉe animaloj, citis en la revuo « Nineteenth Century » de James Knowles kelkajn similajn faktojn. Ili estas represitaj en lia « Principles of Ethics » (Principoj de Etiko), vol. II, supplements D. « La konscienco ĉe animaloj ».

estas rezulto de la ĉiam pli kaj evoluanta racio kaj kolektiva edukado.

Evidentas, ke ĉi-opinioj de Darwin estos konfesitaj kiel ĝustaj nur de ti-kiuj konfesas, ke la mensaj kapabloj de la animaloj diferencas de la samaj kapabloj ĉe la homo ne laŭ la esenco, sed nur per ilia evolugrado. Sed al tia konkludo venis nun la plimulto de ti-kiuj studis la komparan psikologion de la homo kaj de animaloj. Kaj la provo de kelkaj psikologoj, antaŭnelonge faritaj por ne disigi per netransirebla abismo la instinktojn kaj menskapablojn de la homo for de tiuj de la animaloj, — ne atingis sian celon (1).

Estas kompreneble, ke el la similo inter la instinktoj, kaj intelekto ĉe la homo kaj tiuj de animaloj ne sekvas, ke la moralaj instinktoj, kiuj evoluis en diversaj animalspecoj kaj des

(1) La nekapablo de formiko, hundo, aŭ kato fari eltrovon, aŭ trafi la veran solvon de iu embaraso, — ofte indikata de kelkiuj verkistoj tiutemaj, — neniel pruvas la esencan diferencon inter la kapabloj de la homo kaj tiuj de la animaloj, ĉar ĝuste la sama manko de l' sinorientivo kaj inventivo konstante renkontiĝas ankaŭ ĉe la homo. Simile al la formiko en unu el la eksperimentoj de John Lubbok, miloj da homoj ne antaŭkonante la lokon same provas travadi riveron kaj pereas ĉe tiuj provoj, antaŭ ol ili estas metintaj trans ĝi iun primitivan ponton, ekz. per faligita arbo. Mi scias tion laŭ propra sperto kaj ĉiuj esploristoj de sovaĝaj primitivaj landoj tion konfirmos. Aliflanke ni trovas ĉe animaloj kolektivan prudenton de l' formika nesto,

pli en diversaj animalklasoj, estu identaj inter si. Komparante, ekz., insektojn kun mambestoj oni devas neniam forgesi, ke la evolulinioj de la unuaj kaj la duaj disiĝis jam en tre frua periodo de la evoluo de la animalio sur la terglobo. Rezulte, inter la formikoj, abeloj, vespoj, k. t. p., aperis profunda fiziologia diferenco en ilia strukturo kaj en ilia tuta vivo, inter diversaj tipoj de la sama speco (laborabeloj, virabeloj, abelino) kaj samtempe aperis ankaŭ profunda fiziologia labordivido en iliaj societoj (aŭ ĝuste — labordivido kaj fiziologia diferenciĝo de strukturo). Tian dividon ne havas la mambestoj. Konsekvence estas dubinde, — ĉu la homoj rajtas juĝi pri la moraleco de l' laborabeloj, kiam la lastaj mortigas la virojn en sia abelujo. Kaj ĝuste tial la citita de Darwin ekzemplo el la vivo de abeloj estis akceptita tiel malamike en la

---

aŭ de l'abelujo. Kaj se unu formiko, aŭ unu abelo el mil trafas ĝustan solvon, la ceteraj imitas ĝin. Kaj tiam ili solvas taskojn multe pli malfacilajn, ol ti-kiuj estis tiel ridinde malsukcesintaj ĉe formiko, abelo aŭ kato en la eksperimentoj de kelkaj naturistoj kaj — mi tion kuraĝas diri — ĉe la naturistoj mem en la aranĝo de iliaj eksperimentoj, kaj en iliaj konkludoj. La abeloj ĉe la Pariza ekspozicio kaj la elpensita de ili defendo kontraŭ la malhelpo al ilia laboro, kiam ili per vakso glufermis la fenestreton. (Vidu « La Interhelpo », ĉap. I.) kaj ajna el la bone konataj faktoj de l' inventivo ĉe abeloj, formikoj, lupoj dum iliaj ĉasoj plene konfirmas la suprediriton.

religia tendaro. La societoj de abeloj, vespoj kaj formikoj unuflanke kaj la societoj de mambestoj aliflanke estas tiom longe irintaj ĉiu laŭ sia propra evoluvojo, ke ili perdis en multo la reciprokan komprenon. La saman reciprokan nekomprenadon, kvankam en malpli granda mezuro ni trovas ankaŭ inter la homaj societoj sur diversaj ŝtupoj de l' evoluo.

Kaj samtempe la moralaj ideoj de la homo kaj konduto de la socivivantaj insektoj havas inter si tiom da komuneco, ke la plej grandaj moralmajstroj de l' homaro ne hezitis meti kiel modelon antaŭ la homo kelkajn trajtojn el la vivo de formikoj kaj abeloj. Ni, homoj, ne superas ilin per la fideleco de ĉiu aparte al sia grupo. Kaj aliflanke, jam ne parolante pri militoj, aŭ pri okazantaj de temp' al tempo plenaj ekstermoj den* la religiaj skismanoj kaj politikaj kontraŭuloj, — la leĝoj de la homa moralo subiĝis en la daŭro de l' jarcentoj al profundegaj ŝanĝoj kaj kripligoj. Sufiĉas rememori pri homaj oferdonoj al idoloj, pri la ordono : « okulon pro okulo kaj vivon pro vivo » de l' Malnova Testamento, pri torturoj kaj ekzekutoj k. t. p. kaj kompari tiun « moralon » kun la estimo al ĉio vivanta, kiun predikis Bodisatwa, aŭ kun la pardono de ĉiuj ofendoj, kion predikis la unuaj kristanoj, por kompreni, ke la moralaj principoj submetiĝas al la sama « evoluo » kaj de temp' al tempo eĉ al kripligo, samkiel ĉio cetera.

Do, ni estas devigataj konfesi, ke se la di-

ferenco inter la moralaj konceptoj de abeloj kaj de la homo estas la rezulto de fiziologia disiĝo, — la frapanta similo inter ili en *aliaj esencaj trajtoj* montras al ni la samecon de l' origino.

Darwin venis, tiamaniere, al la konkludo, ke la sociinstinkto prezentas komunan fonton, el kiu devenis ĉiuj moralaj elementoj. Kaj li provis difini science — kio estas la instinkto.

Bedaŭrinde, la scienca psikologio de animaloj estas ankoraŭ tre malmulte disvolvita. Kaj tiel estas ekstreme malfacile analizi komplikajn rilatojn inter la propre-socia instinkto kaj la gepatraj, gefilaj kaj gefrataj instinktoj, samkiel inter diversaj aliaj instinktoj kaj kapabloj, kiel ekz. la reciproka simpatio unuflanke kaj la rezono, sperto kaj imito — aliflanke (1). Darwin plene konsciis tiun malfacilon kaj tial li sin esprimis tre singarde. « La gepatraj kaj gefilaj instinktoj kredeble ripozas sur bazo de sociinstinktoj », — li skribis. Kaj aliloke li sin esprimis jene : — « La sento de l' plezuro pro restado en socio versimile estas plilarĝigo de la gepatraj kaj gefilaj aldonitecoj, ĉar la sociinstinkto ŝajne evoluas pro la longa restado de la infanoj kun siaj gepatroj. »

Tia singardo en la esprimoj estas tute natura, ĉar aliloke Darwin montras, ke *socia*

(1) « Origino de la homo ».

*instinkto* estas *speciala instinkto,* diferenca de aliuj. La naturselekto* akcelis ĝian evoluon *pro ĝi mem,* pro ĝia utilo por la konservo kaj bonstato de la speco. Ĝi estas tia fundamenta instinkto, ke se al ĝi okazas kontraŭdiri al aliu, eĉ tiom potenca instinkto, kia estas la aldoniteco de la gepatroj al sia idaro, ĝi iafoje venkas. Tiel, ekz. la birdoj, kiam venas la tempo de ilia aŭtuna forflugo, iafoje forlasas siajn malgrandajn birdidojn, (la dua elkovaĵo), nekapablajn toleri longedaŭran transflugon, por kuniĝi al siaj kamaradoj.

Al tiu tre grava fakto mi povas aldoni, ke la sama instinkto de l' sociemo estas forte progresinta ĉe multaj malsuperaj animaloj, kiel ekz. ĉe la surtera krabo, ankaŭ inter kelkaj fiŝoj, ĉe kiuj la esprimon de tiu instinkto estas malfacile konsideri, kiel plilarĝigon de la gepatra, aŭ gefila instinkto. En tiuj kazoj mi pli inklinas vidi en ĝi la vastiĝon de l' gefrataj rilatoj aŭ de la *kamaradecaj* sentoj, kiuj kredeble disvolviĝas en ti-ĉiuj okazoj, kiam konsiderinda kvanto da junidaro eloviĝinta certatempe kaj certaloke (insektidoj, aŭ eĉ birdidoj diverspecaj) daŭrigas la vivon komune kun gepatroj, aŭ sen ili. Plej verŝajne estus pli ĝuste konsideri la sociajn kaj gepatrajn, samkiel gefratajn instinktojn kiel du intimeligitajn inter si instinktojn. La unua — socia, eble estas evoluinta pli frue, ol la dua, kaj tial ĝi estas pliforta, sed la ambaŭ estis dis-

volviĝantaj unu apud la alia en la evoluo de la animalio. La disvolviĝon de ambaŭ helpis certe la naturselekto, kiu subtenis la ekvilibron inter ili, kiam ili kontraŭis unu al la alia, kaj tiamaniere ĝi akcelis la bonon de l' tuta speco [1].

La plej grandan parton en la etiko de Darwin prezentas nature lia eksplikado* pri la morala konscio en la homo, pri lia devosento kaj skrupuloj. En la eksplikado* de tiuj sentoj pleje elmontriĝis la malforto de ĉiuj etikteorioj. Kant, kiel oni scias, en sia ĝenerale bonega verko pri la moralo tute malsukcesis pruvi — kial oni devas obei al lia kategoria imperativo, se nur ĝi ne estas la volesprimo de la supera estaĵo. Ni povas plene allasi, ke la « morala leĝo » de Kant (se iomete aliigi ĝian formuladon, konservante tamen ĝian esencon) estas *necesa konkludo de la homa racio*. Ni certe kontraŭdiras la metafizikan formon, donitan de Kant al sia leĝo, sed lastafine ĝia esenco, kiun Kant bedaŭrinde ne

---

(1) En la bonega analizo de l' socia instinkto, pĝ. 32, prof. Lloyd Morgan, la aŭtoro de bone konataj studoj pri instinkto kaj intelekto de animaloj, diras : « Al ĉidemando Kropotkin, unuanime kun Darwin kaj Espinas kredeble respondus sen hezito, ke la prafonto de sociĉelo estis la longedaŭra kunestado de la grupo de gepatroj kun ilia idaro ». Tute ĝuste. Mi nur aldonus la vortojn : « aŭ de la idaro sen gepatroj », ĉar ĉi-aldono pli bone akordiĝus kun la suprecititaj faktoj kaj ankaŭ pli ĝuste transdonus la penson de Darwin.

esprimis, estas nenialio, ol la *justo*, egala justo por ĉiuj (équité, equity) ([1]). Kaj se ni la metafizikan lingvaĵon de Kant tradukos en la lingvon de l'induktaj sciencoj, ni povas trovi la punktojn de kontakto inter lia ekspliko* pri origino de l' morala leĝo kaj la ekspliko* de naturaj sciencoj. Sed tiel la tasko estas solvata nur duone. Supozinte (por ne longigi la disputon), ke la « pura racio » de Kant, preter ĉiu observo, ĉiu sento kaj instinkto, jam sekve de siaj denaturaj kvalitoj neeviteble venas al la leĝo de la justo, simila al la « ordono » de Kant ; allasante eĉ, ke neniu pensanta estaĵo povas fari aliun konkludon — ĉar tiaj estas la denaturaj proprecoj de l' racio, — allasante ti-ĉion kaj plene rekonante la aliecigan karakteron de la Kant'a moralfilozofio, — tamen restas nesolvita la granda demando de ĉiu moraldoktrino.

« Kial la homo devas obei la moralan leĝon, aŭ la regulon, aprobatan de lia racio » ? Aŭ almenaŭ : « dekie venas tiu sento de devigo, kiun konscias la homo ? »

Kelkaj kritikistoj de l' Kant'a moralfilozofio jam indikis, ke ĝi tiun fundamentan problemon lasis nesolvita. Sed ili povus aldoni, ke li mem konfesis sian nekapablon ĝin solvi. Post kiam li dum kvar jaroj intense meditis kaj

---

([1]) En franca kaj angla lingvoj tiuj vortoj signifas samtempe : justo kaj egalo, aŭ « justo egala por ĉiuj », « justo natura, kontraŭe al justo leĝa ». TRAD.

verkis pri tiu problemo, li konfesis en sia, ial ĉiam malatentata « Filozofia teorio de Kredo » (Parto I, « Pri esenca manko de la homa naturo », 1792 j.) [1], ke *li tamen ne povis trovi klarigon de l' origino de la morala leĝo.* Fakte li rifuzis solvi ĉi-tutan problemon rekoninte la « nekoncepteblon de tiu morala kapablo, *kiu indikas la diecan originon* ». « Tiu nekoncepteblo mem, li skribis, devas entuziasmigi la homan animon kaj doni al la homo la forton por oferoj, kiujn povas postuli de li la respekto al sia devo [1]. »

Tia solvo post kvarjara medito egalas plenan rifuzon flanke de la filozofio solvi tiun taskon kaj ĝian transdonon al la religio.

Do, la intua filozofio konfesis tiamaniere sian nekapablon solvi tiun taskon. Ni rigardu do, kiel ĝin solvas Darwin el la vidpunkto de naturisto.

— Jen, diras li, estas homo, kiu cedis al la sento de sinkonservo kaj ne ekriskis sian vivon por savi la vivon de aliulo, aŭ instigate de malsato li ŝtelis ion. En ambaŭ kazoj li obeis tute naturan instinkton. Sed kial li sentas sin malkviete? Kial li nun opinias, ke li devis obei iun alian instinkton kaj konduti aliel?

— Tial, respondas Darwin, ke en la homa

---

[1] La verko de Kant « Religion innerhalb der Grenzen der blossen Vernunft », eld. Hartleben, v. VI, pĝ. 143-144.

naturo la plej rezistivaj sociaj instinktoj venkas la malpli persistajn (the more enduring social instincts conquer the less persistent instincts).

— Nia morala konscienco, daŭrigas Darwin, ĉiam havas retrospektivan karakteron. Ĝi parolas en ni, kiam ni pensas pri niaj pasintaj agoj kaj ĝi estas rezulto de l'batalo en kiu la malpli konstanta, la malpli rezista *persona* instinkto cedas antaŭ la pli konstante-propra *socia* instinkto. Ĉe animaloj ĉiam vivantaj socie la « sociaj instinktoj ĉiam ĉeestas, ĉiam funkcias ».

Tiaj animaloj ĉiuminute pretas aliĝi por defendi la grupon kaj ti-aliel helpi unu aliun. Ili sentas sin malfeliĉaj apartigite de aliuj. Kaj same la homo. La homo sen postsigno de tia instinkto estus abnormulo.

Aliflanke, la deziro forigi malsaton, lasi liberon por disvolviĝo de sia ĉagreno, eviti danĝeron, aŭ proprigi ion fremdan, — laŭ sia naturo mem estas deziro *kelktempa*, pasanta. *Ĝia kontentigo ĉiam estas malpli forta, ol la deziro mem.* Kaj kiam ni pensas pri ĝi, kiel pri pasintaĵo, ni ne povas reestigi tiun deziron kun la sama forto, kiun ĝi havis antaŭ sia kontentigo. Pro tio, se la homo kontentigante tian deziron agis spit' al sia socia instinkto kaj poste meditas pri sia ago, — kaj ni tion konstante faras, — li neeviteble venas al tio, ke li « komencos kompari la impresojn de l'pli frue spertita malsato, de la kontentigita venĝosento, aŭ de la danĝero

evitita je alies kosto kun la preskaŭ konstante-propra instinkto de l' simpatio kaj kun sia antaŭa kono pri ti-kio estas konsiderata de aliuj, kiel laŭdinda, aŭ mallaŭdinda ». Kaj tuj kiam li faros ĉi-komparon « li eksentos la samon, kion li sentas, se io malhelpas al li sekvi konstantan instinkton, aŭ kutimon. Kaj tio en ĉiuj animaloj « kaŭzas *nekontentigon* kaj eĉ igas la homon senti sin *malfeliĉa* ».

Plue Darwin montras, kiel la sugestoj de la konscienco, kiu ĉiam « rigardas en pasinton kaj servas kiel gvidilo por estonto », povas ĉe la homo ekhavi aspekton de la honto, bedaŭro, pento, aŭ eĉ kruela riproĉo, se la sento firmiĝas per la medito pri tio, kiel la ago estas juĝata de aliuj, al kiuj la homoj simpatias... Iom post iom la kutimo neeviteble komencas plifortigi ĉiam pli la potencon de l'konscienco super la agoj kaj samtempe estos akordiganta ĉiam pli kaj pli la dezirojn kaj pasiojn de l' persono kun ĝiaj sociaj simpatioj kaj instinktoj (1). La ĝenerala ĉefa malfacilo por ĉiu filozofio de l' morala sento konsistas en la

---

(1) En la piednoto Darwin kun propra al li penetremo faras tamen unu escepton. — « Malamikeco, aŭ malamo, — aldonas li, — ŝajne ankaŭ estas tre persista sento, eble pli persista, ol iu alia... Do tiu sento devas esti denaska kaj ĉiuokaze ĝi daŭras tre persiste. Videble ĝi prezentas la aldonon kaj malon de l' socia instinkto ». Tiu sento profunde radikita en animala naturo evidentmaniere eksplikas* la obstinajn militojn, kiuj okazas inter diversaj grupoj kaj specoj de ani-

ekspliko pri unuaj ĝermoj de la devosento, — pri la neceso de ekapero en la homa intelekto de l' devokoncepto, devoideo. Sed se la ekspliko estas farita, — la akumuliĝo de la sperto en la socio kaj evoluo de l' kolektiva racio klarigas ĉion ceteran.

Do, ni havas ĉe Darwin la unuan eksplikon de la devosento sur natura scienca bazo. Estas vere, ke ĝi kontraŭas al cirkulantaj konceptoj pri la naturo de la animaloj kaj de la homo, sed ĝi estas ĝusta. Preskaŭ ĉiuj ĝis nun traktintaj pri la morala principo eliradis el tute nepruvita premiso, asertante, ke la plej forta el la homaj kaj pli animalaj instinktoj estas *la instinkto de l' konservo*, kiun ili dank' al certa malprecizo de ilia terminologio identigas kun la memjesigo, aŭ kun la propre-egoismo. En tiun instinkton ili inkludis unuflanke tiajn elementajn impulsojn, kiel sindefendo, sinkonservo, aŭ eĉ kontentigo de l' malsato; kaj aliflanke — tiajn derivitajn sentojn, kiel la pasio al dominado*, avido, kolero, venĝodeziro, k. t. p. Kaj tiun absurdon, tiun diversspecan miksaĵon de instinktoj kaj sentoj ĉe animaloj kaj homoj de l'moderna kulturo, ili prezentis en la formo de ĉien-

---

maloj kaj ankaŭ de la homoj. Ĝi ankaŭ eksplikas* la samtempan ekziston de du moralaj leĝoj inter la civilizitaj homoj. Sed tiu ampleksa kaj ĝis nun ne prilaborita ekzemplo pli bone estu ekzamenota ĉe la studo pri la justoideo...

penetranta kaj ĉionpova forto, kiu renkontas nenian kontraŭagon en animala kaj homa naturo, escepte nur certan senton de bonvolo, aŭ kompato.

Nature, *se oni foje estis konfesinta, ke tia estas la naturo de la homo kaj de ĉiuj animaloj,* tiam jam restis nenialio, ol insisti pri mildiga influo de moralistoj, vokantaj al kompatemo. Estu aldonite, ke spiriton de siaj doktrinoj ili ĉerpos el la mondo, kuŝanta *ekster* la naturo, — ekster kaj super la mondo, perceptebla per niaj sentoj. Kaj la influon de siaj doktrinoj ili penas fortigi per subteno de supernaturaj fortoj. Kaj se iu rifuzis de tiuj opinioj, kiel ekz. Hobbes, — por tiu restis sole : atribui specialan signifon al la puna influo de la ŝtato, gvidata de geniaj leĝodonantoj, — kio esence reduktiĝis nur al tio, ke la sama posedo de l' « vero » estis atribuata ne al la pastro, sed al la leĝodonanto.

Komencante de la Meza Epoko la fondantoj de etikskoloj plejparte malmulte konataj kun la Naturo, ĉar al ĝia studo ili preferis tiun de la metafiziko, prezentis al si la instinkton de individua sinjesigo kiel la unua necesa ekzistkondiĉo de la animalo, samkiel de la homo. Obei al ĝiaj ordonoj — estis konsiderata kiel fundamenta naturleĝo. Malobei ĝin — venigus al plena malvenko de la speco, kaj finfine al ĝia neniigo. Kaj el tio oni konkludis, ke la homo povus batali kontraŭ egoistaj impulsoj nur kun helpo de super-

naturaj fortoj. La triumfo de la morala principo aperis tial kiel *venko de la homo super la naturo,* atingebla nur per ekstera helpo, kiu prezentas rekompencon por liaj bonaj deziroj.

Oni diris al ni, ekz., ke ne ekzistas pli alteca *virto*, ne ekzistas pli granda triumfo de l'o spirita super l'o karna, ol la sinofero por bono de la homoj. Sed en realo la sinofero por bono de formikujo, aŭ por sekuro de birdamaso, antilopa herdo aŭ por grupo de simioj estas *fakto zoologia, ĉiutage ripetiĝanta en la naturo*, por kiu en centoj kaj miloj da animalspecoj estas postulata nenialio, ol nature formiĝinta reciproka simpatio inter samspecanoj, konstanta praktikado de l'interhelpo kaj la konscio pri vivenergio en ĉiu individuo.

Darwin, kiu konis la naturon, kuraĝis diri, ke el la du instinktoj : — la socia kaj individua — *la socia estas pli forta, pli persista kaj pli konstante-propra instinkto, ol la dua.* Kaj li certe pravis. Ĉiuj naturistoj, studintaj la vivon de l'animaloj en la naturo — precipe sur la kontinentoj ankoraŭ maldense loĝataj de la homo, — sendube starus liaflanke. La instinkto de l'interhelpo efektive estas disvolvita en la tuta animalio, ĉar la naturselekto subtenas ĝin kaj senkompate ekstermas tiujn specojn, en kiuj ĝi ial malfortiĝas. En la granda batalo por la ekzisto, kondukata de ĉiu animalspeco kontraŭ mal-

favoraj al ĝi klimatkondiĉoj de l'ekstera vivmedio kaj denaturaj malamikoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, — tiuj specoj havas la plej grandajn ŝancojn postvivi, kiuj plej konsekvence praktikas la interhelpon, dum la specoj, kiuj ne faras tion — formortas. Kaj la samon ni observas en la historio de la homaro.

Estas interese rimarkigi, ke atribuante tian signifon al la socia instinkto, ni retrovenas al tio, kion estis jam kompreninta la granda fondinto de indukta scienco *Bacon*. En sia fama verko « Instauratio Magna » (« Granda renaskiĝo de Sciencoj ») Bacon skribis: « Ĉiuj vivestaĵoj havas instinkton (appetite) al duspecaj bonaĵoj: iuj el ili servas por la estulo mem, kaj la aliaj nur ti-kiom la estulo mem prezentas nur parton de iu pli granda tuto. Kaj *ĉi-lasta instinkto estas pli valora kaj pli forta ol la unua*, ĉar ĝi akcelas la konservon de la pli ampleksa. La unua estas nomebla: individua, aŭ persona bonaĵo, kaj la dua — la bono de l' komunumo... Do, ĝenerale okazas, ke la instinktoj estas regataj per la konservo de la pli ampleksa [1].

---

[1] « On the Dignity and Advancement of Learning ». V. VII. Ĉap. I, pĝ. 270. Eld. Bohn's Library. Certe la argumentoj de Bacon por pruvi liajn pensojn ne sufiĉis. Sed estas memorende, ke li nur fiksis ĝeneralajn konturojn de l'scienco, kiu estis esplorota de liaj adeptoj. La saman penson esprimis pli poste Hugo Grotius kaj kelkaj liaj pensuloj.

Aliloke Bacon revenas al la sama ideo parolante pri « du apetitoj (instinktoj) de vivestaĵoj: 1) de sinkonservo kaj defendo kaj 2) de plimultiĝo kaj plivastiĝo », kaj li aldonis: « La lasta estante aktiva videble estas *pli forta* kaj pli valora, ol la unua ». Nature, aperas la demando: ĉu konformas tia prezento pri animalio al la teorio de l' naturselekto en kiu la *porekzista batalo interne de la speco mem* estis konsiderata kiel necesa kondiĉo por apero de novaj specoj kaj por la Evoluo, t. e. por la progresiva disvolviĝo ĝenerale.

Ĉar mi detale traktis tiun problemon en la verko « La interhelpo », mi ne esploros ĝin tie ĉi refoje, sed nur aldonos jenan rimarkon: dum la unuaj jaroj post la apero de *Origino de Specoj* de Darwin ni ĉiuj inklinis pensi, ke la akra batalo por ekzistrimedoj inter samspecanoj estis necesa *por plifortigo de la modifado* kaj por aperigo de novaj variaĵoj kaj specoj. Tamen mia observado al la naturo en Siberio naskis en mi la unuajn dubojn pri ekzisto de tia akra batalo *interne de specoj*. Ĝi kontraŭe montris la grandegan signifon de l'interhelpo dum transmigroj de animaloj kaj ĝenerale por konservado de la speco. Plue, samgrade kiel la biologio penetris pli profunden en la studon de la viva naturo kaj konatiĝis kun *senpera mediinfluo, kaŭzanta modifojn en difinita direkto* (precipe en la kazoj, kiam dum siaj migradoj unu parto de la speco estas fortranĉita de la ceteraj), —

ebliĝis la kompreno pri *vivbatalo* en pli larĝa kaj pli profunda senco. Biologoj estis devigitaj konfesi, ke grupoj de animaloj ofte agas kiel tuto kaj kondukas batalon kontraŭ malfavoraj vivkondiĉoj, aŭ kontraŭ eksteraj malamikoj — ofte najbaraj specoj, *kun helpo de reciproka subteno interne de siaj grupoj*. Tiukaze akiriĝas kutimoj, kiuj malgrandigas porvivan batalon kaj samtempe kondukas al pli supera disvolviĝo de la intelekto inter tikiuj praktikas la interhelpon. La naturo abundas per similaj ekzemploj. Kaj en ĉiu animalklaso sur la pli supera evoluŝtupo staras ĝuste la plej sociemaj specoj. *La interhelpo interne de la speco*, prezentas do (kiel tion mallonge esprimis jam Kessler) *la ĉefan faktoron, la ĉefan aganton de ti-kio estas nomebla progresiva disvolviĝo*.

Tial la naturo povas esti nomita *la unua instruisto de la etiko, de la morala principo rilate al la homo*. La socia instinkto, denaska ĉe la homo, samkiel en ĉiuj sociemaj animaloj, — jen estas la fonto de ĉiuj etikaj konceptoj kaj de ĉiu sekvanta evoluo de la moralo.

La deira punkto por ĉiu studo pri moralteorio, aŭ pri etiko, estis indikita de Darwin 300 jarojn post kiam la unuaj provoj tiudirektaj estis faritaj de Bacon kaj parte de Spinoza kaj Gœthe (1). Kiam oni prenis la

(1) Vidu « Konversadoj kun Gœthe », de Eckermann.

socian instinkton kiel elirpunkton por plua disvolviĝo de moralaj sentoj, — oni povis, firmiginte tiun bazon per pluaj faktoj, konstrui sur ĝi la tutan etikon. Sed tia laboro ĝis nun ne jam estis farita.

La evoluteoriistoj, kiuj ti-ali-kaŭze tuŝis la problemon de moralo sekvis per la vojoj de la etikistoj en la antaŭa-Darwin'a kaj antaŭ-Lamarck'a periodo *kaj ne per la vojo skizita de Darwin*, — kvankam eble tro mallonge, — en « Origino de la Homo ».

Ĉi-rimarko rilatas ankaŭ al Herbert Spencer. Sen ekzameni tie-ĉi lian Etikon (tion ni faros aliloke) mi nur rimarkigu, ke sian moral-filozofion Spencer konstruis laŭ alia plano. La etika kaj sociologia partoj de lia « Sinteza filozofio » estis verkitaj multe pli frue, ol aperis Darwin'a skizo pri morala sento, parte sub influo de Aŭgusto Comte kaj parte sub tiu de Bentham'a « Utilismo » kaj de sensualistoj el la 18-a jarcento (1).

---

(1) « Donitoj de Etiko » de Spencer aperis en 1879 j. kaj lia « Justo » en 1891, t. e. longe post la apero de Darwin'a « Origino de la Homo » en 1871 j. Sed « Socia Statiko » de Spencer aperis jam en 1850 j. Spencer certe pravis, kiam li montris la diferencon inter si kaj Comte. Sed la influo, kiun havis sur lin la fondinto de l' Pozitivismo, estas nerefutebla malgraŭ profundaj diferencoj inter la pensmanieroj de la ambaŭ filozofoj. Por prezenti al si la influon de Comte sufiĉas kompari biologiajn opiniojn de Spencer kun tiuj de la franca filozofo, precipe se juĝi laŭ ilia esprimo en 3-a ĉap. de

Nur en la unuaj ĉapitroj de la « Justo » (presitaj en « Nineteenth Century » en marto kaj aprilo 1890) ni trovas ĉe Spencer mencion pri « Etiko de animaloj » kaj « sub-homa justo », al kiuj Darwin atribuis tian signifon en la evoluo de l' morala sento ĉe la homo. Estas interese, ke ĉi-tiu mencio estis per nenio ligita kun la cetera « Etiko » de Spencer, ĉar li ne konsideris primitivajn homojn — sociestaĵoj, kies societoj estus daŭrigo de gentoj kaj socioj, kutimaj ĉe la animaloj. Restante fidela al Hobbes li konsideris sovaĝulojn kiel per nenio ligitajn amasojn da homoj, fremdaj unu al aliu, inter kiuj konstante regas malamikeco kaj malpacoj. Tiuj amasoj eliras el kaosa stato nur ti-kiam iu eksterordinara homo prenos en siajn manojn la povon kaj organizos socian vivon.

Tiamaniere la ĉapitro pri animala etiko, aldonita de Spencer pliposte, estas surkonstruo en la ĝenerala sistemo de morala filozofio de Spencer kaj li ne klarigis — kial li opiniis

---

lia « Discours préliminaires », vol. I. « Politique positive ». En la etiko de Spencer la influo de Comte precipe elmontriĝas en la signifo, kiun atribuis Spencer al fiksado de la diferenco inter « milita » kaj « industria » evoluŝtupo de la homaro, samkiel en la kontraŭmeto de « egoismo » al « altruismo ». La lastan vorton Spencer uzis en tro larĝa kaj tial nesufiĉe klara senco, en kiu ĝin estis uzanta Comte, kiam li unuafoje enkondukis tiun vorton.

necesa tiupunkte fari ŝanĝon en siaj antaŭaj opinioj. Ĉiukaze la moralan senton ĉe la homo li ne prezentis kiel pluan disvolviĝon de sociemaj sentoj, kiuj estis ekzistantaj jam ĉe la prahomoj. Laŭ lia opinio ĝi aperis en la homaj socioj multe pli malfrue kaj devenis el la limigoj surmetitaj sur la homojn de iliaj politikaj, sociaj kaj religiaj gvidantoj (« Donitoj de Etiko » § 45). La koncepto pri la devo, kiel tion asertis Bain, post Hobbes, figuras ankaŭ ĉe Spencer kiel rezulto de l' devigo (coersion) flanke de provizoraj estroj dum la fruaj periodoj de la vivo homara, aŭ pli ĝuste, kiel « rememoro » pri ĝi.

Tiu supozo, — kiu ĝustadire estus malfacile konfirmebla nun per scienca esplorado, — metas sian stampon sur la tutan Etikon de Spencer. Por li la historio de l' homaro dividiĝas je du periodoj : La « milita », daŭranta ankoraŭ ĝis nun, kaj la « industria », malrapide estiĝanta nuntempe ; kaj la ambaŭ postulas sian propran moralon. Dum la batalperiodo la devigo estis pli ol necesa : sen ĝi la progreso ne estus ebla. Sur tiu evoluŝtupo de la homaro estis ankaŭ necese oferi la personecon al la socio kaj ke por tio kreiĝu speciala leĝaro de l' moralo. Tia neceso de l' ŝtatdevigo kaj de la oferado den* persono devos daŭri ĝis kiam la industria ordo plene venkos la militan. Tiamaniere Spencer konfesas du diversajn etikojn, adaptitajn al du diversaj evoluŝtupoj (« Donitoj de Etiko », §§ 48-50) kaj ĉi-tio kon-

dukas lin al vico de konkludoj, kies ĝusto estas kondiĉata de la vereco de ĉeftezo.

La doktrino pri moralaj principoj prezentas, konsekvence, serĉadon de kompromisoj, — de l'interkonsento inter la leĝoj de l' malamikeco kaj tiuj de l' amikeco, — de egaleco kaj malegaleco (§ 85). Kaj ĉar el tiu kunpuŝiĝo de du kontraŭaj principoj ekzistas neniu eliro, ĉar la veno de l' industria ordo okazos nur ti-kiam finiĝos la batalo inter ĝi kaj la milita ordo, tial dume estas eble meti en reciprokajn rilatojn de homoj certan dozon da «bonvolemo», kiu povas iom moderigi la modernan ordon, fonditan sur individuaj principoj. Pro tio lia provo science fiksi la fundamentajn principojn de l' moralo finiĝas malsukcese kaj finfine li venas al la tute neatendebla konkludo, asertante, ke ĉiuj moralteorioj — la filozofiaj samkiel la religiaj — kompletigas unu aliun. Dume la penso de Darwin estis tute mala : Darwin konfesis, ke l' origino de ĉiuj etiksistemoj kaj de ĉiuj moraldoktrinoj, inklude (inkluzive) ankaŭ la etika parto de diversaj religioj, estis la sociemo kaj la forto de l' socia instinkto, funkciantaj jam en la animalio kaj des pli ĉe la plej primitivaj gentoj, — samdume Spencer simile al Huxley, hezitas inter la teorioj de l' devigo, de l'utilismo kaj de la religio, ne trovante ekster ili alian fonton de l' moralo.

Konklude oni aldonu, ke kvankam la koncepto de Spencer pri batalo inter egoismo kaj altruismo tre similas la rilaton de Comte al

ĉi-problemo, tamen la koncepto pri la socia instinkto de la filozofo pozitivista, — malgraŭ tio, ke li neis la ŝanĝivon (variivo) de la specoj, — estis pli proksima al la koncepto de Darwin, ol tiu de Spencer. Traktante la signifon de l' sociaj kaj individuaj instinktoj Comte senhezite konfesis la superan rolon de la unuaj. En tiu ĉi konfeso li vidis eĉ la distingorajton de l' morala filozofio forlasinta teologion kaj metafizikon, sed li ne venigis ĉi-aserton al ĝia logika fino (1).

Kiel jam estis dirite pli supre, neniu el la proksimaj adeptoj de Darwin pravis plue disvolvi lian etikan filozofion. *George Romanes* kredeble estus escepto, ĉar li intencis post siaj esploroj pri intelekto de animaloj transiri al la problemoj de l' etiko ĉe animaloj kaj al eksplikado* pri origino de la morala sento. Tiucele li estis jam kolektanta faktmaterialon (2). Bedaŭre, ni lin perdis antaŭ ol li havis tempon progresi en sia laboro.

---

(1) « La pozitiva moralo, — skribis Comte, — diferencas do ne nur de la metafizika, sed ankaŭ de l'teologia per tio, ke ĝi *konfesas kiel universalan principon la superecon de sociemaj sentoj* » (*Politique positive*, Discours préliminaire, II, pĝ. 93 kaj kelkaliloke). Malfeliĉe, la genieroj disjetitaj tra la tuta « Discours préliminaire » ofte malklariĝas per la plipostaj ideoj de Comte, kiuj ne estas konsidereblaj kiel disvolviĝo de la pozitiva metodo.

(2) Li menciis pri tio en sia verko « Mensa evoluo en animaloj » (*Mental Evolution in Animals*, London, 1883, pĝ. 352).

Kio koncernas aliujn adeptojn de l' teorio de evoluo, ili ĉu venis al la konkludoj, tute diferencaj de l' opinioj de Darwin, — kiel tio okazis al Huxley, en liaj lekcioj « Evoluo kaj Etiko », — ĉu ili prenis kiel fundamenton la teorion de l' evoluo kaj laboris laŭ alia direkto. Tia estas la moralfilozofio de M. Guyau (¹), en kiu estas ekzamenataj la plej superaj elmontroj de l' moralo, sen mencio pri tiu etiko en la animalio (²). Mi opiniis tial necesa refoje ekzameni tiun-ĉi problemon en la libro « La Interhelpo kiel faktoro de l' evoluo », en kiu la instinktoj kaj la kutimoj de l' reciproka subteno estas konsiderataj kiel unu el la elementoj kaj agofortoj de l' progresiva evoluo.

Nun la samajn sociajn kutimojn ni estas ekzamenontaj el duobla vidpunkto : tiu de la hereditaj *etikaj inklinoj kaj de la etikaj instruoj*, kiujn niaj primitivaj prapatroj ĉerpis el observo de la naturo. Tial mi devas peti

---

(¹) *Essais d'une morale sans obligation ni sanction* (Studoj pri moralo sen devigo kaj sankcio).

(²) La studo de prof. L. Morgan, kiu antaŭ nelonge tute refaris sub la nova titolo (*Animals Behaviour*, London, 1900) sian antaŭan libron pri animala intelekto, ne jam estas finita kaj ĝi estas menciebla nur tial, ke ĝi promesas plenan analizon de tiu problemo, precipe el la vidpunkto de l'kompara psikologio. Aliuj verkoj tuŝantaj la saman problemon aŭ korelativaj al ĝi, precipe la bonega libro de Espinasse *Les Sociétés Animales*, estas de mi menciitaj en la antaŭparolo al mia libro « La Interhelpo ».

pardonon ĉe la leganto, se mi mallonge ripetas kelkajn faktojn, jam ekzamenitajn en mia studo pri la interhelpo — por montri ilian etikan signifon.

Esplorinte la interhelpon, kiel armilon de la speco en ĝia batalo porviva, t. e. « en la senco, en kiu ĝi gravas por la naturesploristo », — mi mallonge nun montros — kion ĝi prezentas, kiel fonto de estiĝo de etiksentoj ĉe la homo. De tiu flanko ĝi estas plena de profunda intereso por la etikfilozofio.

La prahomo vivis en proksima komuneco kun animaloj. Kun kelkaj el ili li kredeble dividis sian loĝejon sub ŝirmo de rokoj en rokaj fendoj, iafoje ankaŭ en kavernoj. Tre ofte li dividis kun ili sian nutraĵon. Antaŭ ne pli ol 150 jaroj aborigenoj de Siberio kaj Ameriko mirigis niajn naturistojn per sia perfekta kono de vivkutimoj de la plej sovaĝaj bestoj kaj birdoj. Sed la prahomo estis en ankoraŭ pli intima komuneco kun la loĝantoj de arbaroj kaj stepoj, kaj li konis ilin ankoraŭ pli bone. La masekstermado den* la vivo per arbaraj kaj herbejaj incendioj, per venenitaj sagoj k. s., tiam ankoraŭ ne komenciĝis. Kaj el frapanta, nekredebla abundo de bestoj, kiun renkontis la unuaj enmigrintoj al Ameriko kaj kiun perfekte priskribis unuaklasaj naturesploristoj, ekz. *Audubon, Izara* k. m. a., ni povas prezenti al ni la denson de animalaro sur la tero dum la frua postglacia periodo.

Do, la homo de l' frua kaj pliposta ŝton-

epoko vivis en intima komuneco kun siaj mutaj gefratoj — simile al tio, kiel *Behring* dum necesigita vintrado sur unu el insuloj apud Alasko, vivis kun sia ŝipanaro inter multenombraj herdoj de polusvulpoj, kiuj kuradis en homa tendaro, formanĝadis la provizon kaj nokte venadis mordeti eĉ la felojn, sur kiuj dormis la homoj.

Niaj primitivaj prauloj vivis inter animaloj kaj kun ili. Kaj tuj kiam ili komencis iel ajn ordigi siajn observojn al la naturo kaj transdoni ilin al sia idaro, la animaloj, ilia vivo kaj moroj liveradis ĉefan materialon por la buŝa enciklopedio de la konoj kaj de la vivsaĝo, kiu esprimiĝis en formo de popolsentencoj kaj proverboj. La psikologio de animaloj estis la unua psikologio, studita de la homo, kaj ĝis nun ĝi estas ŝatata objekto por rakontoj ĉe brulŝtiparoj en stepoj kaj arbaroj. La vivo de l' animaloj proksime ligita kun la vivo de la homo, estis ankaŭ la objekto de la unuaj ĝermoj de l' arto: ĝi inspiris unuajn gravuristojn kaj skulptistojn kaj ĝi parte konsistigas la enhavon de la plej antikvaj etikaj legendoj kaj mitoj pri la kreo de la mondo.

Nun la rakontoj pri rabobestoj, leonoj kaj tigroj estas la unuaj, pri kiuj niaj infanoj ekscias el la Zoologio. Sed la unua, kion la primitivaj sovaĝuloj devis ekscii pri la naturo, estis la fakto, ke ĝi prezentas grandegan aron de animalaj genroj kaj gentoj: la simia gento tre proksima al homo, la ĉiam-vaganta lupa

gento, ĉionscianta, babilema birdgento, la ĉiamlaboranta formika gento, k. t. p. ([1]). Por ili la animaloj estis daŭrigo, vastiĝo de ilia propra gento, — ili nur estis multe pli saĝaj, ol la homoj. La unua ĝermo de l' ĝeneraligo de la naturo, — ankoraŭ tiom nedifinita, ke ĝi apenaŭ diferencis de simpla impreso, — devis esti tio, ke *la vivulo kaj lia gento ne estas apartigitaj unu de aliu*. Ni povas ilin apartigi, sed *ili* ne povis. Estas eĉ dubinde, ĉu ili povis prezenti al si la vivon aliel, ol meze de familio, aŭ de gento.

Tiutempe devis neeviteble formiĝi ĝuste tia imago pri la naturo. En la mezo de siaj plej proksimaj parencoj — « simioj », la homo vidis centojn da specoj ([2]), loĝantaj en grandaj societoj, kie la anoj de ĉiu societo estis proksime ligitaj inter si. Li vidis kiel simioj subtenas unu aliun dum akirado de nutraĵo, kiel singarde ili migras de loko al loko, kiel ili kuniĝas kontraŭ komunaj malamikoj, kiel ili faras unu al aliu malgrandajn komplezojn, ekz. tirante dornojn kaj pikaĵojn, kiuj trafis en la felon de kamarado, kiel ili dense amasiĝas dum malvarma vetero, k. t. p. Certe, simioj ofte malpacis inter si. Sed en iliaj malpacoj estis, kiel ankaŭ okazas nun, pli multe

---

([1]) *Kipling* bonege komprenis tion, laŭ lia rakonto pri Maugli.

([2]) En la terciara periodo ili estis komputeblaj, laŭ spertaj geologoj, ĝis mil diversaj specoj.

da bruo, ol da domaĝoj. Kontraŭe, iafoje dum danĝermomentoj ili elmontris mirindajn sentojn de reciproka alligiteco, jam ne menciante pri la alligiteco de la patrino al siaj idoj kaj de la maljunaj viruloj al sia grupo. Do la sociemo estis la distingorajto de la tuta gento simia. Kaj se nun ekzistas du nesociemaj specoj de grandaj simioj — gorilo kaj orangutango — loĝantaj nur en malgrandaj familioj tamen la fakto mem, ke ĉiu el tiuj du specoj, okupas tre malgrandan teritorion, montras, ke ili estas formortantaj specoj : eble tial formortantaj, ke la homo kondukis kruelan militon kontraŭ ili, kiel kontraŭ la specoj, tro proksimaj al la homo.

La primitiva sovaĝulo vivis kaj sciis krome, ke eĉ la rabuloj rekonas unu ĝeneralan leĝon, *ili neniam mortigas unu aliun*. Kelkaj el ili estas tre sociemaj, — tia estas la tuta hunda gento : ŝakaloj, sovaĝaj hundoj de Hindio kaj hienoj.

Aliuj vivas en malgrandaj familioj. Kaj eĉ inter ili la plej inteligentaj, kiel la leono kaj leopardoj kolektiĝas por ĉasi simile al hundaj gentoj [1]. Kio rilatas al tiuj malmultaj, kiuj vivas — almenaŭ nuntempe — tute dise, kiel la tigroj, aŭ per malgrandaj familioj, — la

---

[1] Sur unu fotografaĵo, farita momente sub la lumo de magnezio, estas videble, ke nokte al la trinkejoj, kie amase kunvenas ĉiuspecaj animaloj, la leonoj venas pogrupe.

sama regulo validas ankaŭ por ili : ili ne mortigas unu aliun. Eĉ nun, kiam ne plu ekzistas la sennombraj herdoj, iam loĝintaj sur herbostepoj, kaj tigroj, devigataj sin nutri per malsovaĝaj herdoj de la homo, loĝas tial proksime de vilaĝoj, — eĉ nun ni scias de hindaj kamparanoj, ke ĉiu tigro sin limigas per sia ĉasregiono, ne militante inter propra gento. Krome, estas tre kredeble, ke eĉ tiuj malmultaj specoj, kies individuoj vivas izole nuntempe, kiel tigroj, malgrandaj katrasoj (preskaŭ ĉiuj ili estas noktanimaloj), ursoj, familio de musteloj, vulpoj, erinacoj kaj kelkaliuj, — eĉ tiuj ĉi specoj ne ĉiam loĝis unuope. Por kelkaj el ili (vulpoj, lupoj) mi trovis pozitivajn atestojn, ke ili restis sociemaj ĝis kiam la homo komencis ilin ekstermadi. Kelkaliuj eĉ ĝis nun vivas socie en neloĝataj dezertoj. Do, ni havas plenan rajton opinii, ke preskaŭ ĉiuj ili iam estis vivantaj socie [1]. Sed se eĉ ĉiam estus ekzistintaj kelkaj ne sociemaj specoj, ni tamen povas kun certo aserti, ke tiaj specoj prezentis escepton el la ĝenerala regulo.

La leciono de la naturo konsistis do el tio, ke eĉ la plej fortaj bestoj estis devigitaj vivi kune. Kiu almenaŭ unufoje en sia vivo havis okazon vidi atakon, ekz. de sovaĝaj hindiaj

---

[1] Vidu « La Interhelpo », ĉap. I kaj II kaj Suplementoj. Multe da novaj faktoj por pruvi la saman penson mi kolektis post apero de tiu-ĉi verko.

hundoj kontraŭ grandaj fortaj rabuloj, tiu certe tuj kaj por ĉiam komprenis la forton de genta unuiĝo kaj tiun fidon al siaj fortoj kaj kuraĝo, kiujn la unuiĝo donas al ĉiu individuo.

En stepoj kaj arbaroj niaj primitivaj antaŭuloj vidis milionojn da animaloj, kiuj kolektiĝis en grandajn sociojn, — gentojn kaj familiarojn. Sennombraj herdoj de kapreoloj, polusaj cervoj, antilopoj, grandegaj bubalherdoj kaj sennombraj herdoj de sovaĝaj ĉevaloj, sovaĝaj azenoj, kvagoj, zebroj, k. t. p. migris tra la senfinaj stepoj kaj ofte paŝtiĝis ĉie kune, kiel ankoraŭ antaŭnelonge tion observis vojaĝantoj en Mezafriko, kie ĝirafoj, gazeloj kaj antilopoj sin paŝtis flank' al flanke. Eĉ sur la sekaj montebenaĵoj de Azio kaj Ameriko troviĝis herdoj de lamoj, aŭ de sovaĝaj kameloj kaj sur Tibeta montaro kune rifuĝis tutaj familiaroj de nigraj ursoj. Kaj kiam la homo estis pli bone ekkonanta la vivon de tiuj ĉi animaloj li baldaŭ eksciadis kiel intime ili estas ligitaj inter si. Eĉ ti-kiam ili videble estas tute okupitaj per la nutrado kaj ŝajne tute ne atentis pri kio okazas ĉirkaŭe, ili atente observadis unu aliun — ĉiam pretaj unuiĝi en iu komuna ago. La homo ankaŭ vidis, ke tra la tuta cerva aŭ kapra gento, ĉu ili sin paŝtas, ĉu amuzas sin per ludoj, ili ĉiam havas gardostarantojn, kiuj ne ekdormas eĉ por minuto kaj tuj signalas, se proksimiĝas danĝera rabulo. Li ankaŭ sciis, ke en la okazo de subita atako viruloj kaj inoj faras rondon

ĉirkaŭ sia idaro kaj renkontas la malamikon vid-al-vide riskante esti disŝiritaj, sed savante sian ankoraŭ senhelpan idaron. Li sciis, ke la saman taktikon sekvas animalherdoj ĉe la retroeniĝo (retiriĝo).

La primitiva homo sciis ĉion-ĉi, kion ni ne scias kaj tiel volonte forgesas. Kaj li rakontadis pri ĉiuj heroaĵoj de la animaloj en siaj fabeloj, ornamante ilian kuraĝon kaj sinoferemon per primitiva poezio kaj *imitante ilin* en siaj religiritoj, — nun malĝuste nomataj « dancoj ».

Des malpli oni povas supozi, ke la primitiva sovaĝulo ne sciis pri grandaj migradoj de animaloj. Li eĉ sekvis ilin, kiel tion nun faras ĉukĉoj, kiuj sekvante post sovaĝaj cervoherdoj, siavice pelataj de kularo transmigras el unu parto de Ĉukĉa duoninsulo en la alian, aŭ kiel lapo, kiu sekvas herdojn de duonsovaĝaj cervoj en iliaj de li nedependaj migradoj. Kaj se ni kun nia perlibra klero kaj nekonado de l' naturo neniel povas komprenigi al ni — kiamaniere la animaloj distritaj pogrupe sur grandega teritorio, sukcesus kolektiĝi milope en certa loko por transnaĝi riveron (kiel mi tion observis ĉe Amur), aŭ por ekiri norden, suden, aŭ okcidenten, — niaj antaŭuloj, kiuj konsideris la animalojn pli saĝaj ol sin mem, neniom miris pri tiuj kolektiĝoj, samkiel nun pri ili ne miras la sovaĝuloj. Por ili ĉiuj animaloj — bestoj, birdoj kaj fiŝoj — troviĝas en konstanta interrilatado. Ili avertas

unu-aliun per apenaŭ rimarkeblaj signoj, aŭ sonoj. Ili informas unu aliun pri ĉiuspecaj okazintaĵoj kaj tiamaniere prezentas unu grandegan asocion, kiu havas siajn morojn de l'ĝenerala konduto kaj de la bona najbareco. Eĉ ĝis nun la profundaj postsignoj de tia kompreno pri la animalvivo konserviĝis en fabeloj kaj proverboj de ĉiuj popoloj.

De la dense loĝitaj, viglaj kaj gajaj kolonioj de marmotoj, zizeloj, ĝerbosoj (terleporoj) k. t. p. kaj de la kastorkolonioj, kiuj loĝigis la riverojn en la postglacia periodo, la primitiva homo, — tiam mem estinte ankoraŭ nomadulo, — povis ekkoni ĉiujn preferojn de fiksloĝo, fortika rifuĝejo kaj de la kunopa laboro. Eĉ nun ni observas (mi vidis tion antaŭ 50 jaroj en Transbajkalio), ke la nomadaj brutbredistoj, — kies neantaŭzorgemo estas miriga, — ekscias de ĝerbosoj (Tamias striatus) la avantaĝon de l'terkulturo kaj de l'provizemo, ĉar ĉiuaŭtune ili rabas el liaj subteraj deponejoj kaj alproprigas liajn provizojn de manĝeblaj bulboj. Darwin mencias pri sovaĝuloj, kiuj en jaroj de malsato lernis de pavianoj — kiaj arbo- kaj arbusto-fruktoj povas servi kiel akcesora nutraĵo. Estas eksterdube, ke la tenejoj de malgrandaj mordetuloj (skrapmanĝuloj) kun provizoj de ĉiuspecaj manĝeblaj semoj estis aperigintaj de la homo la unuan penson pri grenkulturo. Kaj efektive la sanktaj libroj de l'Oriento enhavas sufiĉe multe da mencioj pri provizemo kaj laboremo

de animaloj kaj metas ilin kiel modelon por la homo.

La birdoj siavice, — preskaŭ ĉiuj birdspecoj, — instruis al niaj malproksimaj prauloj pri la plej intima sociemo, pri ties ĝojoj kaj pri grandegaj profitoj de ĝi prezentataj. La grandaj unuiĝoj de anasoj, anseroj kaj de diversaj aliaj stilzbirdoj per komunaga repuŝo defende al siaj idoj kaj ovoj konstante instruis la homon. Kaj aŭtune la homoj, kiuj mem vivis en arbaroj kaj arbaraj riveretoj certe povis observi la vivon de junaj birdkovitaroj, kiuj kolektiĝas aŭtune en grandaj amasoj por sin komune nutri dum nelonga tagoparto kaj la ceteran tempon pasigi en komuna pepado kaj ludado[1]. Kiu scias, — ĉu ne el tiuj aŭtunaj ariĝoj ekĝermis la penso mem pri aŭtunaj kolektiĝoj de la tutaj gentoj por komuna ĉasado (*aba* ĉe la mongoloj, *kada* ĉe la tunguzoj), kiuj daŭras unu aŭ du monatojn kaj prezentas festojn por la tuta gento, samtempe firmigante la gentan parencecon kaj federitajn unuiĝojn.

La homo sciis ankaŭ pri la ludoj, tiel ŝatataj de kelkaj animalrasoj, pri ilia sporto, iliaj koncertoj kaj dancoj (Vidu « La Interhelpo » Suplementoj), pri iliaj vesperaj grupflugoj. Li estis konata kun bruaj kunvenoj de hirundoj kaj de aliaj migrobirdoj, aranĝataj

---

(1) Pri tiuj ariĝoj menciis interalie la konata zoologo, prof. Kessler kaj ĉiuj *prikampaj* zoologoj.

en niaj regionoj ĉiuaŭtune jar-post-jaro sur la sama loko, antaŭ ol entrepreni sian malproksiman migradon al la sudo. Kaj kiel ofte staris la homo en mirego vidante nekredeble grandegajn armeojn de l' migrobirdoj, kiuj dum tutaj tagoj flugpasadis super lia kapo, aŭ sennombrajn milojn da bubaloj, cervoj, aŭ marmotoj, kiuj baris al li la vojon kaj haltigis lin iafoje dum pluraj tagoj per siaj densaj kolonoj, rapidantaj norden aŭ suden.

La « bestosimila sovaĝulo » estis konata kun ĉiuj-ĉi belaĵoj de l' naturo, forgesitaj en niaj urboj kaj universitatoj. Li konis tiujn belaĵojn de la vivo, pri kiuj ne ekzistas eĉ unu mencio en niaj mortaj lernolibroj de l' naturhistorio, samdume la raportoj de niaj eminentaj naturesploristoj *Audubon, Humboldt, Asara, Brehm, Severcov,* k. m. a. ŝimkovriĝas en bibliotekoj.

En tiuj tempoj la granda mondo de fluantaj akvoj kaj lagoj ankaŭ ne prezentis por la homo libron kun sep sigeloj. Li estis bone konata kun iliaj loĝantoj. Eĉ nun, ekz. la duonsovaĝaj loĝantoj de Afriko sentas profundan respekton al la krokodilo. Ili konsideras ĝin proksima parenco, preskaŭ ia praavo de la homo. En interparoloj ili evitas rekte nomi ĝin kaj se ili bezonas ĝin mencii ili nomas krokodilon « maljuna avo », aŭ per iu alia nomo, esprimanta parencecon kaj estimon. La krokodilo, ili diras, agas ĉiam, kiel ili mem. Ĝi neniam glutas sian nutraĵon sen esti invitinta

siajn parencojn kaj amikojn por dividi ĝin, kaj se iu homo mortigos krokodilon ne kaŭze de laŭleĝa sangvenĝo, tiam la sovaĝuloj kredas, ke la parencoj de l' mortigita krokodilo nepre plenumos la tribrevenĝon kontraŭ iu samgentano de la mortiginto. Tial se krokodilo formanĝis negron, la parencoj de l' formanĝita negro per ĉiuj fortoj penas mortigi ĝuste tiun krokodilon, kiu estas formanĝinta ilian parencon, ĉar ili timas mortigi senkulpan krokodilon, por ne kaŭzi per tio revenĝon de ĝiaj parencoj. Kaj tial la negroj mortiginte, laŭ ilia opinio, kulpan krokodilon zorge esploras la internaĵojn de l'mortigita animalo kun la celo trovi en ĝia stomako restaĵojn de ilia parenco kaj per tio certiĝis, ke ili efektive ne estas erarintaj kaj ke ĝuste tiu ĉi krokodilo estas mortigenda. Sed se ili trovas neniajn kulposignojn ĉe la mortigito, ili plenumas diversajn pentofarojn por senkulpiĝi antaŭ la parencoj de l'mortigita animalo kaj ili daŭrigas serĉi la veran kulpulon. Aliel la parencoj de l' mortigito venĝos kontraŭ ilia gento. Samaj popolkredoj ekzistas ankaŭ ĉe la ruĝhaŭtaj indianoj rilate al la krotalo (sonserpento) kaj la lupo, ĉe ostjakoj rilate al la urso, k. t. p. La signifo de ĉi-popolkredoj por formiĝo de la pliposta justokoncepto estas evidenta (1).

---

(1) Estus vere domaĝe, se la elokventaj faktoj pri la animalmoralo, kolektitaj de *Romanes* restus neeldonitaj.

La fiŝaroj, iliaj lokŝanĝoj en la diafanaj akvoj kaj la antaŭesploro de skoltoj antaŭ ol la tuta aro ekmoviĝos al certa loko, — ĉio-ĉi devis depost la frutempo mirigi la intelekton de la homo. La postsignojn de tia impreso ni trovas ĝis nun en la popolrakontoj de sovaĝuloj en multaj lokoj. Tiel, ekz. la legendo diras pri Dekanavido, al kiu la ruĝhaŭtaj indianoj atribuas la kreon de sia triborganizaĵo. Li antaŭ ĉio sin izoligis de la homoj por pripensi ĉion ĉe la sino de l'naturo. Li venis al la bordo de pura travidebla rivereto plena da fiŝoj. Li eksidis apoginte sin kontraŭ la kruta bordo kaj fikse rigardis la akvon, kie fiŝoj ludis « en plena interkonsento »... Kaj tie-ĉi al li venis en la kapon la penso : dividi sian popolon je triboj kaj klasoj, aŭ totemoj (1).

En aliaj legendoj la saĝulo de certa gento akiras la sperton de kastoro, de sciuro aŭ de iu birdo.

Ĝenerale por la primitiva homo la animaloj prezentiĝas kiel misteraj, enigmaj estaĵoj, kiuj havas grandegan konon pri la naturvivo. Ili scias multe pli, ol ili diras al ni. Tiel, aŭ aliel, dank'al siaj sentoj, multe pli subtilaj ol la niaj kaj dank'al tio, ke ili konstante informas unu aliun pri ĉio, kion ili rimarkas dum siaj konstantaj serĉadoj kaj flugadoj, ili

---

(1) Brandt-Sero : Dekanaviden (En la revuo *Man*, 1901, pĝ. 166).

scias pri ti-kio okazas je multaj kilometroj ĉirkaŭe. Kaj se iu homo en siaj rilatoj kun ili ne permesis al si malveron kaj ruzon, — ili avertas lin pri la danĝero, samkiel ili avertas unu aliun. Sed ili tute lin malatentas se li estis « ne verema » en sia konduto. La serpentoj kaj birdoj (la strigon oni kredas esti gvidanto de serpentoj), la bestoj kaj insektoj, la lacertoj kaj fiŝoj — ĉiuj komprenas unu aliun kaj konstante informas unu al aliu siajn observojn. Ili ĉiuj apartenas al unu frataro, en kiun ili iafoje akceptas la homon.

Meze de tiu frataro ekzistas, certe, pli intimaj fratgrupoj de estaĵoj « samsangaj ». Simioj, ursoj, lupoj, elefantoj kaj rinoceroj, la plejparto de la remaĉuloj, leporoj kaj la plejmnlto da mordetuloj (skrapmanĝuloj), krokodiloj, k. t. p. bonege konas siajn gentojn kaj ne permesas, ke iu el iliaj genroparencoj estu mortigita de la homo, sen plenumi « honestan venĝon ». Tiu-ĉi rigardo devis formiĝi en tre malproksima tempo, — ti-kiam la homo ne jam fariĝis ĉionmanĝanta kaj ne ĉasis birdojn kaj mambestojn por sin nutri. Li fariĝis ĉionmanĝa plej verŝajne dum la glaciepoko, kiam la plantoj pereadis pro la ĉiam pli kaj pli vastiĝanta minaca malvarmo. Sed ĉi-rigardo konserviĝis ĝis nun. Eĉ nun la sovaĝulo dum ĉasado estas devigata plenumi certajn regulojn rilate al la animaloj kaj post fino de l' ĉasado li devas fari certajn redemptajn (elaĉetajn) ceremoniojn. Kelkaj el tiuj ceremonioj estas

nun ankaŭ tre rigore plenumataj, precipe rilate al la animaloj, konsiderataj kiel liganoj kun la homo, ekz. al la urso (ĉe Amur' aj oroĉonoj).

Estas sciate, ke du homoj, apartenantaj al du diversaj triboj, povas interfratiĝi, miksinte la sangon de l' ambaŭ, kiun oni estis ricevinta el malgranda, tiucele intence farita vundo. La sangfratiĝo estis ago tute kutima en la antikvo kaj ni scias el fabeloj kaj legendoj de ĉiuj popoloj, precipe el skandinavaj sageoj, kiel sankte estis plenumata tia kontrakto. Sed similaj kontraktoj estis tute kutimaj inter la homo kaj diversaj animaloj. La fabeloj konstante rakontas pri ili. Ekz., la animalo vidante, ke ĉasisto estas mortigonta ĝin, petas ne fari tion. La ĉasisto konsentas, kaj la ambaŭ fariĝas fratoj. Kaj tiam la simio, urso, kapreolo, aŭ birdo, krokodilo, aŭ eĉ abelo (ajna animalo, vivanta socie) zorgas pri la homofrato, en krizaj minutoj de lia vivo, kaj sendas siajn kunfratojn el sia propra, aŭ el aliuj gentoj por helpi lin. Kaj se la averto venis tro malfrue, aŭ estis miskompreninta, kaj la homo pereis, — ĉiuj ĉi animaloj kaj animaletoj penas revivigi lin. Kaj se tio ne sukcesas, tiam ili almenaŭ prenas sur sin la sangrevenĝon kiel se li estus apartenanta al ilia propra gento.

Dum miaj vojaĝoj en Siberio mi ofte rimarkis kiel zorge tunguzo, aŭ mongolo evitas vane mortigi animalon. La kaŭzo estas, ke la sovaĝulo respektas ĉiun vivon. Tiel estis, ĉiu-

okaze, antaŭ, ol li ekrilatis kun eŭropanoj. Se li mortigas animalon, li tion faras por sin nutri, aŭ vesti. Sed li ne ekstermas la vivon pro simpla amuzo, aŭ pro la pasio al detruado. Estas vere, ke ĝuste tiel agis la ruĝhaŭtaj indianoj kontraŭ la bubaloj, sed tio okazis jam post longa interkontakto kun blankuloj kaj post kiam ili ricevis de la lastaj la karabenon kaj rapidpafan revolveron. Certe, ankaŭ inter bestoj ekzistas tiuj konsiderataj kiel malamikoj de la homo — ekz. hienoj, aŭ tigro. Sed ĝenerale al la tuta animalmondo la sovaĝuloj rilatas mem kaj kutimigas siajn infanojn rilati kun estimo.

La ideo pri «justo», komprenata komence kiel venĝo, estas ligita tiamaniere kun la observado super animaloj. Sed estas tre verŝajne, ke la mem ideo pri rekompenco kaj venĝo por «justa», aŭ «nejusta» rilato aperis ĉe primitivaj homoj el la penso, ke la bestoj venĝas al la homo, se li ne dece ilin traktis. Ĉi-tiu ideo estas tiel profunde enigita en la mensoj de sovaĝuloj sur la tuta terglobo, ke oni devas ĝin konsideri kiel unu el la fundamentaj konceptoj de l'homaro. Iom post iom tiu koncepto evoluis en la komprenon pri la grandoza tuto, kunigita per certaj ligiloj de l'interhelpo. Ĝi — tiu grandoza tuto — observas ĉiujn agojn de ĉiuj vivuloj kaj kaŭze de la nomita reciprokeco en la tuta mondo ĝi prenas sur sin la venĝon kontraŭ malbona konduto.

El tiu ideo devenus la koncepto pri Eŭ-

menidoj kaj pri Mojro ĉe la grekoj, pri Parcoj ĉe la romanoj kaj pri Karmo ĉe la hindoj. La greka legendo pri Ibikaj gruoj, liganta en unu tuton la mondon de la homo kun tiu de la birdoj kaj multegaj orientaj legendoj konsistigas la poeziajn enkorpiĝojn de la sama koncepto. Pli poste ĝi ampleksis ankaŭ la ĉielajn fenomenojn. La nuboj, se juĝi laŭ la plej antikvaj sanktaj libroj de Hindio, t. e. Veda'o, estis konsiderataj vivantuloj, similaj al la animaloj.

Jen kion vidis en la naturo la primitiva homo, jen kion li lernis de ĝi. Kun nia skolasta klero, kiu konsekvence ne volis koni la naturon kaj provis eskpliki* la plej ordinarajn faktojn de la vivo, ĉu per superstiĉoj, ĉu per metafizikaj subtilaĵoj, ni komencas forgesi tiun grandan lecionon. Sed por niaj prapatroj en la ŝtonepoko la sociemo kaj reciproka helpo *eninter la gento* estis konsiderendaj tiom ordinara naturfenomeno, tiom ĝenerala, ke ili eĉ ne povis imagi al si la vivon aliforme.

La koncepto pri la homo, kiel pri soleca estaĵo estas la pli posta produkto de l' civilizo, la produkto de l' legendoj, kreitaj en la Oriento inter la homoj, izoliĝantaj de la socio. Sed la evoluigo de tiu abstrakta koncepto en la homaro bezonis longajn jarcentojn. Kaj por la primitiva homo la vivo de l' soleca estaĵo ŝajnas tiom stranga, tiom neordinara en la naturo, tiom kontraŭnatura, ke kiam li vidas tigron, melon, aŭ sorikon, kiuj vivas solece, eĉ kiam

li vidas árbon, kreskantan solece, malapud la arbaro, li kreas legendon, mirrakonton por klarigi al si tian strangan fenomenon. Li ne kreas legendojn, por ekspliki* la vivon persocian, sed li nepre ilin verkas por klarigi ĉiun kazon de l' soleca vivo. Plejmultkaze, se la ermito ne estas saĝulo, kiu por kelka tempo foriris de l' socio por primediti ĝian sorton, aŭ se li ne estas sorĉisto, — tiam ĝi estas « ekzilito », forpelita de la animaloj el sia medio pro iu grava rompo de la socimoroj. Li faris ion, tiagrade kontraŭan al la ordinara vivarango, ke oni lin forpelis el sia socimedio. Tre ofte li estas sorĉisto, reganta super ĉiuj malbonaj fortoj, kaj li havas iun rilaton al la kadavroj, kiuj disportas infekton. Jen kiel li vagas dum noktoj sekvante siajn malicajn celojn sub la kovrilo de l' mallumo.

Ĉiuj ceteraj vivestaĵoj vivas socie, kaj la penso de l' homo laboras tiudirekte. La socia vivo, t. e. *ni*, sed ne *mi*, — jen estas la natura vivordo. *Ĝi estas la vivo mem.* Tial, « ni » devis esti ordinara pensmaniero de l' primitiva homo, — « la kategorio » de lia intelekto, kiel estus dirinta Kant.

En tiu identigo, — oni povas eĉ diri en tiu absorbiĝo de « mi » en ĝia familio kaj gento kuŝas la ĝermo de la tuta etika pensado pri la moralo. La memjesigo de l' « persono » venis multe pli malfrue. Eĉ nun en la psiko de l' primitivaj sovaĝuloj la « persono », l' « individuo » preskaŭ ne ekzistas. En iliaj mensoj

la ĉefan lokon okupas familiaro kun ĝiaj firme fiksitaj moroj, superstiĉoj, miskredoj, malpermesoj, kutimoj kaj interesoj.

En tiu-ĉi konstanta identigo de l' unuo kun la tuto sin trovas la origino de l' tuta etiko. El ĝi evoluis ĉiuj sekvintaj ideoj de la *justo* kaj ankoraŭ pli altaj ideoj *pri moralo*.

Ĉi-pluajn paŝojn mi analizos en la sekvantaj ĉapitroj.

## ĈAPITRO KVARA

### La moralaj konceptoj ĉe primitivaj popoloj.

*La evoluo de l'socia instinkto ĉe sovaĝuloj. — La dueca karaktero de l'moralaj postuloj ĉe sovaĝaj popoloj. — Kelkaj el ili estas* devigaj, *dume la plenumo de aliuj estas nur* dezirata. — *Metodoj de sociefiko kontraŭ aparta homo inter sovaĝuloj en okazo de malobeo al devigaj postuloj. — Establo de kutimoj kaj moroj (mœurs), utilaj al la socio. Triborganizo kaj tribjusto. — Divido de la socio je klasoj kaj statoj kaj tendenco de apartaj grupoj al la povo kaj sinjorado super aliuj. — La evoluo de primitivaj moralkonceptoj. — Neceso de la studo pri tiu evoluo kaj difino de la bazprincipoj de la etiko.*

La sukcesoj de l'natursciencoj en la 19-a jarcento vekis en niaj modernaj pensuloj la deziron krei novan etikon sur pozitivaj principoj. Fiksinte la principaron de la mondfilozofio, liberigita de la hipotezoj pri supernaturaj fortoj, sed samtempe majesta, poezia kaj kapabla inspiri al la homo la plej sublimajn impulsojn, — la moderna scienco jam ne plu bezonas serĉi en supernaturaj sugestoj la pravigon por siaj idealoj de la morala belo. Krome, la scienco antaŭvidas, ke proksimtempe la

homa socio, kiu dank' al la sukcesoj de l'scienco estos liberigita el la mizero de la antaŭaj jarcentoj kaj konstruita sur la principoj de la egaljusto por ĉiuj kaj de la interhelpo, povos garantii al la homo liberan esprimon de lia intelekta kaj arta kreado. Kaj tiu prognozo malkovras tiajn grandajn moralajn poveblojn en estonto, ke por ilia realigo jam ne estas bezonata la influo de supernatura mondo, nek la timo de l' postmorta puno. Do estas necesa nova etiko, bazita sur novaj principoj. La unuan ĉapitron de nia studo ni estis dediĉintaj ĝuste por klarigi la neceson de tiu bezono.

La moderna scienco vekiĝinte post kelktempa stagno, en la fino de l' kvindekaj jaroj de l' 19-a jarcento, jam preparis materialojn por kreado de tia nova racia etiko. En la verkoj de *Jodl, Wundt, Paulsen,* k. m. a. ni trovas bonegajn revuojn de ĉiuj antaŭaj provoj bazi la etikon sur diversaj principoj — religiaj, metafizikaj kaj natursciencaj. Kaj en la daŭro de la tuta deknaŭa jarcento estis faritaj multaj aliaj provoj por trovi la bazprincipon de l'morala naturo de la homo en la prudenta egoismo kaj amo al la homaro (*Aŭgusto Comte* kaj liaj adeptoj), en la reciproka simpatio kaj la mensa sinidentigo kun la homaro (*Schopenhauer*) en la utileco (utilismo de *Bentham* kaj *Mill*) kaj en la teorio de malvolviĝo, t. e. de evoluo (*Darwin, Spencer* kaj *Guyau*).

La bazoŝtonon de ĉi-lasta etiko metis *Darwin*. Li faris provon dedukti pri la deveno de la bazprincipo de l' morala sento el la soci-instinkto, kiu estas profunde denatura en ĉiuj sociemaj animaloj. Kaj ĉar la plimulto da etikistoj estis malatentinta tiun provon kaj la plimulto da darwinanoj mem estis ĝin prisilentinta, pro tio mi detale esploris ĝin en la dua ĉapitro: « La morala elemento en la Naturo ». Ke la soci-instinkto estas larĝe vastiĝinta ĉe la grandega plimulto da animaloj el ĉiuj klasoj kaj grupoj, — mi tion indikis jam en la libro pri « Interhelpo ». Jam en la dua ĉapitro ni vidis, kiel la primitivaj homoj de l' glacia aŭ de l' frua postglacia epoko estis lernontaj la sociecon kaj ĝian etikon ĉe la animaloj, kun kiuj ili vivis tiam en intima kontakto kaj kiel efektive en siaj plej unuaj fabeloj kaj legendoj la homo transdonis de generacio al generacio praktikajn instruojn, kiujn li ĉerpis el la kono de l' animala vivo.

La unua instruisto de l' moralo por la homo estis tiamaniere la naturo mem, — ne tiu naturo, kiun priskribis sen koni ĝin la kabinetaj filozofoj, aŭ la naturesploristoj, studintaj la naturon nur laŭ la mortaj modeloj en muzeoj, sed tiu naturo, meze de kiu vivis kaj laboris sur la amerika kontinento (tiam ankoraŭ malmulte homloĝita), en Afriko kaj Azio la grandaj fondintoj de l' priskriba Zoologio: *Audubon, Asara, Wied, Brehm,* k. a.,

unuvorte la naturo pri kiu pensis Darwin, kiam li donis en la libro *Origino de la Homo* mallongan skizon pri la ĝermiĝo de l' morala sento ĉe la homoj.

Sen ia dubo la instinkto de l' sociemo, heredita de la homo kaj tial profunde radikiĝinta en li, nur poste evoluis kaj fortikiĝis eĉ malgraŭ la malfacila porekzista lukto. Kaj mi montris en la sama verko pri la interhelpo, — ĉiam bazite sur la laboroj de la kompetentaj esploristoj, — kiagrade estas evoluinta la sociemo de l' sovaĝuloj kaj samtempe la sento de l' egalrajto ĉe la plej primitivaj reprezentantoj de l'homa speco. Same mi montris, kiel dank' al ĝi povis evolui la homaj socioj malgraŭ tuta malfacilo de ilia vivo meze de sovaĝa naturo.

Tial, atentigante la leganton pri la « Interhelpo », mi provos esplori nun — kiel evoluis en socioj de primitivaj sovaĝuloj la pluaj moralkonceptoj kaj kian karakteron ili donis al plua evoluo de l' moralo.

Ni nenion scias pri la vivo de la plej primitivaj homestaĵoj en glaciepoko kaj en la fino de l' terciara epoko, escepte nur, ke ili vivis en malgrandaj socioj kaj pene akiradis el lagoj kaj arbaroj mizerajn nutrorimedojn, preparante por tio armilaron el ostoj kaj ŝtonoj.

Sed jam en tia vivo la primitiva homo devis kutimiĝi identigi sian « mi » kun la socia « ni » kaj formis tiamaniere la komencajn

principojn de l' moralo. Li lernis pensi pri sia tribo, kiel pri tuto, kies parto li estas, kaj neniel plej grava parto, ĉar li vidis, kiom malsignifa estus li antaŭ la teruriga, severa naturo, se li ĉesus esti ero de la tribo. Li estis kaŭze de tio kutimanta limigi sian volon per la volo de aliuj, kaj tio estas la fundamento de ĉiu moralo. Efektive, ni scias, ke la plej primitivaj homoj de l' glacia kaj plifrua postglacia, t. e. Lagepoko jam vivis socie — en kavernoj, en rokfendoj aŭ sub la superpendantaj rokoj, kaj ke ili kune ĉasis kaj fiŝkaptis per siaj primitivaj instrumentoj. Sed la kunvivo kaj la kunlaboro jam supozigas la ekziston de certaj reguloj de la socimoralo.

Tia « edukado » de l' primitiva homo daŭris dum dekmiloj da jaroj kaj tiel formiĝadis la sociema instinkto kaj kun la daŭro de l' tempo ĝi fariĝis pli forta, ol ajna memama konsidero. La homo kutimis pensi pri sia « Mi » ne aliel, ol per la ideo pri sia grupo. La altedukivan signifon de tia pensmaniero ni vidos poste (1).

(1) Ĉiu pensado, kiel ĝuste rimarkigis Fouillée, havas la tendencon fariĝi ĉiam pli kaj pli objektiva, t. e. rezigni de personecaj konsideroj kaj poiome transiri de ili al konsideroj ĝeneralaj (Fouillée, *Critique des systèmes de morale contemporaine,* Paris 1883, pĝ. 18). Per tiu vojo iom post iom formiĝas socia idealo, t. e. la imago pri ebla plibono.

Jam en la animalio ni vidas, kiel la persona volo de apartaj individuoj kunfandiĝas kun la volo de ĉiuj. La sociemaj animaloj lernas tion jam en fruaĝo — en siaj ludoj (1), en kiuj estas devige obei certajn ludregulojn: ne estas allasate envere kornobati, envere mordi unu-alian kaj eĉ rompi la vicordon. Kaj dum maturaĝo la absorbiĝo den* persona volo de la volo socia estas en multaj kazoj klare videbla. La preparadoj de la birdoj por iliaj transflugoj de nordo al sudo kaj returnen; iliaj vesperaj ekzercflugoj dum kelkaj tagoj antaŭ la vojaĝo, la akorditaj agoj de rabaj bestoj kaj birdoj dum la ĉasado, la komundefendo de ĉiuj animaloj, vivantaj en herdoj, kontraŭ atakoj de rabuloj; la migradoj de animaloj kaj, fine, la tuta socia vivo de abeloj, vespoj, formikoj, termitoj, preskaŭ ĉiuj stilzbirdoj (marĉaj birdoj), papagoj, kastoroj, simioj, k. t. p. Jen estas konvinkivaj ekzemploj de tia subiĝo de l' persona volo. Klare videblas en ili la akordigo *de la volo de apartaj individuoj* kun la volo kaj intencoj de la tuto, kio fariĝis jam heredata kutimo, t. e. instinkto (2).

---

(1) Rig. pri tio: Karl Gross, *Play of Animals.*

(2) Multe da faktoj por juĝi pri ĝermoj de l' etiko inter sociemaj animaloj la leganto trovos en bonegaj verkoj de Espinas, kiu analizis diversajn gradojn de l' sociemo ĉe animaloj en sia libro: *Les sociétés ani-*

Ke en tia instinkto jam estas entenataj la ĝermoj de la juro, tion perfekte komprenis Hugo Grotius jam en 1625 jaro. Sed neniu dubo ekzistas pri tio, ke la homo de la kvaternara, Glaci-Laga epoko staris almenaŭ sur la sama ŝtupo de l' socia evoluo kaj plej verŝajne eĉ sur multe pli alta nivelo. Se ekzistas socivivo, en ĝi neeviteble kreiĝas certaj formoj de la vivo, certaj kutimoj kaj moroj. Rekonitaj kiel utilaj kaj fariĝante kutima pensvojo, ili modifiĝas komence al instinktaj kutimoj kaj poste al vivreguloj. Tiel formiĝas propra moralo, propra etiko, kiun la maljunuloj — konservantoj de l' tribaj tradicioj — metas sub la gardon de superstiĉoj kaj de religioj, kio esence signifas : sub la gardon de l' mortintaj praulo j (1).

Kelkaj famaj naturesploristoj entreprenis antaŭnelonge observi kaj eksperimenti por ekscii, — ĉu ekzistas konsciataj moralkonceptoj ĉe hundoj, ĉevaloj kaj aliaj animaloj,

---

*males,* Paris 1877, kaj ĉe Romanes en lia verko pri inteligenteco de animaloj : *Animal Intelligence,* ankaŭ en la libro de Huber kaj Forel pri formikoj kaj Büchner en lia verko pri amo ĉe animaloj : *Liebe und Liebes-Leben in der Tierwelt,* 1879, kompletigita eldono 1885.

(1) Pri la signifo de la « granda aro » de mortintaj antaŭuloj — *La grande multitude,* bonege skribis Elie Reclus (la frato de l' geografo Elisée Reclus) en malgranda, sed pensoriĉa, kaj faktabunda libro : *Les primitifs.*

loĝantaj en proksima interkontakto kun la homo, kaj rezulte estis ricevataj sufiĉe difinitaj jesaj respondoj. Ekz., la faktoj, pri kiuj rakontas *Spencer* en la suplemento al la dua volumo de lia *Principoj de Etiko,* estas principe konvinkivaj kaj ili venigas al konkludoj tre gravaj. Same en la suprecitita verko de Romanes troviĝas kelkaj tute konvinkivaj faktoj. Sed ni ne haltu ĉe ili, ĉar sufiĉas konstati, ke jam en animalaj socioj, kaj des pli en homsocioj, kaŭze de la mem sociemaj kutimoj neeviteble formiĝas la konceptoj, per kiuj la persona *Mi* identiĝas kun la socia *Ni* kaj samgrade kiel tiuj konceptoj transformiĝas en heredan instinkton, la persona *Mi* subiĝas al la socia *Ni* (1).

Sed tuj kiam ni konvinkiĝis, ke tia identigo de l'individuo kun la socio ekzistis, kvankam etgrade ĉe la homoj, — ni jam komprenas, ke se ĝi estis utila al la homaro, ĝi nepre devis fortiĝadi kaj evoluadi en la homo, kiu posedis la parolkapablon kaj per ĝi kreis tradiciojn. Finfine ĝi devis venigi al la malvolviĝo de firma morala instinkto.

Tia aserto tamen kaŭzas plej verŝajne certajn dubojn kaj kredeble multiuj demandos : — « Ĉu povas okazi, ke el la duonbesta sociemo malvolviĝus tiaj altmoralaj doktrinoj,

(1) Detalan analizon de ĉi-faktoj donis Spencer en siaj *Principles of Ethics* (Principoj de Etiko).

kiel tiuj de Sokrato, Platono, Konfucio, Budho kaj Kristo sen interveno de supernatura forto?» Estas demando, al kiu la etiko devas respondi. Simple direkti al la biologio, kiu montros al'ni, kiel el mikroskopaj unuĉelaj organismoj povis evolui dum dekmiljaroj ĉiam pli kaj pli perfektaj organismoj, inklude* ĝis la plej superaj mambestoj kaj la homo — estus ja nesufiĉe. — Kaj tial la etiko estas plenumonta la laboron similan al tiu de Comte kaj Spencer en biologio kaj de multaj esploristoj en la historio de la juro. La etiko devas almenaŭ montri, kiel povis evolui la moralaj konceptoj, komencante de la sociemo, propra al superaj animaloj kaj primitivaj sovaĝuloj kaj ĝis la altidealaj moraldoktrinoj.

La vivreguloj ĉe diversaj nuntempaj sovaĝaj gentoj estas malsamaj.

En diversaj klimatoj, ĉe gentoj, ĉirkaŭitaj de diversaj najbaroj, formiĝis iliaj propraj moroj kaj kutimoj.

Krome, la priskriboj mem de tiuj moroj kaj kutimoj faritaj de diversaj vojaĝistoj forte diferencas unu de aliu, depende de la karaktero de l'etnografo kaj de lia ĝenerala rilato al siaj « malsuperaj fratoj ». Tial oni ne povas kunigi en unu tuton la priskribojn de l' plej diversaj primitivaj gentoj, kiel tion faris kelkaj komencantaj antropologoj, — sen analizi sur kiu evolŝtupo troviĝas certa gento kaj sen kritike rilati al la aŭtoroj de diversaj priskriboj. Eĉ *Spencer* en sia grandega eldonaĵo

de l'antropologiaj materialoj (1) kaj eĉ en sia posta verko « Etiko » ne povis eviti tiun eraron. Sed ĝin jam evitis, ekz. Waitz en sia « *Antropologio de primitivaj popoloj* » kaj tuta vico da antropologoj, kiel Morgan, Maine, M. Kovalevski, Post, Dargun, k. m. a. Ĝenerale, el la priskriboj pri sovaĝuloj estas utiligeblaj nur tiuj — apartenantaj al vojaĝistoj kaj misiistoj, kiuj sufiĉe longdaŭre vivis inter la priskribataj de ili indiĝenoj (landidoj) : ilia longa restado jam indikas certagrade la reciprokan komprenon. Kaj plue, se ni deziras kelkion scii pri unuaj ĝermoj de moralkonceptoj, ni devas atenti tiajn sovaĝulojn, kiuj pli bone povis konservi la trajtojn de l' triba vivo el la plej frua Post-glaci-epoko.

Certe jam ne plu ekzistas gentoj, kiuj plene konservus la vivmanieron de tiu tempo. Sed plimulte, ol aliuj ĝin konservis la sovaĝuloj de l'ekstrema nordo, — aleutoj, ĉukĉoj kaj eskimoj, ĝis nun vivantaj en la samaj fizikaj cirkonstancoj, en kiuj ili vivis, kiam ĵus komencis degeli la grandega glacia tavolo (2), samkiel kelkaj gentoj en ekstrema

(1) *Descriptive Sociology*, classified and arranged by Herbert Spencer, compiled and abstracted by Davis Duncan, Richard Schappig and James Collier. 8 volumoj in-folio.

(2) Estas tre versimile, ke sammezure, kiel degelis la glacitavolo, etendita dum sia kulmina malvolviĝo en la norda duonglobo proksimume ĝis 50° de norda latitudo, tiuj gentoj estis konstante migrantaj al nordo,

sudo t. e. en Patagonio kaj Nova Gvineo en kelkaj montregionoj, precipe en Himalaja montaro.

Ĝuste pri la gentoj de malproksima nordo ni havas detalozajn informojn de la homoj, kiuj vivis inter ili: precipe pri la aleutoj el Norda Alasko — de rimarkinda etnografo, misiisto Venjaminov, kaj pri l'eskimoj — de la ekspedicioj, kiuj travintris en Grenlando. La priskribo pri aleutoj de Venjaminov estas precipe instruiva.

Antaŭ ĉio estu notite, ke en la aleuta etiko, samkiel en la etiko de aliaj primitivaj gentoj, ekzistas du partoj: la plenumo de certaj tradicioj, kaj konsekvence ankaŭ de certaj etikaj ordonoj, estas nepre deviga; la plenumo de aliuj estas nur rekomendata kiel dezirinda, kaj pro ties rompo la kulpuloj estas nur submetataj al mokado kaj averto. Aleutoj, ekz., diras, ke tion aŭ alion fari estas « honte » (1).

Tiel, porekzemple, estas honte, — skribis Venjaminov, — timi la neeviteblan morton; peti indulgon de malamiko, esti akuzita pri evidenta ŝtelado, ankaŭ renversiĝi kun sia

---

depremataj per la kreskanta loĝantaro de l'pli sudaj terpartoj (Hindio, Nord-Afriko, k. t. p.) ĝiskien la glacitavolo ne atingis.

(1) Memornotoj pri Unalaŝka regiono, tri volumoj, Peterburgo, 1840. Eltiraĵoj el tiu verko troviĝas en *Alaska*, de Dall. Tre similaj rimarkoj ekzistas pri Grenlandaj eskimoj, ankaŭ pri aŭstraliaj sovaĝuloj, loĝantaj en Nova Gvineo (de Mikuĥo-Maklaj, k. a.).

boato en haveno; estas honte, se oni timas eknavigi en la maron dum la ŝtormo; same, se vi senfortiĝos la unua dum longa vojaĝo kaj elmontros avidecon dum divido de l'akiraĵo (en tia okazo ĉiuj ceteraj fordonas al la avidulo sian parton por hontigi lin); estas honte elbabili la sekreton de sia tribo al sia edzino; estas honte ĉasante duope ne proponi la plibonan akiraĵon al sia kamarado; estas honte fanfaroni pri siaj agoj, precipe imagitaj, kaj nomi aliun per malŝataj vortoj. Fine, estas honte peti almozon; karesi sian edzinon, aŭ danci kun ŝi en ĉeesto de fremduloj; ankaŭ persone marĉandi kun aĉetanto, ĉar la prezon por proponata varo devas fiksi tria persono. Por la virino estas honte ne scipovi kudri kaj danci kaj ĝenerale ne scii fari tion, kio estas la devo de l'virinoj; estas honte karesi la edzon, aŭ eĉ paroli kun li dum ĉeesto de fremduloj (1).

Kiel estas subtenataj tiuj elementoj de l'aleuta etiko, pri tio Venjaminov nenion ra-

---

(1) Nombrante ĉi-principojn de la aleuta moralo Venjaminov inkludis ankaŭ: « morti ne murdinte eĉ unu malamikon ». Mi permesis al mi ne inkludi tion, ĉar mi opinias, ke ĝi estas miskompreno. La malamiko ne povas esti iu samgentano, ĉar Venjaminov diras, ke inter la loĝantaro en 60.000 homoj dum 40 jaroj okazis nur unu murdo kaj ĝin nepre devis sekvi aŭ familia venĝo, aŭ interpaciĝo post la pago de l'rekompenco. Do la malamiko, kiu estus nepre murdenda, povis esti nur homo el aliu gento. Kaj tamen pri konstantaj

kontis. Sed unu el la ekspedicioj, kiuj vintris en Grenlando, priskribis — kiel vivas eskimoj po kelkaj familioj kune, en unu loĝejo, poparte dividita al ĉiu familio per kurteno el animalaj feloj. Tiuj domoj-koridoroj iafoje havas la formon de kruco, en kies mezo troviĝas fajrujo. Dum longaj vintraj noktoj la virinoj kantas kaj en siaj kantaĵoj ili ofte primokas kulpulojn kontraŭ la reguloj de l'bonmaniero. Sed samtempe ekzistas reguloj nepre devigaj; unualoke certe estas la absoluta malpermeso de l'fratmurdo, t. e. de la murdo eninter sia gento. Same estas neallasebla, ke la murdo, aŭ eĉ vundo de iu samgentano flanke de homo el alia gento, restu sen sanga revenĝo.

Plue ekzistas tuta grupo da agoj tiom devigaj, ke pro ilia malplenumo la homo estas submetata al malestimo de la tuta gento kaj li riskas fariĝi « elpelito », t. e. forpelita el sia gento. Alikaze la rompinto de tiuj reguloj povus sekvigi por la tuta gento la malkontenton de ofenditaj animaloj, ekz., de krokodiloj, aŭ ursoj, pri kiuj mi parolis en la antaŭa ĉapitro, aŭ de nevideblaj estaĵoj, ekz., fantomoj de praavoj, kiuj protektas la genton.

---

intergentaj konfliktoj Venjaminov ne parolas. Kredeble, li intencis diri: « morti, ne murdinte la malamikon, kiu estas murdenda pro la leĝo de sangrevenĝo ». Tiun opinion, bedaŭrinde, dividas ĝis nun la pledantoj por mortekzekutado perjuĝa, eĉ en tiel nomataj civilizitaj socioj.

Tiel, ekz. Venjaminov rakontas, ke kiam li foje foriris al la ŝipo, li lasis sur la bordo faskon de seka fiŝaro, alportita por donaci al li. Kiam li retrovenis en la saman lokon post duonjaro, li eksciis, ke dum lia foresto la gento suferis grandan malsaton. Sed la donacitan al li fiŝfaskon certe neniu prenis, kaj ĝi estis alportita al li sendifekta. Agi aliel signifus altiri ĉiajn malfeliĉojn kontraŭ la tuta gento. Ankaŭ Middendorf skribis, ke en la marĉoj de Norda Siberio neniu tuŝos eĉ pecon el glitveturilo lasita de iu, eĉ se ĝi enhavus nutraĵon. Oni scias, kiel konstante malsatas ĉiuj loĝantoj de l'malproksima nordo. Sed utiligi ion-ajn el lasitaj produktaĵoj prezentus ti-kion ni nomas krimo kaj simila krimo povas altiri kontraŭ la tuta gento ĉiajn malfeliĉojn. La individuo kaj la gento en ĉi-kazo identiĝas.

Fine, aleutoj, samkiel ĉiuj primitivaj sovaĝuloj, havas ankoraŭ vicon da reguloj, senkondiĉe devigaj, — oni povus diri sanktecaj. Ĝi estas ĉio, kio rilatas la subtenon de la triba vivaranĝo: ĝia divido je grupoj, ĝiaj edziĝaj leĝoj, ĝiaj konceptoj pri propro, ĉu triba, ĉu familia, ĝiaj tradicioj, praktikataj dum ĉaso kaj fiŝkapto (komune, aŭ unuope), ĝiaj transmigroj, k. t. p. Fine ekzistas tuta vico da gentaj ritoj, kiuj havas plene religian karakteron. Tie ĉi ni jam trovas rigoran leĝon, kies malplenumo altirus la malfeliĉon por la tuta tribo, aŭ eĉ por la tuta gento, kaj tial

ĝia malplenumo estas neimagebla kaj preskaŭ neebla. Kaj se tamen kelkiam iu rompas similan leĝon, tia rompo estas punata kiel perfido per la ekskomuniko el la tribo, aŭ eĉ per morto. Cetere, oni devas diri, ke malplenumo de tiuj reguloj estas tiom malofta, ke ĝi eĉ estas opiniata neimagebla. Simile al la roma juro, kiu konsideris neimagebla patromurdon kaj tial eĉ ne havis leĝon por puni tian krimon.

Ĝeneraldire, inter ĉiuj konataj al ni primitivaj popoloj formiĝis tre komplika triba vivaranĝo. Do ĉiu popolo havas sian propran moralon, sian propran etikon. Kaj en ĉiuj-ĉi neskribitaj « leĝaroj », gardataj de l' tradicio, aperas tri ĉefaj kategorioj de vivmanieraj reguloj.

Kelkiuj el ili gardas la formojn, establitajn por la akirado de nutrorimedoj por ĉiu aparte kaj por la tuta tribo kolektive. Ili difinas la principojn de l' uzado de ti-kio apartenas al la tuta tribo: akvoj, arbaroj, iafoje sovaĝaj, aŭ kulturitaj fruktarboj, ĉasdistriktoj kaj boatoj. Ekzistas ankaŭ severaj reguloj por la ĉasado kaj nomadmigroj, la reguloj por la fajro-konservo, k. t. p. (1).

(1) La konservado de l' fajro estas tre grava afero. Mikluĥo-Maklaj skribis, ke ĉe la loĝantoj de Nova Gvineo, kie li vivis, ekzistis legendo pri tio, kiel suferis pro skorbuto iliaj prapatroj, kiam ili foje lasis fajron estingiĝi kaj vivis sen fajro ĝis kiam ili havigis ĝin de najbaraj insuloj.

Plue estas difinataj la personaj rajtoj kaj la personaj interrilatoj: la divido de la tribo en grupoj kaj la sistemo de l' permeseblaj edzecaj interrilatoj — denove tre komplika fako, kie la establaĵoj fariĝas preskaŭ religiaj. Al la sama kategorio apartenas: la reguloj pri la edukado de l'junularo, iafoje en specialaj « longaj kabanoj », kiel ĝin aranĝas la sovaĝuloj de l' Paca Oceano; la rilatoj al maljunuloj kaj al ĵus-naskituloj; kaj fine, la rimedoj por antaŭgardi kontraŭ akraj personaj konfliktoj, t. e. la difino de ti-kio estas farenda, se kun apero de apartaj familioj jam ebliĝas perfortagoj eninter la tribo mem, samkiel ĉe la konfliktoj kontraŭ najbaraj triboj, precipe en la okazo, se la malpaco sekvigos militon. Tie-ĉi estas fiksata vico da reguloj, el kiuj poste evoluis, kiel tion montris la belga profesoro Ernest Nys, la unuaj ĝermoj de l' internacia juro. Fine, ekzistas tria kategorio de sanktespektataj establaĵoj, kiuj rilatas al religiaj superstiĉoj kaj ritoj, ligitaj kun la jarsezonoj, ĉasado, migroj, k. t. p.

Por ĉio-ĉi difinitajn respondojn povas doni la maljunuloj de ĉiu gento. Certe, tiuj respondoj ne estas egalaj en diversaj triboj kaj gentoj, samkiel malegalas ankaŭ la ritoj. Sed gravas tio, ke ĉiu tribo kaj gento, kiom ajn malsupera estu ĝia evolŝtupo, *jam posedas sian propran treege komplikan etikon, sian propran sistemon de l' moralo kaj malmoralo*.

La elementoj de tiu moralo bazas, kiel ni vidis, sur la sociema, areca sento, kaj sur la bezono pri reciproka helpo, kiuj evoluis en ĉiuj sociemaj animaloj kaj ankoraŭ pli evoluis en la primitivaj homaj socioj. Estas nature, ke dank' al la lingvo, kiu helpis evolui al la memoro kaj kreis la tradicion, formiĝis ĉe la homo multe pli komplikaj vivreguloj, ol inter la animaloj. Kaj kiam aperis la religio, eĉ en la plej kruda formo, tiam en la homan etikon eniris ankoraŭ nova elemento, kiu aldonis al ĝi certan stabilecon kaj poste enportis la animecon kaj certan idealismon.

Plue, laŭ la mezuro de l' evoluo de l' socia vivo, ĉiam pli kaj pli devis elstari la koncepto pri la *justo* en reciprokaj rilatoj. La unuaj ĝermoj de la justo, en la senco de l' egalrajto, estas observeblaj jam ĉe animaloj, precipe ĉe mambestoj, kiam la ino mamnutras plurajn idojn, aŭ dum la ludoj de multiuj animaloj, kie certaj ludreguloj estas nepre sekvataj. Sed la transiro de la sociema instinkto, — t. e. de la simpla inklino, aŭ bezono vivi en rondo de parencaj estaĵoj, al la konkludo pri la neceso de l' justo en reciprokaj rilatoj, estis absolute neevitebla en la homo, pro la subteno de la mem socia vivo. Efektive, en ĉiu socio la deziroj kaj pasioj de la individuoj neeviteble kunpuŝiĝas kun la deziroj de aliuj, de la samaj socianoj, kaj tiuj kunpuŝiĝoj fatale venigus al senfinaj malpacoj kaj al la disfalo de l' socio, se en homoj ne evoluad-

us samtempe (kiel tio okazas jam ĉe certaj sociemaj animaloj) la koncepto pri egalrajto de ĉiuj socianoj. Kaj el la sama koncepto devis evolui iom post iom la koncepto *pri la justo,* kiel ĝin montras la origino mem de la vorto « æquitas, équité », kiu esprimas la ideon pri la justo, la egaleco. Ne vane en antikva tempo oni pentris la juston, kiel virinon kun ŝirmitaj okuloj, tenanta pesilon en la mano.

Ni prenu iun kazon el la vivo. Jen, por ekz., du homoj ekmalpacis. Vort' kontraŭ vorto, jen unu riproĉis aliun, ke tiu lin ofendis. Aliu komencis pruvi, ke li pravis kaj rajtis diri la diritaĵon. Estas vere, ke li per tio ofendis aliun, sed lia ofendo estis nur la respondo por ofendo, farita al li, ankaŭ ke ĝi egalis, ekvivalentis la antaŭan kaj neniakaze ĝin superis.

Se tia disputo venigas al malpaco, eĉ transiras en interbataladon, tiam ambaŭ komencos pruvadi, ke la unua bato estis farita responde al grava ofendo, kaj ĉiu plua bato estis respondo por samegala bato de l' kontraŭulo. Kaj se la kazo sekvigas vundojn kaj juĝproceson, tiam la juĝistoj mezuras la grandon de l'vundoj kaj ti-kiu estis farinta pli gravan vundon devas pagi monpunon por restarigi *la egalecon de l' ofendoj.* Tiel oni procedis en la daŭro de multaj jarcentoj, se kazo estis trafanta la komunan juĝejon.

En tiu-ĉi ekzemplo, ne imagita, sed pren-

ita el la reala vivo estas klare videbla, kiel la plej primitivaj sovaĝuloj komprenis la « juston » kaj kion la plej civilizitaj popoloj ĝis nun komprenas sub la vortoj : *vero*, *justo*, justice, æquitas, équité, Rechtigkeit, k. t. p. Ili vidas en tiuj vortoj la *restarigon de l'rompita egalrajto*. Neniu rajtas rompi la egalecon inter du anoj de socio ; kaj se ĝi estas rompita, ĝi devas esti restarigita per interveno de la socio.

Tiel tekstis la kvinlibro de Moseo, dirante : « Okul' pro okul', dento pro dento, vundo pro vundo », sed ne pli. Tiel procedis la roma justo, tiel ĝis nun procedas ĉiuj sovaĝuloj, kaj multaj el tiuj konceptoj konservîĝis ankaŭ en nia moderna leĝdono.

Certe, en ĉiu socio, sur kiu ajn evoluŝtupo ĝi staru, ĉiam ekzistis kaj ekzistos apartaj individuoj, celantaj utiligi sian forton, lerton, saĝon kaj kuraĝon por subigi al si alies volon ; kaj kelkiuj el ili atingas sian celon. Tiaj individuoj, certe, renkontiĝis jam inter plej primitivaj popoloj, sur ĉiuj ŝtupoj de l' kulturo. Sed kontraŭpeze al ili, ankaŭ sur ĉiuj ŝtupoj de l' evoluo formiĝis moroj, kiuj celis kontraŭagi al la evoluo de aparta persono malprofite por la tuta socio. Ĉiuj institucioj, formiĝintaj diversepoke en la homaro — triba vivaranĝo, vilaĝa komunumo, urbo, respublikoj kun ilia popolkunvena sociaranĝo, paroka kaj distrikta memadministro, reprezenta sistemo, k. t. p. — esence ili ĉiuj celis gardi la socion kontraŭ

l'arbitro de tiaj homoj kaj kontraŭ ilia komencanta potenco.

Jam inter la plej primitivaj sovaĝuloj, kiel ni ĵus vidis, ekzistas grupo da moroj kreitaj tiucele. Unuflanke, la moro establas egalrajton. Tiel, ekz., *Darwin* estis mirigata observi ĉe patagonaj sovaĝuloj, ke kiam blankulo estis donanta ion manĝeblan al unu el la sovaĝuloj, tiu tuj distribuadis la donitan al li pecon poegale inter ĉiuj ĉeestantoj. La samon mencias multaj esploristoj pri diversaj primitivaj gentoj, kaj la samon mi trovis eĉ en la pli postaj evoluformoj, ĉe nomada popolo, nome burjatoj, kiuj loĝas precipe en sovaĝaj distriktoj de Siberio (1).

Multe da tiaj faktoj troviĝas en ĉiuj seriozaj priskriboj de primitivaj popoloj (2). Ajnaloke studante ilin esploristoj trovos la samajn morojn, la saman komunuman spiriton, la

---

(1) Ĉe sajanaj burjatoj, kiam oni mortigas ŝafon, la tuta uluso senescepte venas al la fajraĵo, kie estas preparata festeno kaj partoprenas manĝadon. La samo ekzistis ankaŭ ĉe verholenaj burjatoj (apud riv. Lena).

(2) Kiu deziras pli proksime konatiĝi kun tiu problemo, tiu legu fundamentajn verkojn de Waitz, *Anthropologie der Naturvölker;* Post, *Afrikanische Jurisprudenz* kaj *Die Geschlechtsgenossenschaft der Urzeit;* M. Kovalevskij, « Primitivepoka juro », *Tableau des origines de la Famille et de la propriété;* Morgan, *Ancient Society;* Dr. H. Rink, *The Eskimo tribes,* kaj multaj apartaj studoj menciataj en tiuj verkoj, ankaŭ en mia studo pri la interhelpo.

saman pretecon deteni l' arbitron por subteni socian vivon. Kaj kiam ni provas penetri en la vivon de la homo sur la plej primitivaj ŝtupoj de lia evoluo, ni trovas ĉiam la saman triban vivon, la samajn unuiĝojn de homoj por reciproka subteno. Kaj ni estas devigataj konfesi, ke ĝuste en la sociaj kvalitoj de la homo estas la ĉefa forto de lia ĝisnuna evoluado kaj de lia plua progresado.

En la dekoka jarcento, sub la influo de l' konatiĝo kun sovaĝuloj de la Paca Oceano, vastiĝis la tendenco al idealigo de sovaĝuloj, vivantaj « en natura stato », eble kiel kontraŭmeto al la filozofio de Hobbes kaj de liaj adeptoj, kiuj bildis primitivajn homojn en formo de sovaĝa bestaro, preta formanĝi unu aliun. La ambaŭ bildoj evidentiĝis tamen malveraj, kiel ni nun scias de multaj skrupulaj esploristoj. La primitiva homo tute ne prezentas idealon de la virto, sed ankaŭ tute ne estas tigro-simila besto. Sed li ĉiam vivis kaj ĝis nun vivas socie, simile al miloj da aliuj vivestaĵoj, kaj en tiuj socioj ĉe li kreiĝis ne sole la sociemaj trajtoj, propraj al ĉiuj sociemaj animaloj, sed dank'al la lingvo kaj konsekvence, al la pli progresinta intelekto, en li ankoraŭ pli malvolviĝis la sociemo, kaj paralele al ĝi formiĝis ankaŭ certaj reguloj de l' socia vivo, nomataj de ni moralo.

El triborganizo la homo lernis antaŭ ĉio la fundamentan regulon de ĉiu socieco: ne fari al aliu ti-kion vi ne deziras, ke oni faru al

vi, kaj diversrimede deteni la nedezirantojn obei tiun-ĉi regulon. Kaj en li malvolviĝis la kapablo *identigi sian personan vivon kun la vivo de sia tribo*. Ĉe la studo pri homoj primitivaj, komencante de tiuj konservintaj ankoraŭ la vivmanieron de la Glacia kaj de la frua Postglacia (Laga) epoko kaj finante per ti-inter kiuj ni trovas pli postan disvolviĝon de l'triba regoformo, — nin plej multe frapas ĝuste tiu trajto: *identiĝo* de la homo kun sia tribo. Ĝi pasas tra la tuta historio de l'frua evoluo de la homaro; kaj ĝi plej bone konserviĝis en ti-kiuj konservis la primitivajn formojn de l'triborganizo kaj la plej primitivajn formojn de sinadapto por lukti kontraŭ la duonpatrino-naturo, t. e. en eskimoj, aleutoj, loĝantoj de l'Fajra-Lando kaj ĉe kelkaj montaraj gentoj. Kaj ju pli ni studas la primitivan homon, des pli ni konvinkiĝas, ke eĉ en siaj sensignifaj agoj li identigis kaj nun identigas sian vivon kun la vivo de sia tribo.

La koncepto pri bono kaj malbono formiĝis tiamaniere ne nur sur la bazo de ti-kio estas bono, aŭ malbono por aparta homo, sed sur ti-kio prezentas bonon, aŭ malbonon por la tuta tribo. Tiuj konceptoj certe modifiĝis en diversaj lokoj kaj diversaj tempoj; kaj certaj reguloj, precipe tiaj, kiel p. e. homoferoj por mildigi terurigajn naturfortojn — vulkanon, maron, tertremon, — estis simple absurdaj.

Sed se ti-aliuj reguloj estis establitaj de la tribo, la homo obeis ilin, kiel ajn malfacila estus ilia plenumo.

Ĝenerale, la primitiva sovaĝulo identigis sin kun sia gento. Li sin sentis vere malfeliĉa, se li faris la agon, kiu povus altiri por lia tribo malbenon de l'ofendito, aŭ venĝon de la « granda aro » de l' praavoj, aŭ de iu bestgento: krokodiloj, ursoj, tigroj, k. t. p. La « tradicia juro » por la sovaĝulo estas pli grava, ol la religio por la moderna homo: ĝi estas la bazo de lia vivo. Jen kial la sinlimigo en interesoj de la tribo kaj la sinofero ĉe apartaj individuoj kun la sama celo prezentas tute ordinaran fenomenon [1].

Unuvorte, ju pli proksima estas la primitiva socio al ĝiaj plej antikvaj formoj, des pli severe estas plenumata en ĝi la regulo — « unu por ĉiuj ». Kaj nur kaŭze de plena nescio pri reala vivo de la primitivaj homoj kelkaj pensuloj, kiel Hobbes, Rousseau kaj iliaj adeptoj asertis, ke la moralo ĝermiĝis komence el la imagata « socia kontrakto » kaj aliuj eksplikis* ĝian aperon per la « dieca sugesto », kiu venis al la mita leĝodoninto. Sed en realo la prafonto de l' moralo estas la

---

[1] Vidu Bastian, *Der Mensch in der Geschichte*, Vol. III; Grey, *Journal of two Expeditions*, 1841, vol. II, kaj ĉiuj seriozaj priskriboj de sovaĝula vivo. Pri la rolo de l'Timigo per la « malbeno » rig. la konatan verkon de prof. Westermarck.

*sociemo*, propra al ĉiuj superaj animaloj kaj des pli al la homo.

Bedaŭrinde, en la trib-organizo la regulo « unu por ĉiuj » ne vastiĝas ekster la propra tribo. La tribo ne estas devigata dividi nutraĵon kun aliuj triboj. Krome, la teritorio, ĉe certaj mambestoj kaj birdoj estas dividita inter diversaj triboj, kaj ĉiu tribo havas sian propran distrikton por ĉasado, aŭ fiŝkaptado. Tiamaniere en la vivo de l'homo de la plej antikvaj tempoj formiĝis du specoj de rilatoj: eninter propra tribo kaj kun najbaraj triboj, kaj tiuj lastaj kreis la grundon por konfliktoj kaj militoj. Estas vere, ke jam en la triba socivivo estis kaj estas ĝis nun farataj provoj reguligi la interrilatojn de l'najbaraj triboj. Enirante en la kabanon oni nepre devas lasi sian armilon ĉe la enirejo, kaj eĉ en la okazo de milito inter du triboj ekzistas certaj devigaj reguloj rilate al putoj kaj vojetoj, laŭ kiuj pasadas la virinoj, portante akvon. Sed ĝenerale la rilatoj al la najbaroj el aliu tribo (se ĝi ne estas kunfederita) estas tute aliaj, ol interne de la tribo. Kaj dum la plua evoluo de l'homaro nenia religio povis elradiki la koncepton pri « fremdulo ». Plie, la religioj tre ofte iĝis la fontoj de la plej kruela malpaco, kiu ankoraŭ plifortiĝis kun la disvolvo de l'ŝtatoj. Sekve de tio estiĝis dueca etiko, kiu sin tenas ĝis nun kaj kondukas al tiaj teruraĵoj, kiel la lasta mondmilito.

Komence la tuta tribo formis unu familion,

kaj, kiel estas nun pruvite, nur iom post iom en ĝi komencis formiĝi apartaj familioj, kaj la edzinoj en tiuj familioj estis prenendaj por edziĝo el aliu tribo.

La aparta familio tamen kondukis al la disfalo de l' antaŭa komunisma sociado, ĉar ĝi ebligis la kolektadon de familia riĉaĵo. Sed tiam la bezono pri socieco, kreita dum antaŭa sociordo, komencis alpreni novajn formojn. En la vilaĝoj kreiĝis vilaĝa komunumo, kaj en la urboj — gildoj de metiistoj kaj de komercistoj, el kiuj evoluis la liberaj mezepokaj urboj; kaj kun helpo de tiuj instituoj la popolamasoj kreis novan formon de vivo, en kiu ĝermiĝis nova unuiĝo, anstataŭ la triba.

Aliflanke, la granda popoloj-migrado kaj la konstantaj invadoj de l' najbaraj gentoj kaj popoloj neeviteble kondukis al la formiĝo de l' milita korporacio, kiu gajnis ĉiam pli grandan forton, laŭmezure kiel la paca vilaĝa kaj urba loĝantaro ĉiam pli malkutimis de la militafero. Samtempe la maljunuloj — konservantoj de l' tribtradicioj, — samkiel la observantoj de l' naturo, kiuj amasigis la unuajn ĝermojn de l' religiaj ritoj, penis firmigi sian potencon inter vilaĝaj komunumoj kaj en liberaj urboj, formante por tio siajn sekretajn unuiĝojn. Kaj poste, kun la estiĝo de la ŝtato, ili unuiĝis inter si — la milita potenco kun la eklezia en la komuna obeo al la reĝa aŭtoritato.

Tamen oni devas aldoni, ke malgraŭ ĉio

neniam, en nia periodo de l' homara vivo, la militoj estis normala kondiĉo de la vivo. Dum la tempo, kiam la militantoj ekstermis unu aliun kaj la pastroj glorigis la reciprokan buĉadon, la popolmasoj en urboj kaj vilaĝoj daŭrigis sian kutiman vivon. Ili faradis sian kutiman laboron kaj samtempe penis firmigi la organizaĵojn, fonditajn sur la interhelpo kaj reciproka subteno, t. e. sur ilia kutima juro, eĉ ti-kiam la homoj trafis poste sub la rego de l' pastraro kaj reĝaro.

Esence la tuta historio de l' homaro povas esti konsiderata kiel tendenco al uzurpo de povo flanke de apartaj homoj, aŭ grupoj por subigi al si larĝajn rondojn, kaj aliflanke, kiel tendenco — konservi la egalrajton — almenaŭ inter la viroj kaj malhelpi al la povuzurpo, aŭ almenaŭ limigi ĝin : alivorte *konservi la juston interne de la tribo, gento, aŭ tribfederaĵo.*

La sama tendenco klare manifestiĝis en la mezepokaj liberaj urboj, precipe en la unuaj jarcentoj post ilia liberiĝo de siaj feŭdestroj. Esence la liberaj urboj estis defendaj aliancoj de egalrajtaj urbanoj kontraŭ la najbaraj feŭdestroj.

Sed iom post iom, ankaŭ en la liberaj urboj komencis distavoliĝo de la loĝantaro. Antaŭe la komerca negocado estis kondukata de la tuta urbo, ĉar la produktaĵoj de l'urba industrio, aŭ la varoj, aĉetitaj en la vilaĝoj, estis eksportataj de la tuta urbo per siaj kon-

fiditoj, kaj la profito apartenis al la tuta urba komunumo. Sed poiome la komerco transformiĝis el komuna en privatan; pro ĝi, riĉiĝis ne nur la urboj mem, sed ankaŭ privataj homoj kaj liberaj komercistoj — « Mercatori Libri » — precipe de la tempo de l' Kruciroj, kiam komencis vigla negocado kun la proksima oriento; kaj ekevoluis la bankistaro, al kiu, bezonokaze sin turnis por pruntepreni ne nur la ruiniĝintaj nobeloj-kavaliroj, sed ankaŭ pli poste la urboj mem.

Tiamaniere, en ĉiu el la iam liberaj urboj formiĝadis komercista aristokrataro, kiu tenis urbojn en siaj manoj kaj subtenis jen la papon, jen la imperiestron, aspirantajn posedi ti-aliun urbon, jen la reĝon, aŭ la granddukon, konkirantajn la urbojn sin apogante ĉu sur riĉa komercistaro, ĉu sur urba malriĉularo. Tiel estis preparataj la modernaj centralizitaj ŝtatoj; kaj ili finis sian centralizan laboron, kiam Eŭropo estis devigata defendi sin kontraŭ la invado de la maŭroj en Hispanion en la naŭa, deka kaj dekunua jarcento, de la mongoloj en Rusion — en la dektria jarcento, kaj de l' turkoj — en la dekkvina. Kontraŭ tiaj masinvadoj la urboj kaj apartaj malgrandaj princlandoj, kiuj ofte malpacis inter si, sin trovis senfortaj, kaj la procedo de l' subigo den* malgrandaj unuoj de l' pli grandaj kaj same la alcentrigo de la povo en la ŝtatoj estis kronitaj por la kreo de l' grandaj politikaj ŝtatoj.

Estas kompreneble, ke tiaj esencaj ŝanĝoj en la socivivo, samkiel religiaj ribeloj kaj militoj, metis sian stampon sur la tutan konceptaron en ĉiu lando diversatempe. Kaj eble iam estos farita granda laboro, en kiu la evoluo de l'moralo estos studita en interligo kun la modifoj de la sociordo. Sed ĉitie ni jam eniras la regionon kie la scienco pri la moralaj konceptoj kaj doktrinoj, t. e. la *Etiko,* ofte kuntrafas kun alia scienco — la *Sociologio,* t. e. kun la scienco pri la vivo kaj evoluo de la socio. Kaj tial, por ne sin transĵeti el unu regiono en la alian, estas preferinde antaŭe montri, kie oni devas meti limon por la regiono de la etiko.

Do, en ĉiuj homoj, sur kia ajn malalta evoluŝtupo ili starus, kaj same en kelkaj sociaj animaloj ekzistas trajtoj, kiujn ni nomas moralaj. Sur ĉiuj evoluŝtupoj de la homo ni trovas la sociemon kaj la herdo-senton (areccento), kaj ĉe apartaj homoj ekzistas krome la preteco helpi al aliuj iafoje eĉ riskante sian propran vivon. Kaj ĉar tiaj trajtoj akcelos al la subteno kaj disvolvo de l' socia vivo, kiu siavice sekuras ĉies vivon kaj bonstaton, tial similaj ecoj depost la plej antikvaj tempoj estis en la homsocioj konsiderataj ne nur dezirindaj, sed eĉ devigaj. La maljunuloj, saĝuloj kaj ŝamanoj (sorĉistoj) de l' primitivaj gentoj, kaj pliposte idolpastraro kaj ekleziularo ekspozadis* tiujn ecojn de l' homa naturo, kiel ordonojn desupre, elvenantaj de misteraj

fortoj de l' naturo, t. e. de pluraj dioj, aŭ de l' unueca kreinto de l' naturo. Sed jam depost tre antikvaj tempoj kaj precipe depost la epoko de l' sciencoj-disfloro, komenciĝinta en antikva Grekio antaŭ pli ol 2500 jaroj, la pensuloj komencis meti antaŭ si la demandojn pri la denatura origino de l' moralemocioj kaj moralkonceptoj, kiuj detenas la homon de malbonaj agoj kontraŭ siaj samtribanoj, kaj ĝenerale de la agoj, kondukantaj al malfortiĝo de l' sociemo. Alivorte, ili pensis trovi naturan eksplikon* al ti-kio estas kutime nomata morala en la homo, kaj kio estas opiniata sendube kiel dezirinda en ĉiu socio.

Tiaj provoj laŭŝajne estis farataj jam en profunda antikvo, ĉar iliaj postsignoj estas observataj en Ĉinio kaj Hindio. Sed en scienca formo ĝis nun postvivis nur tiuj de la antikva Grekio. Tie la tuta vico de l' pensuloj dum la daŭro de kvar jarcentoj, — Sokrato, Platono, Aristotelo, Epikuro, kaj pliposte la stoikuloj enpenseme, filozofie rilatis al la sekvantaj fundamentaj problemoj :

« Dekie aperas en la homo la moralaj reguloj, kiuj kontraŭdiras al liaj pasioj kaj ofte ilin detenas ? »

« Dekie aperas la sento pri devigeco de l' morala sento, kiu manifestiĝas eĉ en la homoj rifuzantaj de ĉiuj moralaj vivreguloj ? »

« Ĉu tio estas nur la frukto de l' eduko, kiun ni ne kuraĝas forlasi, — kiel tion asert-

as nun kelkaj verkistoj kaj kelkiam asertis pli frue ankaŭ certaj neantoj de l'moralo? »

« Aŭ ĉu la morala konscio en la homo estas la frukto de lia naturo mem. Tiakaze, ĉu ĝi ne estas la elemento, kiu radikiĝis kaŭze de lia socivivo en la daŭro de multaj miljaroj? »

« Fine, se estas tiel, ĉu necesas do disvolvi kaj enradiki tiun konscion, aŭ estus pli bone elradiki ĝin kaj akceli al la disvolvado de malaj sentoj de l'memamo (egoismo), kiuj la neadon de ĉiu moralo ekspozas* kiel deziraton, kiel idealon de l'civilizita homo? »

Jen estas la problemoj, pri kies solvo la pensuloj de l'homaro sin okupas jam pli ol du mil jarojn, — periode donante respondojn jen pli proksimajn al unu, jen al la alia solvo. El tiuj esploroj formiĝis la tuta scienco — etiko, kiu proksime interpuŝas unuflanke la sociologion kaj aliflanke la psikologion, t. e. la sciencon pri sentaj kaj mensaj kapabloj de la homo.

Propradire, en la etiko ĉiuj ĵus menciitaj demandoj reduktiĝas al la du ĉefaj taskoj: 1-e *Konstati la originon de l' moralaj konceptoj kaj sentoj*; 2-e *Difini la ĉefajn principojn de l' moralo* kaj formi tiamaniere la ĝustan, t. e. celkonforman moralan idealon.

Super tio laboris kaj laboras pensuloj de ĉiuj popoloj, kaj tial antaŭ ol ekspozi* miajn konkludojn pri tiuj demandoj, mi provos doni

la revuon de l'konkludoj, al kiuj venadis pensuloj de diversaj skoloj.

Do, nun ni transiru al tio, kaj mi turnos specialan atenton sur la evoluon de la koncepto pri la justo, kiu, se mi ne eraras, kuŝas en la bazo de ĉio morala kaj estas la elirkoncepto por praktikaj konkludoj de ĉiu morala filozofio, — kvankam tio estas ankoraŭ tute ne akceptita de la plimulto da moralistoj, kiuj skribis pri la etiko.

# ĈAPITRO KVINA

## La evoluo de la moraldoktrinoj. L'antikva Grekio

*La moralaj ideoj de l'antikvaj grekoj. — La moraldoktrino de sofistoj. — Sokrato. — Platono. — Aristotelo. — Epikuro. — Stoikuloj.*

En la antaŭa ĉapitro ni vidis, ke ĉe la plej primitivaj popoloj formiĝas sia propra maniero de aranĝo den* socia vivo kaj kreiĝas propraj zorge konservataj moroj kaj kutimoj, samkiel siaj propraj konceptoj pri ti-kio estas bona kaj malbona, kio estas evitinda kaj kiel oni devas agi diversakaze. Unuvorte — formiĝas propra moralo, propra etiko.

Parto de vivreguloj estas protektata de tradicio. Oni ne faru tion, aŭ alion, ĉar fari ĝin estus « nebone », aŭ « honte » : — tio signifus malfortecon fizikan, aŭ malfortecon de l'karaktero. Sed ekzistas ankaŭ agoj pli krimaj kaj reguloj pli severaj. Kiu ilin rompas, tiu ne nur elmontras nedezirindajn karaktertrajtojn, sed ankaŭ malutilas al sia tribo. Kaj la bonstato de la tribo estas gardata de tuta amaso da mortintaj antaŭuloj, kaj se iu rompas la vivregulojn testamentitajn de unu gene-

racio al aliu, tiam la mortintaj antaŭuloj venĝas ne nur al la rompinto de iliaj ordonoj, sed al la tuta tribo, kiu permesis la rompon de l' tradicio [1]. L'animalio, kiel ni vidis en la tria ĉapitro, helpas la bonan kaj justan homon kaj ĉiel malhelpas la malbonulon kaj la maljustulon. Sed kie la tuta tribo partoprenas en malbona kaj maljusta ago, tie intervenas jam la naturfortoj en aspekto de bonaj kaj malbonaj estaĵoj, kiuj havas rilaton kun la mortintaj antaŭuloj de l'homo. Ĝenerale ĉe la primitivaj popoloj multe pli, ol ĉe la civilizitaj, ĉiu tribano estas identigata kun sia tuta tribo; en la sangvenĝo, kiu ekzistas kaj ekzistis — kiel oni scias el la historio — inter ĉiuj primitivaj popoloj, unu respondas por ĉiuj kaj ĉiuj por unu el siaj samtribanoj.

La moro, t. e. la kutimo vivi laŭ tradicio, la timo pri ŝanĝoj kaj l'inerto de pensado ludas do la ĉefan rolon en la konservo de establiĝintaj reguloj de l' komuna vivo. Sed hazardaj deflankiĝoj ĉiam eblas kaj por rigore konservi la foje establitan vivmanieron, la maljunuloj, antaŭdiristoj kaj ŝamanoj uzas timigon. Ili minacas al la rompintoj de la moro per venĝo de l'antaŭuloj kaj de diversaj aerkoboldoj. La mont- aŭ arbar-koboldo, lavangoj, neĝoventoj, superakvoj, malsanoj, k. t. p., ekstaras

---

[1] Ĉi-kredo pri la « granda amaso » de l'mortintoj, kiuj protektas la vivulojn, estas bonege pentrita de Elie Reclus en lia libro : *Les Primitifs*.

defende por la piedpremita moro. Kaj por nutri tiun timon pri la venĝo pro rompo de la reguloj kaj moroj estas establitaj sanktecaj ritoj esprimantaj adoradon al naturfortoj, estas farataj oferdonoj al ĉi-fortoj kaj diversaj duonteatraj ceremonioj [1].

La moralo estas metata tiamaniere sub la gardon de diigataj fortoj kaj la adorado al ĉi-fortoj transformiĝas en religion, kiu sanktigas kaj firmigas la moralajn konceptojn [2].

En tiaj cirkonstancoj l'o morala en la homo tiel proksime ligiĝas kun la mitologio kaj religio, ke ĝin apartigi de l'mistikaj ordonoj elsupre kaj de l'religio ĝenerale fariĝas tre malfacile kaj pri tio la dum jarcentoj kreita kuniĝo de l'moralo kun la religio konserviĝas ĝis la nuna tempo.

---

(1) Kelkaj amerikaj esploristoj nomas ĉi-ritojn « dancoj », dum fakte ili havas multe pli gravan signifon, ol simpla amuzo. Sur ili sin apogas la establitaj kutimoj de l'ĉaso kaj fiŝkapto, kaj ankaŭ la tuta vivarango de la tribo.

(2) Profesoro Westermark en sia granda verko fondita sur la konateco kun la loĝantoj de Maroko, samkiel sur la studo de l'vasta literaturo pri primitivaj popoloj, montris, kian signifon en la establo de la devigaj moroj kaj kutimoj havis kaj ĝis nun havas la « malbeno »! Al la homo malbenita de la patro, aŭ patrino, aŭ de la tuta tribo, aŭ eĉ de aparta homo (pro rifuzo helpi lin, aŭ pro ofendo) venĝas la nevideblaj spiritoj, la fantomoj de prapatroj kaj la fortoj de l'naturo.

Simile al ĉiuj primitivaj popoloj, l'antikvaj grekoj dum longa tempo imagis la ĉielajn korpojn kaj la terurigajn fenomenojn de l'naturo en formo de potencaj estaĵoj kun homa aspekto, kiuj konstante intervenas en la vivon de homoj. Admirinda rememoraĵo el tiu tempo postrestis al ni en la « Iliado ». El ĝi oni vidas, ke la moralaj konceptoj tiutempaj havis la saman karakteron, kian ni ĝis nun renkontas ĉe multaj sovaĝuloj. La rompo de ti-kio estis konsiderata tiam morala estis punata de dioj. Ĉiu el ili personigis ti-aliun naturforton en homaspekto.

Sed tiutempe, kiam multaj popoloj ankoraŭ longe restis sur la sama evoluŝtupo, — en la antikva Grekio, jam kelkajn jarcentojn post la epoko, glorkantita en Iliado, t. e. pli ol sescent jarojn antaŭ nia ero (en la VII-a kaj VI-a jarcento antaŭ Kristo), aperis pensuloj, kiuj celis bazi la moralkonceptojn en la homo ne sur la sola timo antaŭ la dioj, sed ankaŭ sur la kompreno de sia propra naturo: sur la memestimo, sento de propra digno kaj sur la ekkono de superaj intelektaj kaj moralaj celoj.

Tiuj pensuloj jam tiam dividiĝis en kelkaj skoloj. Iuj penadis ekspliki* tutan naturon kaj sekve ankaŭ l' on moralan en la homo naturvoje, t. e. per la vojo de ekkono de la naturo kaj de la sperto, — kiel tio estas farata nun en la natursciencoj. Kaj aliuj asertis, ke la origino de la universo kaj ĝia vivo ne estas

eksplikeblaj* naturvoje, ĉar la videbla al ni mondo estas kreitaĵo de supernaturaj fortoj. Ĝi estas la enkorpiĝo de iaj fortoj, aŭ « esencaĵoj », kiuj kuŝas ekster ti-kio estas observebla de la homo. Kaj tial ekkoni la mondon la homo povas ne per la impresoj, ricevataj el la ekstera mondo, sed sole per la abstrakta spekulado, — la metafiziko [1].

Tamen en tiuj « esencaĵoj », kaŝitaj je nia rigardo kaj kompreno, la tiamaj pensuloj vidis la personigon de la « supera racio », de la « Vorto » (aŭ Racio), de la « Supera Volo », aŭ « Universala Animo », pri kiuj la homo povis krei al si koncepton nur per ekkono de si mem. Kiel ajn la abstrakta pensulo-metafizikulo penadis animigi tiujn kvalitojn kaj atribui al ili superhoman kaj eĉ supernaturan ekziston, tamen li prezentis ilin al si similaj al la dioj de l'antikvo, laŭ la bildo kaj similo de l' homa intelekto kaj de la homaj sentoj li eksciadis ion pri tiuj kapabloj kaj sentoj ĝuste observante sin mem kaj aliajn homojn. La imago pri spirita supernatura mondo tiamaniere ĉiam portis en si la post-signojn de la plej primitiva personigo de l' naturo. Homeraj dioj revenadis, — nur en pli animitaj vestoj.

---

[1] « Metafiziko » signifas en greka lingvo « ekster la fiziko », t. e. ekster la limoj de ti-kio apartenas al la fiziko. Tiel Aristotelo nomis unu parton de siaj verkoj.

Tamen dirende estas, ke jam depost la tempo de l'antikva Grekio inkludе ĝis nun la metafizika filozofio varbis alte-talentajn adeptojn. Ili ne kontentiĝis sole per priskribo de la astroj kaj ties movoj, de la tondro, fulmo, falantaj steloj, aŭ de la vivaj vegetaloj kaj animaloj, sed ili penis kompreni la ĉirkaŭantan nin naturon, *kiel la universalan tutaĵon*. Kaj tial ili sukcesis fari multon por evoluigi la konon ĝenerale. Jam la unuaj pensuloj de l'metafizika direkto estis komprenintaj, — kaj tio estis ilia granda merito, — ke kiel ajn la fenomenoj de l'naturo estus klarigataj, — oni ne povas en ili vidi *arbitron* de iuj mondregantoj. Nek la arbitro, aŭ diaj pasioj, nek blindaj hazardoj povas klarigi la vivon de l'naturo. Ni devas konfesi, ke ĉiu fenomeno en la naturo — falo de iu ŝtono, fluo de iu rivero, vivo de certa arbo, aŭ animalo, — estas necesaj elmontroj de la ecoj de la *kompleta tuto*, de la tuta viva kaj malviva naturo. Ili estas neevitebla kaj logika sekvo de la evoluo de la fundamentaj trajtoj de l'naturo kaj de la tuta ĝia antaŭa vivo. Kaj ĉi-leĝojn povas malkaŝi la homa intelekto. Kaŭze de tio la pensuloj-metafizikuloj ofte anticipis la eltrovojn de la scienco, esprimante ilin en poezia formo. Efektive, dank'al tia kompreno de l'universala vivo jam en la kvina jarcento antaŭ nia ero* kelkiuj grekaj pensuloj, — malgraŭ sia metafiziko, — esprimis tiajn supozojn pri naturfenomenoj, ke oni povas

nomi ilin antaŭanoncintoj de la moderna scienca fiziko kaj kemio. Samtiel, pliposte en la mezepoko kaj pli malfrue, inklude ĝis la 17-a jarcento, gravaj eltrovoj estis farataj ankaŭ de tiaj esploristoj, kiuj eksplikante* la spiritan kaj precipe la moralan vivon de la homo per metafizikaj kaj eĉ pure religiaj teorioj, — tamen sekvis la sciencan metodon ĉe la ekstudo de fizikaj sciencoj.

Samtempe ankaŭ la religio akiradis iom post iom pli spiritan karakteron. Anstataŭ la koncepto pri apartaj homsimilaj dioj aperis en Grekio, precipe ĉe la pitagoranoj, la konceptoj pri iuj ĝeneralaj fortoj, kreantaj la vivon de l' mondo. Tia estis la koncepto pri « fajro » (t. e. « termogeno » = varmokreanto), penetranta la tutan mondon; pri « nombroj », t. e. matemataj leĝoj de la movo; pri « harmonio », t. e. pri la laŭleĝeco de la naturvivo. Aliflanke kreiĝis ankaŭ la ideo pri unueca estulo, reganta la tutan mondon. Ankaŭ aperis aludoj pri la « Universa Vero » kaj « Justo ».

Tamen la greka filozofio evidente ne povis longe kontentiĝi per tiaj abstraktaj konceptoj; kaj jam pli ol kvarcent jarojn antaŭ nia ero* aperis unuflanke la *sofistoj* kaj *amoralistoj* (ne rekonantaj la devigecon de moralaj postuloj) kaj aliflanke — la pensuloj, kiel *Sokrato* kaj *Platono* (en la kvina jarcento) *Aristotelo* (en la kvara) kaj *Epikuro* (en la tria), metintaj la bazon de l' etiko, t. e. de la scienco pri l'o morala. Ili ne perdis sian signifon ĝis nun.

La verkoj de la sofisto *Protagoro* (nask. ĉirkaŭ 488 j. antaŭ nia ero*) atingis nin nur en fragmentoj, kaj tial oni ne povas fari al si plenan prezenton pri lia filozofio. Estas nun konate, ke li rilatis negative al religioj kaj ke la mem moralon li konsideris establita de la homaj socioj; kaj tiu moralo liaopinie estis kondiĉata de la tuta evoluo de certa popolo dum certa epoko. Sekve de tio la moralreguloj malsamas ĉe diversaj popoloj. El tio oni konkludis, ke bono kaj malbono estas konceptoj relativaj.

Similajn ideojn predikis ne sole Protagoro, kaj baldaŭ en Grekio kreiĝis tuta *sofista skolo*, kiu disvolvis similajn pensojn.

Ĝenerale en la antikva Grekio ni ne trovas inklinon al la idealisma filozofio. Tie superis la inklino al la *ago*, al eduko de la *volo*, al aktiva partopreno en la vivo de la socio kaj al la formado de homo intelekte forta kaj energia. La kredo al dioj, gvidantaj la homan konduton, estis malaperanta. La tuta vivaranĝo de tiama Grekio, kiu konsistis el malgrandaj, sendependaj respublikoj, la deziregо ekkoni la naturon kaj la konatiĝo kun la ĉirkaŭanta mondo dank'al vojaĝoj kaj koloniz-ado, ĉio-ĉi kune puŝis la homon al la aserto de sia sendependo, al la neado de la mor-kaj kred-povo, al la emancipo de la intelekto. Kaj apud tio rapide evoluis la sciencoj, — la fakto des pli frapanta, ke post malmultaj jarcentoj, jam en la Roma imperio kaj precipe

depost la invado de barbaroj, kiuj ekmovis sin kontraŭ Eŭropo el Azio, la scienca evoluo ekhaltis por multaj jarcentoj en la tuta homaro.

La spirita movado, kreita de la sofistoj, ne povis sin deteni longe en la sama formo. Ĝi neeviteble kondukis al pli profunda studo pri la homo, — pri lia pensado, liaj sentoj, lia volo kaj sociaj instituoj, samkiel pri la tuta vivo de la Kosmo-Universo, t. e. pri la tuta naturo ĝenerale. Kaj ĉe tia studo la supraĵeca rilato de la sofistoj al la moralproblemoj baldaŭ ĉesis kontentigi la enpensemajn homojn. Kaj la disvolviĝo de la sciencoj, emancipante la homon de sklava obeo al la religio kaj tradicio kondukis al ellaborado de la moralfundamento per eksperimenta kono, multe pli plene, ol tion povis fari sofistoj kun helpo de la dialektiko.

Ĉio-ĉi kune aganta malstabiligis la filozofion de simpla neado.

En la nomo de la vera kono kontraŭ sofistoj elpaŝis *Sokrato* (469-399 ant. Kristo). Li partoprenis en iliaj revoluciaj aspiroj, sed li estis serĉanta pli firman apogon por bazi la moralon, ol la supraĵeca kritiko de la sofistoj. Restante revoluciulo en la religio kaj filozofio li ĉion reduktis al la suverena racio de la homo kaj al la formado de interna harmonio inter la racio kaj diversaj sentoj kaj pasioj. Krome, Sokrato certe ne estis « neanta » la « virton », sed li nur komprenis

ĝin tre vaste, — kiel kapablon prosperi en la intelekta disvolviĝo, en la artoj kaj en la kreado; por tio estas antaŭ ĉio necesa *kono*: ne tiom naturscienca kono, kiom la kompreno pri la socivivo kaj pri la reciprokaj rilatoj inter la homoj. La virto, — tiel instruis li, — *ne estas dia sugesto, sed la baẑita kono pri ti-kio estas efektive bona kaj faras la homon kapabla vivi ne forpremante aliujn, sed rilatante al ili juste: kapabla servi al socio kaj ne sole al si mem. Sen tio scio ne estas imagebla.*

Pli komplete ekspozis ĉi-rigardojn kaj animigis ilin per la idealisma kompreno de la moralo la disĉiplo de Sokrato — *Platono* (428-348 ant. Kr.). Li ankoraŭ pli profunden enrigardis la esencon de l'o morala, kvankam li pensis, kiel metafizikulo. Ne metante antaŭ si la taskon transdoni la principajn pensojn de Platono en ilia abstrakta formo, sed nur sekvante ilian esencon, oni povas tiel esprimi lian doktrinon: — En la naturo mem ekzistas la ideoj de la bono kaj justo. En la universa vivo ekzistas multo malbona kaj maljusta, sed flanke de tio troviĝas la elementoj de ĉio bona. Tiun bonon kaj juston Platono penadis klarigi kaj montri tutan ĝian forton, por ke ĝi fariĝu gvidfadeno en la vivo de la homoj.

Bedaŭre, anstataŭ iri la vojon, kiu jam estis tiam markiĝanta en Grekio, kaj montri — en kia aspekto la principoj de l'o morala

kaj de la bono rezultas el la mem vivo de la naturo, el la socieco de la homoj kaj el lia propra pensmaniero — ĉu denaska, ĉu kreita de la socivivo, — Platono estis serĉanta la bazon de l'o morala ekster la mondo, — *en la Ideo, grundemetita en la arango de la monda vivo, sed kiu ne esprimiĝas en ĝi tute difinite.*

Malgraŭ la senfina kvanto da interpretoj de la abstraktaj pensoj de Platono, estas tamen malfacile kapti la esencon de lia pensado. Sed ni verŝajne ne eraros, se ni diros, ke kun sia profunda kompreno de la intima ligo inter la vivo de l'homaro kaj la tuta vivo de la naturo, la granda greka pensulo ne povis eksplikadi* l'on moralan en la homo sole per simpla serĉado de l'o agrabla por ĉiu persone, kiel tion estis farantaj la sofistoj. Ankoraŭ malpli li kapablis konsideri la moralon — hazarda produkto de la socieco — nur tial, ke ĝi havis diversajn formojn diversaloke kaj diversatempe. Li devis meti la demandon, kaj li efektive ĝin metis: — kial do okazas tiel, ke kvankam la homo sin gvidas per la serĉado de l'o agrabla por li persone, li tamen venas al moralkonceptoj — esence similaj ĉe diversaj popoloj diversepoke, ĉar ili metas, kiel dezirindon — *la feliĉon por ĉiuj?* Kial finfine la feliĉo *de personeco* identiĝas kun tiu *de la plimulto da homoj?* Kial la unua ne estas ebla sen la pli ĝenerala dua, kaj kio aliigas la homon el sinamema estulo en est-

ulon, kapablan konsideri alies interesojn kaj ofte oferi por ili la personan feliĉon kaj vivon.

Kiel disĉiplo de Sokrato, Platono jam ne povis atribui la originon de la koncepto pri la bono al sugestoj de la dioj: Tondro, Suno, Luno, k. t. p., t. e. al la naturfortoj, vestitaj homaspekte. Kaj dum tiama embria stato de la konoj pri la homaj socioj, li ne povis serĉi pri la homaj socioj, li ne povis serĉi la eksplikon* de la bono, kiel ni serĉas kaj trovas nun en la pograda evoluo de la sociemo kaj de la sento de egalrajto. Tial li trovis ilian eksplikon* en la *Ideo,* — en io abstrakta, kio penetras la tutan mondon, la tutan kosmon, inklude la homon. — « En tiu ĉi mondo ne povas aperi io, kio ne troviĝas imanente en la vivo de l'tuto », — tia estis lia ĉefa penso: tute ĝusta, filozofia penso. Tamen planan konkludon el ĝi li ne faris. Ŝajnis, li devus fari konkludon, ke se la homa racio serĉas la bonon, juston, ordon — en formo de « vivleĝo », li tion faras, ĉar *ĉio-ĉi ekzistas en la vivo de l'naturo,* ke la homa intelekto ĉerpas el ĝi elementojn de la bono, justo kaj sociema vivo. Anstataŭ tio Platono, — kvankam li celis liberiĝi de la eraroj de siaj antaŭirantoj, — tamen venis al la konkludo, ke la serĉado de la homo al io pli bona, ol la ordinara vivo, t. e. la serĉado den* la Bono kaj Justo, havas sian eksplikon* kaj apogon ne en la naturo, sed en io, kio troviĝas ekster

la limoj de nia ekkono, de niaj sentoj kaj sperto, nome en la Monda Ideo.

Estas kompreneble, kiel poste la « novplatonanoj » kaj pliposte la kristanoj profituzis tian konkludon de la saĝa kaj simpatia greka pensulo, — komence por la mistikismo kaj poste por bazi monoteismon kaj por eksplikо* de ĉio morala en la homo — tute ne per la natura evoluo de sociaj sentoj kaj de la racio, sed per revelo, t. e. per la sugestoj desupre, venantaj de la plej supera estulo.

Estas same kompreneble, ke Platono ne pripensis la demandon pri neceso bazi la moralon sur la fakto mem de socivivo, ĉar tio lin verŝajne venigus al rekono de la egalrajto de la homoj kaj ke li same ne estis penetrita de la penso, ke la moraldoktrinoj estos senfortaj, se la socia vivordo kontraŭas al ili. En sia « Respubliko », Platono elmetis kiel idealon de sociordo, samkiel liaj antaŭirantoj, — la klasan respublikon, fonditan sur submetiĝo de certaj klasoj al aliuj, eĉ sur la sklaveco kaj mortpuno.

Per tio estas ankaŭ klarigebla, — kial poste, tra la tuta historio de Etiko, kiel scienco pri evoluo de la moralaj konceptoj en la homo, komencante de la antikva Grekio inklude ĝis *Bacon* kaj *Spinoza,* pasas ĉiam la sama fundamenta ideo pri la ekster-homa kaj ekster-natura origino de la moralo.

Estas vere, ke jam kelkiuj sofistoj, antaŭirantoj de Platono estis venintaj al la perna-

tura ekspliko* de fenomenoj. Jam tiam ili provadis ekspliki* la naturvivon per mekanaj* (mekanikaj) kaŭzoj, samkiel nun ĝin eksplikas* la « pozitiva » filozofio. Kaj en la moralkonceptoj kelkiuj sofistoj vidis eĉ necesan rezulton de la fizika strukturo de la homo. Tamen la sciencaj konoj de la homaro tiuepoka ne jam sufiĉis por konsenti kun tia kompreno de l' o morala, kaj por longaj jarcentoj la Etiko restis sub kuratoreco de la religio. Nur nun ĝi komencas konstruiĝi sur bazo de la naturscienco.

Ĉe tia malalta nivelo, sur kia troviĝis tiam la kono pri la naturo, la moraldoktrino de Platono nature estis la plej komprenebla por la plejmulto da kleraj homoj. Kredeble, ĝi ankaŭ konformis al novaj religiaj fluoj, kiuj venadis el oriento, kie tiutempe estis formiĝanta budhismo. Sed sole per tio oni ne povus ekspliki* la influon de Platono, kiu sentiĝas ĝis nun. La kaŭzo estas, ke Platono enportis en la Etikon la *idealan komprenon pri la moralo*. La « animo » por li estis la kunfandiĝo de la racio, sento kaj volo, el kiuj sekvas la saĝo, kuraĝo kaj sindetenemo en la pasioj. Lia idealo estis la Amo, la Amikeco. Sed la vorto (eroso) havis tiam pli larĝan sencon, ol nun, kaj Platono komprenis sub Eroso ne nur la reciprokan alligitecon de du estuloj, sed ankaŭ la sociecon, fonditan sur harmonio inter la celadoj de la individuo kaj tiuj de ĉiuj ceteraj socianoj. Lia Eroso estis ankaŭ ti-kio

nun estas nomata *sociemo, aŭ reciproka kun-sento, simpatio*. Tiu sento, laŭ konkludoj farendaj el la faktoj, aliloke de mi indikitaj el la vivo de animaloj kaj de la homaro, *penetras la tutan mondon de la vivestaĵoj kaj estas samtiom necesa kondiĉo de ilia vivo, kiom la instinkto de la sinkonservo*. Platono tion ne sciis, sed li jam eksentis la signifon de tiu fundamenta faktoro de ĉiu progresiva disvolviĝo, t. e. de ti-kio nun estas de ni nomata la *Evoluo*.

Plue, kvankam Platono mistaksis la signifon de la justo por formado de la moralo, tamen li prezentis la juston en tia formo, ke oni kontraŭvole miras, kial ĝi ne estis metita en la rezonadoj de sekvintaj lin pensuloj, kiel bazo de la Etiko. Efektive, en la dialogo « La unua Alcibiado », atribuata al Platono junaĝa, Sokrato konfesigas Alcibiadon, ke kvankam la homoj kapablas konduki riskozajn militojn kvazaŭ pro la justproblemo, tamen ili esence militas pro tio, kion ili kredas esti por si pli utila. L'o justa estas ĉiam bela; ĝi estas ĉiam bono, t. e. ĉiam utila ; do estas neeble montri ion, kio estus pli grava, ol la justo, belo, bono, utilo (*).

Estas interese, ke kiam en la sama dialogo Platono parolas per la buŝo de Sokrato pri

---

(1) « L'unua Alcibiado », verkita de la junaĝa Platono.

la animo kaj pri ĝia dieca parto, li konsideras « dieca » tiun ĝian parton, per kiu ĝi ekkonas kaj pensas, t. e. ne la senton, sed la racion. Kaj li finas ĉi-tiun dialogon per jenaj vortoj, metitaj en la buŝon de Sokrato :

« Vivante kune kun via urbo (komunumo) juste kaj prudente, vi vivos ti-kiel plaĉas al dioj... Kaj dume vi atente rigardos l'on diecan kaj klaran, t. e. la racion, kiu faras forton de la animo. Sed kiam vi fiksrigardos tiun diecon, vi ekvidos kaj ekkonos vin mem : kio vi estas kaj kio estas por vi bona ».

En ankoraŭ pli difinitaj esprimoj skribis Platono pri la justo kaj pri l'o morala ĝenerale en la dialogo « Festeno », kie la partoprenantoj de la festeno laŭdegas la dion de l'amo — Eroson. Certe, ne en la unua parto de ĉi-konversado, en kiu oni eldiras trivialaĵojn, sed en la dua, kie interparolas poeto-dramaturgo Agatono kaj Sokrato.

La virtoj de Eroso, — diras la poeto, — estas ĝia justo, sinrego kaj kuraĝo ; plie — ĝia amo al belo : ĝi ne toleras malbelon. Ĝi nin savas de la fremdeco kaj sugestas al ni reciprokan konfidemon... Ĝi enportas en niajn rilatojn mildecon kaj elpelas la maldelikatecon. Ĝi malavaras por la bonvolo kaj avaras por la kolero... Ĝi zorgas pri la bonuloj kaj malzorgas pri la malbonuloj, k. t. p. (1).

---

(1) Platono « Festeno, aŭ dialogo pri la amo », ĉap. 19.

En la sama verko Platono, per la buŝo de Sokrato, asertas kaj pruvas, ke la amo estas nedisigeble ligita kun la bono kaj belo. La amo, — diras Sokrato en « Festeno », — ekzistas « por krei en l' o bela kiel fizike, samtiel spirite ». La amo celas komuniĝi al la bono kaj belo kaj tiamaniere la amo finfine reduktiĝas al serĉado de la bono kaj belo.

La belo, kiu troviĝas en iu korpo estas parenca al la belo, kiu troviĝas en ĉiuj ceteraj korpoj. Tion kompreninte la homo devas ekami ĉiajn belajn formojn... kaj la spiritan belon li devas taksi multe pli alte, ol la belon korpan. Tiavoje li venos al kontemplado de la belo, kiu konsistas en la plenumo de siaj devoj. Kaj tiam li bone komprenos, ke la belo estas ĉie identa, kaj tiam la belo de formo ne plu gravos por li... Atinginte tian gradon de kompreno pri la belo, la homo, laŭ Platono, — « ekvidos ion mirinde-belan en sia naturo » — « la belon eternan, ne kreitan kaj ne pereantan belon, kiu ne pligrandiĝas, sed ankaŭ ne malpliiĝas, la belon neŝanĝeblan en ĉiuj siaj partoj, por ĉiuj tempoj, en ĉiuj rilatoj, en ĉiuj lokoj kaj por ĉiuj homoj! » — Atingante superan gradon de idealismo Platono aldonas, ke « tiu belo ne venos, kiel aĵo, troviĝanta en io, p. e. en iu vivulo sur la tero, aŭ en la ĉielo, aŭ en iu alia objekto, sed kiel tiaĵo, kio estante homogena ekzistas ĉiam sendepende, per si mem kaj en si mem »,

alivorte kiel koncepto de nia racio kaj de niaj sentoj — kiel Ideo [1].

Tia estis la idealismo de Platono. Tial ne estas mirinde, ke li havas adeptojn ĝis nun. Unuflanke, li malfermis la vojon al la multenombra skolo de « eŭdemonistoj », kiuj ĝis nun dominas* en la Etiko kaj asertas samkiel tion estas asertintaj antaŭ Platono la sofistoj kaj post li Epikuro kaj liaj adeptoj, ke ĉio, kion la homo faras, li faras por tio, « ke al li estu bone ». Kaj Platono, certe, komprenis tiun « bone » ne en mallarĝa senco de ĝojoj duonhomaj kaj duonbestaj, sed en tiu supera senco, kiun li estas difininta en la dialogoj « Lahes » kaj « Festeno ». Sed aliflanke, enkondukante samloke la koncepton pri la « animo » kaj « belo », kiel pri io entenata, vere, en la naturo, sed pli supera ol ĝi, li preparis la vojon por la religia etiko, kaj tial li restas, ĝis nun plejŝatato de religiaj pensuloj. Li estis ilia antaŭiranto. Tamen estas rimarkinde, ke lia alta kompreno pri la naturo kaj pri la morala belo en la naturo, — ne sufiĉe taksita ĝis nun de religia etiko, samkiel de nereligia, — apartigas lin de ili ambaŭ.

En la dua parto de sia vivo, kiam Platono submetiĝis al la influo de *Pitagoranoj* kaj estis provanta kun la helpo de la Sirakuza tirano (diktatoro, aŭ aŭtokrato) *Dionizo, krei*

---

(1) Platono « Festeno », ĉap. 28 kaj 29.

*ŝtaton laŭ sia plano,* kiun li ekspozis en la verkoj « La ŝtato » kaj « La leĝoj » (produktaĵoj de la jam kadukiĝanta intelekto) li jam ne plu estis en la unua parto de sia vivo kaj instruado. En sia ideala ŝtato, kiel tion montris kun maldolĉa sento lia granda ŝatanto Vlad. Solovjev, Platono ne nur konservis la sklavsistemon, sed ankaŭ la mortpunon por la sklavo, se li rifuzas denunci kaj por la civitanoj ĝenerale pro la malrespekto al la establita religio. Li alvokadis, tiamaniere, la homojn fari la saman krimon, kiu en lia junaĝo tiel profunde li indignigis, kiam rezulte de la sama religia maltoleremo estis ekzekutita lia instruisto Sokrato. « Eroso », t. e. la amo, kiun Platono predikis en tia mirinda formo, ne detenis lin de la laŭdo al tiuj samaj krimoj, en kiujn enfalis pliposte ankaŭ la kristana eklezio, malgraŭ la ampredikо de ĝia fondinto.

*Aristotelo.* La instruo de Aristotelo, kiu vivis en la kvara jarcento (384-322 j. ant. K.) okupas mezan pozicion inter la naturscienca kaj metafizika kompreno pri la moralo.

La eksplikon* de niaj moralkonceptoj Aristotelo serĉis ne en supera Racio kaj ne en la monda Ideo, kiel tion faris Platono, sed en la reala vivo de la homoj: *en ilia serĉado de sia feliĉo kaj de sia utilo kaj en la racio de la homo.* En tiuj serĉadoj, — tiel instruis li, — formiĝis du ĉefaj sociaj virtoj:

la *amikeco*, t. e. la amo al homoj (ni dirus nun : la sociemo) kaj la justo. Sed la juston li komprenis, kiel ni vidos pli malsupre, ne en senco de egalrajto.

En la filozofio de Aristotelo ni havas unuafoje la memaserton (sinjesigon) de la homa racio. Samkiel Platono, li opiniis, ke la fonto de la « racio kaj movado en la mondo », ne intervenas en la mondvivon. Ĝenerale, dum Platono celis konstati la ekziston de du apartaj mondoj : la mondo sentebla, perceptebla per niaj sentoj kaj la mondo supersenta, nepercepteebla per ili, — Aristotelo celis ilin kunigi. En lia doktrino mankis loko por kredo kaj li malakceptis la personan senmortecon. « La veran komprenon pri nia vivo, — diris Aristotelo, — ni povas ricevi nur se ni komprenos la kosmon (¹).

La bazon de la moralkonceptoj de la homo li vidis en la faktoj de la reala vivo. Ĉiuj celas al pleja « beato », aŭ bono (nun ni diras : al pleja feliĉo) ; la beato estas ti-kio faras la vivon dezirinda kaj kontentiga. La kruda amaso vidas la bonon kaj beaton en la ĝuo, sed la kleraj homoj serĉas ilin en io « supera » : ne en la «ideo», kiel instruis Platono, sed « en racia agado, aŭ almenaŭ ne en malracia agado de l' animo » (Etiko I, § 6). La bono por la homo konsistas en agado de la animo, kon-

---

(¹) « Etiko al Nikomaĥ », parto I.

forma al virto dum tuta vivdaŭro, — kaj en la aktiva virto, kunigita kun energio (I, §§ 6-9). La beaton al ni donas vivo, konforma al postuloj de la justo, kaj tia vivo estas plej bela : ĝi kunigas en si la sanon kaj la atingon de ti-kio estas amata [1].

« Tamen, ŝajnas, — aldonas Aristotelo, — « ke la beato bezonas ankaŭ eksterajn bonaĵojn ». Al tiuj li alkalkulis « amikojn, riĉaĵojn, politikan influon, noblan devenon, bonajn infanojn kaj belecon ». Sen « simila vanteco » la beato ne ŝajnas esti plena (I, § 9). En la distribuado de la « beato » ĉefan rolon ludas la hazardo. Tamen « ĉiuj, ne tute senigitaj de la virto, povas ĝin atingi per certa studado kaj laboro (§ 10), ĉar eĉ neracia parto de l'animo (niaj pasioj) « iom obeas al la racio » (I. 13). Ĝenerale, al la racio Aristotelo destinis grandegan rolon en la formado de la moralo de ĉiu homo : al ĝi apartenas la detenado de pasioj ; dank' al ĝi ni kapablas kompreni, ke la celado al la bono de la socio donas multe pli altan, multe pli « belan » « beaton », ol la celado al kontentigo de siaj personaj impulsoj.

El tiuj citaĵoj oni vidas, ke anstataŭ serĉi la fundamenton de la moralkonceptoj de la

---

[1] Mi uzas tie-ĉi la vorton « beato ». Sed oni devas memori, ke la vortoj iom modifas sian sencon diversatempe. Nun, sub la vorto « beato » ĉe Aristotelo oni devas kompreni ti-kion la modernaj utilistoj nomas « supera bono », aŭ feliĉo.

homo en la sugestoj desupre, Aristotelo jam reduktis tiujn konceptojn al decido de la racio, kiu serĉas por si la plejan kontentigon kaj feliĉon; li krome komprenis, ke la feliĉo de la individuo estas intime ligita kun la feliĉo de la socio (de la ŝtato, kiel diris li, komprenante sub la nomo: « ŝtato » organizitan socivivon). Tiamaniere, Aristotelo prezentas antaŭiranton por la multnombra skolo de « eŭdemonistoj », kiuj pli poste eksplikis* la moralajn instinktojn, sentojn kaj konduton de la homo per la serĉado de sia persona feliĉo, kaj same por la moderna skolo de « utilistoj », komencante de Bentham kaj Mill — ĝis Herbert Spencer.

La « Etiko » de Aristotelo, laŭ sia formo kaj laŭ la zorga disvolvo de ĉiu aparta penso, estas sendube ne malpli admirinda memoraĵo pri la evoluo de la antikva Grekio, ol liaj ceteraj verkoj — naturscienca kaj naturaj. Sed ankaŭ en la « Etiko », kiel en « Politiko », li fordonas plenan tributon al ti-kio nun estas nomata oportunismo. Tia estas lia konata difino de la virto: — « Do, instruis li, — la virto estas antaŭcelita (konscia), akirita eco de la animo, kiu konsistas en *subjektiva mezo* kaj estas determinita de la racio. Kaj ĝi estas determinita ti-kiel ĝin difinus prudenta homo: *la mezo inter du malbonoj — superfluo kaj manko* (Parto II, 5-6; ankaŭ en § 9).

Kaj tute same li rilatis al la koncepto pri

la justo ([1]). Kvankam Aristotelo dediĉis al ĝi apartan ĉapitron de sia « Etiko », tamen li determinis ĝin en la sama spirito, kiel la virton ĝenerale, t. e. kiel mezon inter du ekstremaĵoj kaj li ĝin komprenis ne kiel rekono de la homa egalrajto, sed en tre limigita senco ([2]).

Tian komprenon de la justo oni devas des pli noti, ke la justo prezentiĝis por li kiel plej granda el ĉiuj virtoj, « pli mirinda kaj brila, ol vespera kaj matena stelo ». « En la justo estas entenataj ĉiuj virtoj », kiel diris tiama proverbo. Aristotelo sendube komprenis ĝian moralan signifon, ĉar li instruis, ke « sole nur la justo, el ĉiuj virtoj, ŝajnas, *konsistas*

---

([1]) « Nun, ni turnu nin al ekzamenado de la justo kaj maljusto kaj al tio — kiajn agojn ili koncernas kaj kiaspecan mezon prezentas la justo kaj inter kiuj ekstremaĵoj troviĝas l'o justa », — tiel komencis li la 5-an libron (« Pri la justo »).

([2]) « Maljusta oni nomas tiun, — skribis li, — kiu rompas la leĝon, ankaŭ tiun, kiu prenas la superfluon de aliuj, kaj la homon, kiu ne egale rilatas al aliuj ». Do, la koncepto pri la justo signifas samtempe laŭleĝan, samkiel egalmezuran, kaj la maljusto — kontraŭleĝan kaj malegalan (rilaton al homoj). « Kaj la leĝoj, — daŭrigas li, — koncernas ĉiaspecajn rilatojn, celante aŭ la bonon komunan por ĉiuj homoj, aŭ la bonon por plej bonaj kaj plej fortaj homoj » (V, 3). Lia interpreto de la justo, kiel obeado al la leĝo, kondukas Aristotelon, — kiel oni povis antaŭe atendi en societo, fondita sur la sklavsistemo, — al la rekono de la malegalrajto por la homoj.

*en bono, kiu portas utilon al aliu persono»* (§ 3), alivorte, ĝi estas « virto » ne egoista [1].

Pli ol tio, Aristotelo tute ĝuste konkludis, ke « ĉiuj aliuj maljustaj agoj estas ĉiam subklasigeblaj sub alia speco de malvirto », el kio oni povas dedukti, ke li ankaŭ komprenis, ke ĉiu ago, kiun ni nomas malbona, preskaŭ ĉiam prezentas maljuston rilate al iu.

Sed en la sama tempo, distingante inter du specoj de maljusto — ĝenerala, konsistanta en la rompo de la leĝo, kaj speciala, konsistas en la malegala rilato al homoj, kaj same inter du respektivaj specoj de justo, Aristotelo rekonis ankoraŭ du specojn de « speciala justo », el kiuj la unua elmontriĝas « *en distribuado* (egala, aŭ neegala) de honoroj, mono, aŭ ĝenerale de ĉio distribuebla inter la homoj, partoprenantaj en certa socio », kaj la dua — « *en egaligo* de ti-kio prezentas objekton de interŝanĝo ». Kaj la granda pensulo de l'antikva mondo tuj aldonis al tio, ke ankaŭ en la egalmezuro, do ankaŭ en la justo devas esti « mezo ». Kaj ĉar la « mezo » estas koncepto tute kondiĉa, — li per tio nuligis la mem koncepton pri la justo, kiel pri *ĝusta* solvo de komplikaj, dubaj moralproblemoj, kie la homo hezitas inter du eblaj

---

[1] « En tia senco la justo ne estas parto de la virto, sed la tuta virto, kaj ĝia kontraŭo — la maljusto ne estas unu parto de la malvirto, sed la malvirto ĝenerale » (V. 3).

decidoj. Kaj efektive, Aristotelo malrekonis la egalon en la « distribuado » kaj postulis nur « *egaligon* » (1).

Estas tiamaniere klare, ke vivante en socio, kie ekzistis sklavsistemo, Aristotelo ne kuraĝis konfesi, ke la justo estas egalrajto por la homoj. Li sin limigis per la komerca justo kaj eĉ ne elmetis la egalrajton, kiel idealon de socivivo. La homaro estis destinita travivi

---

(1) Tio evidentiĝas, — aldonis li, — el popoldiro: « Dividi laŭ digno ». Ĉiuj homoj konsentas, ke la distribuanta justo devas gvidi sin per digno; sed mezurilon de la digno ne ĉiuj vidas en la samo; civitanoj de la demokratio ĝin vidas en la libero, tiuj de la oligarkio — en la riĉeco, kaj aliuj de la aristokratio — en la virto (V, 6). Kaj resumante ĉion diritan por konfirmi sian penson li konkludis el siaj rezonoj per la vortoj: « Do, ni difinis la koncepton de la justo kaj la koncepton de la maljusto. El tiuj difinoj estas klare, ke la justa agadmaniero troviĝas meze inter la kaŭzado de kaj suferado pro la maljusto. La unua celas havi pli, ol decas, kaj la justo estas la mezo », k. t. p. (V, 9). Aristotelo kelkfoje revenadis al tiu temo. Tiel, en la libro VIII (§ 9) li skribis, ke « en la justo ĉe la unua vico troviĝas la egalo laŭ digno kaj ĉe la dua jam estas la kvanta egalo ». En la libro « Pri la justo » (V, 10) li eĉ defendis la sklavecon per tiaj vortoj: — « Kio koncernas la rajton de la sinjoro super sia sklavo kaj de la patro super siaj infanoj tie ĉi... ne povas esti ia maljustaĵo kontraŭ tio, kio ja estas ies absoluta propraĵo. La sklavo kaj la infano dum ĝi ne jam apartiĝis de la familio, prezentas el si kvazaŭ parton de sia sinjoro sed neniu malutilos al si mem konscie; tial ne povas esti maljusto rilate sin mem ».

ankoraŭ proksimume du mil jarojn en organizitaj socioj, antaŭ ol en unu lando — en Francio — la egalrajto estis proklamita idealo de sociordo, kune kun la libero kaj frateco.

Ĝenerale en la problemoj de la moralo kaj en la politiko Aristotelo ne antaŭiris sian tempon. Sed samtempe en la difinoj de la scienco, saĝo kaj arto (VI, 3, 4, 7) li estis antaŭanoncinto de la filozofio de *Bacon*. En la analizo de diverspecaj « bonaĵoj » kaj en klasifikado de la plezuroj li jam anticipis *Bentham*. Krome, li, unuflanke, komprenis la signifon de simpla sociemo, kiun li tamen miksis kun amikeco kaj reciproka amo (VIII, 8) kaj, aliflanke, li la unua ĝuste taksis ti-kion tiom facile preterlasis la plejmulto da modernaj pensuloj, — nome, ke parolante pri la moralo oni devas distingi inter tio, kion ni rajtas postuli de ĉiuj kaj tiu heroeca virto, kiu superas la fortojn de ordinara homo (VII, 1). Kaj dume ĝuste tiu ĉi kvalito (kiun ni nun nomas sinofero, aŭ grandanimeco) progresigas la homaron kaj elvokas la celadon al efektivigo de l' *o bela*, kion celis disvolvi la Etiko de Aristotelo (la tuta § de la XIII-a libro). Sed postuli tion de ĉiuj ni ja, certe, ne rajtas.

Tia estis la moralfilozofio de la granda, sed ne profundpensa scienculo, kiu elstaris super tiama civilizo kaj kiu dum la lastaj tri jarcentoj (depost la Renesanco en 16-a jarcento) forte influis al la scienco ĝenerale kaj same sur la etikan filozofion.

*Epikuro.* — La instruoj de Platono kaj de Aristotelo prezentis tiamaniere du skolojn, kiuj sufiĉe akre disiris en la kompreno pri l'o morala. La diskutoj inter ili longe daŭris post la morto de iliaj fondintoj. Sed iom post iom ili perdis la antaŭan intereson, ĉar ambaŭ skoloj jam konsentis pri tio, ke la moralo en la homo ne estas hazarda fenomeno kaj ke ekzistas moralkonceptoj, propraj al ĉiuj homsocioj.

En la 3-a jarcento antaŭ nia ero* elpaŝis du novaj skoloj — *stoikuloj* kaj *epikuranoj*. La stoikuloj instruis, simile al siaj antaŭirintoj — Platono kaj Aristotelo, — ke oni devas vivi *konforme al sia naturo*, t. e. al sia racio kaj kapabloj, ĉar sole en tia vivo ni trovas la plejan feliĉon. Sed, kiel estas konate, ili precipe akcentis, ke la homo trovas la feliĉon « Eŭdemonion » ne en postkurado por la eksteraj bonaĵoj — riĉaĵo, honoro, k. s., sed en la celado al io supera, ideala; en la disvolvo de la anima vivo por la bono de la homo mem, de lia familio kaj de la tuta socio; kaj ĉefe en la atingo de la *interna libero*.

Pri la instruo de la stoikuloj mi parolos plue, en la sama ĉapitro. Tie-ĉi mi nur rimarkigu, ke per sia instruo la stoikuloj kvankam malakceptante Sokratan metafizikon de la moralo, tamen daŭrigis lian aferon, ĉar ili enkondukis la koncepton pri la *kono*, ebliganta analizi diversajn specojn de vivĝuo kaj serĉi la feliĉon en la *pli perfekta* kaj spirit-

oza ĝia formo. La influo de la stoikuloj, kiel ni vidos plue, estis grandega, precipe pliposte, en la roma mondo; ĝi preparis la mensojn al akcepto de la kristanismo, kaj ni sentas ĝin ĝis nun. Precipe tio estas direnda pri la instruo de *Epitekto* (fino de la 2-a kaj komenco de la 1-a jarcento ant. Kr.), kies esenco estis alproprigita de la pozitivismo kaj de la moderna naturscienca etika skolo.

Kontraŭe al la stoikuloj, la *sofistoj*, precipe *Demokrito* (470-380 j. ant. Kr.) — la unua fondinto de la molekula fiziko, kaj ĝenerale la skolo de la *cirenuloj*, elmetante kiel ĉefan trajton de la homo kaj de ĉiu vivulo la serĉadon de plezuro, ĝuo, feliĉo (*gedonismo*, de la greka vorto « gedone »), nesufiĉe nuancigis, ke povas ekzisti diversaj specoj de la serĉado de feliĉo, komencante de pure-animala egoismo ĝis la plej ideala sinofero, de mallarĝe-personecaj celadoj ĝis celadoj larĝe-sociecaj. Kaj la tasko de la etiko konsistas ĝuste en tio — ekzameni tiujn diversajn specojn de la feliĉo-serĉado kaj montri — al kio ili kondukas, kian gradon de kontentiĝo donas tiuj kaj aliuj. Tion faris tute bonkonscie *Epikuro*, kiu vivis en la 3-a jarcento kaj atingis larĝan konatecon en tiama greko-roma mondo, dank'al sia prilaborita *eŭdemonismo*, t. e. moraldoktrino, ankaŭ fondita sur la serĉado de feliĉo, sed kun la analizo de ti-kio plej bone kondukas al feliĉa vivo.

« La celo de la vivo por ĉiuj vivuloj, al

kiu ili aspiras senrezone, estas la feliĉo — tiel instruis Epikuro, — (oni povas ankaŭ diri la « agrablo ») ĉar apenaŭ ili naskiĝas, al ili jam plaĉas ĝuo kaj ili kontraŭagas al sufero. La racio tie ĉi ludas nenian rolon : la naturo mem direktas ilin tiuflanken. Racio kaj Sento tie ĉi kunfandiĝas kaj la racio submetiĝas al la sento ». Unuvorte, « la plezuro estas la komenco kaj la celo de feliĉa vivo — la unua kaj natura bono ». La virto estas nur tiam valora, kiam ĝi kondukas al ĉi bono, kaj la filozofio estas energio, kiu per vojo de rezonado donas feliĉan vivon (1).

Plue, sian ĉefan penson Epikuro — verŝajne kun intenco, — esprimis en sufiĉe akra formo. « La elirpunkto kaj la radiko de ĉiu bono, — diris li, — estas la plezuro de la stomako ». Tiun maksimon larĝe utiluzis liaj kontraŭuloj por prezenti la epikurismon en ridinda formo. Tamen Epikuro evidente komprenis sub tio nur, ke la elirpunkto de agrablaj sentaĵoj, el kiuj poste formiĝos malaltecaj kaj pli superaj sentaĵoj, — estas la plezuro de la

---

(1) En la ekspozo* de la doktrino de Epikuro mi sekvas plejofte M. Guyau en lia rimarkinda verko : « La morala instruo de Epikuro kaj ĝia rilato al modernaj instruoj », kie li detale studis ne nur malmultajn liajn verkojn, kiuj postrestis ĝis nun, sed ankaŭ la verkojn de ti-kiuj ekspozis* lian instruon post lia morto. Bonan taksadon pri la instruo de Epikuro ankaŭ donis Jodl, Wundt, Paulsen, k. a.

nutrado. Iom post iom ĝi variiĝas en mil manieroj, transformiĝas en la plezuron de la gusto, vido, imago; sed la elirpunkto de agrablaj sentaĵoj en la animalo kaj en la homo estas la agrabla sento, ricevita de nutrado; kun tio konsentas ankaŭ la modernaj biologoj, kiuj esploras la unuajn paŝojn de la konscia vivo, precipe se konsideri pluajn eksplikojn* de la epikuranoj.

« Saĝaj kaj belaj kozoj*, skribis Epikuro, — estas ligitaj kun tiu plezuro ». Ĝi, certe, ne estas la fina celo de la feliĉo, sed ĝi povas esti konsiderata kiel elirpunkto, ĉar sen nutrado la vivo ne estas ebla. Kaj la feliĉo aperas el la tuta sumo de plezuroj; kaj dum aliuj gedonistoj (ekz. Aristipo plijuna) nesufiĉe distingis inter ĉiuj ĝuoj, Epikuro enkondukis la taksadon de la plezuroj laŭ ilia influo sur nian vivon, en ĝia tuto. La mem suferoj povas esti utilaj, — instruis li, — kaj povas konduki al la bono. Tiamaniere, la etiko de Epikuro leviĝis jam multe pli alte, ol la etiko de simpla plezuro(1): ĝi eliris la vojon, laŭ kiu iris en 19-a jarcento Bentham kaj John Stuart Mill.

Elmetante kiel celon por la homo feliĉan vivon en ĝia tuto, sed ne la kontentigon de pasantaj kapricoj kaj pasioj, Epikuro montris, kiel tion atingi. Antaŭ ĉio oni devas limigi

---

(1) Tio estas bone montrita ĉe multaj esploristoj, inter ili ĉe Guyau (ĉap. III, § 1, kaj ĉap. IV, Enkonduko).

siajn dezirojn kaj esti kontenta pri malmulto. Tie-ĉi Epikuro, kiu en sia propra vivo estis preta kontentiĝi de hordea paneto kaj akvo, parolis jam, kiel la plej rigora stoikulo[1]. Kaj plue, vivi sen internaj kontraŭdiroj, per *integra vivo*, en harmonio kun si mem, kaj senti, ke vi vivas aŭtonome, sed ne en sklavesto ĉe eksteraj influoj [2].

La principo de konduto de la homo devas esti ti-kio liveras al li la plej grandan kontentigon. Sed tia principo ne povas esti la inklinoj al persona utilo, ĉar la pleja feliĉo estas atingebla per la *akordigo de la personaj celadoj kun la celadoj de aliuj*. La feliĉo estas liberiĝo de la malbonaĵoj. Sed tia libero ne estas atingebla, *se la vivo de ĉiu aparte ne estas akordita kun la intereso de ĉiuj*. Pri tio nin instruas la vivo. Kaj la homo, kiel estulo inteligenta, ŝcipovanta utiligi la lecionojn de la sperto, elektas inter la agoj, kiuj kondukas al ĉi-harmonio kaj tiuj, malproksimigantaj de ĝi. Tiel formiĝas la morala fizionomio de la socio — ĝia etiko por certa epoko.

Nun estas facile kompreni, kiel Epikuro, komencinte per la aserto, ke la virto en si mem kaj la neprofitemo en ĝusta senco ne ekzistas tute, kaj ke la tuta moralo estas

---

(1) Samloke, IV, § 1.

(2) Samloke, IV, § 2.

nenialio, ol konsciita egoismo (memamo), fine venis al moraldoktrino, kiu en siaj konkludoj ne estis malpli alta ol la doktrinoj de Sokrato kaj eĉ de stoikuloj. Pure-korpa plezuro ne ampleksas la tutan vivon de la homo; ĝi rapide pasas. Sed ekzistas vivo de la *intelekto kaj koro*, vivo de la *rememoroj kaj esperoj*, de la *memoro kaj antaŭvido*, kiu malfermas antaŭ la homo la tutan aron da novaj ĝuoj.

Plue, Epikuro ankaŭ penadis liberigi la homojn de la teruroj, kiujn ili ŝuldas al la kredo je dioj, posedantaj ĉiujn malbonajn kvalitojn, kaj same de la timo antaŭ teruraĵoj de postmorta vivo, kaj de la kredo je la influo de la «sorto», kiun subtenis eĉ la doktrino de Demokrito. Por liberigi la homojn de ĉi-timoj estis necese antaŭ ĉio liberigi ilin de la timo antaŭ la morto, aŭ pli ĝuste, antaŭ la postmorta vivo. Tiu timo estis en la antikvo tre forta, ĉar tiam oni imagis la postmortan vivon kiel dormon en subtera mallumo, dume ĉe la homo restis io simila al konscienco, kapabla lin turmenti [1]. Samtempe Epikuro batalis kontraŭ la pesimismo, kiun predikis *Hegeẓio* (parenca al la moderna pesimismo de Schopenhauer), t. e. kontraŭ la dezirindo de

[1] Promesante al la homoj ke la «elektitoj» el ili ne restos en la subtera mallumo, sed transiros en la luman ĉielregnon, la kristanismo — kiel rimarkigas Guyau — faris grandan renverson en la kapoj. Ĉiu povis esperi ke li estos «elektito».

l' morto kaŭze de superregantaj multegaj malbono kaj suferoj en la mondo.

Ĝenerale, la tuta instruo de Epikuro celis la intelekton kaj moralan liberigon de la homoj. Sed en ĝi estis unu tre grava manko: ĝi metis antaŭ si neniajn altajn moralajn taskojn, inter ili la sinoferon por la utilo de la socio. Epikuro eĉ ne antaŭvidis similan celon, kiel egalrajto por ĉiuj socianoj aŭ almenaŭ la neniigo de la sklavesto. Kuraĝo, p. e. estis por li ne serĉado de danĝeroj sed povoscio ilin eviti. Same en la amo: la saĝulo devas eviti pasian amon, ĉar ĝi havas nenion de la naturo nek de la racio: ĝi estas nur psikologia iluzio kaj prezentas specon de religia adorado, kiu ne devas ekzisti. Li estis kontraŭ la geedzeco, ĉar la geedzeco kaj poste la infanoj kaŭzas tro multe da klopodoj (tamen, li amis infanojn). Kontraŭe, la amikecon li taksis tre alte. En la amikeco la homo forgesas sian intereson: farante agrablaĵon al la amiko ni faras agrablon al ni mem. Epikuro estis konstante ĉirkaŭita de amikoj, kaj liaj disciploj per sia bona komuna vivo allogadis tiom da adeptoj, ke laŭ la diro de lia samtempulo *Diogeno el Laerto*, «tutaj urboj ne povus por ili sufiĉi». Pri la fideleco de epikuranoj en la amikeco iliaj samtempuloj ne povis trovi sufiĉe da laŭdoj.

En sia analizo de la epikuranaj doktrinoj Guyau indikis ankaŭ alian interesan trajton. Unuavide la amikeco kaj la sinofero por sia

amiko kontraŭdiras al la teorio de persona intereso, per kiu, laŭ la teorio de Epikuro, devas gvidi sin la racie-pensanta homo. Kaj por eviti tiun kontraŭdiron la adeptoj de Epikuro eksplikis* la amikecon kiel senvortan interkonsenton, fonditan sur la principo de la justo (t. e. de reciprokeco aŭ egalrajto). Kaj tia interkonsento estas subtenata de la kutimo. La unuaj interrilatoj okazas pro reciproka, persona plezuro; sed iom-post-iom tiaj interrilatoj transiĝas en la kutimon; ekĝermas la amo, kaj tiam ni amas niajn amikojn sen demandi, — kian personan utilon ili alportas al ni. Tiel pravigis la epikuranoj la amikecon, pruvante ke ĝi ne kontraŭdiras al ilia ĉef-principo — serĉado de persona feliĉo.

Sed aperis la demando: — « Kian, do, pozicion devas okupi la epikurano rilate al la tuta socio? ». Jam Platono, — diras Guyau, — eldiris la penson (en la dialogo « Gorgio »), ke la sola naturleĝo estas la rajto de fortulo. Post Platono la skeptikuloj kaj Demokrito neis la « naturan juston » kaj multaj pensuloj de tiu epoko konsentis, ke la reguloj de civila vivo estis establitaj per la forto kaj ke ili stabiliĝis pro la kutimo.

Epikuro, la unua, — kiel asertas Guyau, — eldiris la penson, kiun pli poste estis disvolvanta Hobbes kaj post li ankaŭ multaj aliuj, — ke la tiel nomata « natura rajto » estis nenialio, ol « reciproka kontrakto — ne kaŭzi unu al alio, nek suferi unu de aliu iun domaĝon ».

« La justo en si mem ne havas valoron: ĝi ekzistas nur en reciprokaj interkonsentoj kaj estas asertata ĉie, kie estas akceptata la reciproka devigo ne malutili al aliuj kaj ne suferi malutilon». «*Tiaj interkonsentoj estas enkondukataj de saĝuloj*», — diris Epikuro, — kaj ne por fari neniujn maljustaĵojn, sed por ne suferi ilin de aliuj». Nur sekve de la reciprokeco okazas tiel, ke defendante nin de aliuj ni samtempe defendas aliujn de ni. Sen tiaj interkonsentoj kaj leĝoj la socio estus neeble; la homoj manĝus unu aliun, — diris adepto de Epikuro, Metrodoro ([1]).

El la tuta doktrino de la epikuranoj sekvas do tia konkludo, ke la tiel nomataj devo kaj virto estas identaj kun ĉies persona utilo. La virto estas la plej sekura rimedo por atingi la feliĉon; kaj se la homo dubas, kiel konduti, li plej bone faras, se li sekvas la virton.

Sed en tiu-ĉi virto forestis eĉ la ĝermoj de la homa egalrajto. La sklavsistemo ne indignigis Epikuron. Li mem bone traktis siajn sklavojn, sed li ne rekonis iliajn rajtojn: evidente la penso pri la egalrajto de la homoj neniam venis en lian kapon. Kaj ankoraŭ multaj jarcentoj devis pasi antaŭ ol la pensuloj, kiuj studis la moralproblemon, decidis elmeti, kiel devizo de l' o morala — la egalrajton, egalecon por ĉiuj homestaĵoj.

Estas, tamen, notende por kompletigi la

([1]) Guyau, Libro III, Ĉap. II.

karakterizon de Epikura doktrino, ke unu el adeptoj de Epikuro, al kiu ni ŝuldas la plej kompletan ekspozon* de ties doktrino, t. e. la roma verkisto *Lukreco* (1-a jarcento antaŭ Kr.), en sia konata poemo « Pri la naturo de kozoj »* jam estis espriminta la ideon de progresiva disvolviĝo, t. e. de l' evolucio, sur kiu nun bazas la moderna filozofio. Li ankaŭ esprimis la natursciencan, materialisman komprenon pri la vivo de la naturo, kiel ĝin komprenas la moderna scienco. Ĝenerale, la koncepto de Epikuro pri la naturo kaj kosmo estis konstruita sen ia interveno de la kredo, samkiel lia etiko; dum la stoikuloj, kvankam ili estis panteistoj, ĉiam kredis pri konstanta interveno de la supernaturaj fortoj en nian tutan vivon. Kaj la adeptoj de Platono, precipe la filozofoj de Aleksandria skolo, kiuj kredis al mirakloj kaj magio, certe devis kapitulaci antaŭ la kristana kredo. Sole epikuranoj daŭris resti nekreduloj, kaj ilia doktrino konserviĝis tre longtempe, t. e. pli ol kvincent jarojn. Ĝis la mem estiĝo de la kristanismo ĝi estis la plej disvastigita doktrino en la antikva mondo kaj post tio ĝi restis populara ankoraŭ ĉirkaŭ kvarcent jarojn. Sed kiam en la 12-a jarcento kaj poste en la epoko de Renesanco komencis en Eŭropo raciismaj movadoj, ili komence apogis sin en Italio sur la doktrino de Epikuro (1).

(1) Guyau, samloke, Libro IV, Ĉap. I.

Fortan influon la doktrino de Epikuro havis sur la raciiston de la 17-a jarcento *Gassendi* (1592-1655) kaj ankaŭ sur lian disĉiplon *Hobbes* kaj eĉ sur *Locke*, kiuj antaŭpreparis la movadon de la enciklopediistoj kaj la modernan naturisman filozofion. Kaj same forta estis tiu influo sur la filozofion de la «neantoj», kiel *Larochefoucauld* kaj *Mandeville*, kaj en la 19-a jarcento *Stirner*, *Nietzsche* kaj iliaj imitantoj.

*La stoikuloj*. — Fine, la kvara skolo, kiu ankaŭ disvolviĝis en la antikva Grekio kaj poste en Romo, kaj kiu postlasis ĝis nun profundan signon en etika pensado, — estis la skolo de *stoikuloj*. Kiel ĝiaj fondintoj estas konsiderataj *Zenono* (340-265 ant. Kr.) kaj *Krizipo* (281-208 ant. Kr.). En la roma imperio la samajn doktrinojn disvolvis *Seneko* (54 ant. Kr. — 36 post Kr.) kaj precipe *Epikteto* (fino de la 1-a kaj komenco de la 2-a jarcento) kaj *Marko Aŭrelo* (121-180 post Kr.).

La stoikuloj metis al si kiel celo havigi al la homo la feliĉon, disvolvante en li la virton, kiu konsistas en vivo, agorda kun la naturo, kun samtempa disvolvo de la racio kaj ekkono de la universa vivo. Ili ne serĉis la originon de la moralaj konceptoj kaj aspiroj de la homo en iu supernatura forto, sed ili asertis, kontraŭe, ke la naturo mem enhavas en si la regulojn — kaj sekve ankaŭ la modelojn de l' o morala; — ti-kio estas ĉe la homoj

nomata moralleĝo rezultas el la mondleĝoj, regantaj la vivon de l' naturo, — tiel asertis ili. Iliaj rigardoj koincidis, sekve, kun ti-kiuj akiras ĉiam pli grandan apogon en la moderna etiko depost la tempo de *Bacon, Spinoza, Aŭgusto Comte* kaj *Darwin*. Oni devas nur rimarkigi, ke kiam la stoikuloj parolis pri la bazprincipoj de l' o morala kaj pri la vivo de l' Naturo ĝenerale, ili ankoraŭ ofte uzis la lingvon de metafizikuloj. Tiel ili instruis ke la Racio, aŭ la « Vorto » (greka Logos) penetras la tutan mondon kiel la Ĝenerala Monda Racio kaj ke tio, kion la homoj nomas morala leĝo, rezultas el la mondleĝoj, regantaj la vivon de l' Naturo [1]. La racio de la homo, — diris la stoikuloj, — kaj, sekve, ankaŭ niaj moralkonceptoj estas nenialio ol unu el manifestiĝoj de la naturfortoj. Tio, certe, ne malhelpis al ili kompreni ke la fizika kaj morala malbono en la naturo kaj en la homo estas la sama natura sekvo el la vivo de l' naturo, samkiel la bono. Ilia tuta doktrino celis, sekve, helpi al la homo disvolvi en si la bonon kaj batali kontraŭ la malbono kaj per tio akiri la plejeblan feliĉon.

La kontraŭuloj de l' stoikuloj indikis, ke per sia doktrino ili forviŝas la limojn inter bono

---

[1] Epikteto ne konsideris eĉ necesa studi la naturon por ekkoni la esencon de ĝiaj leĝoj. Nia animo, — diris li, — senpere ekkonas ilin, ĉar ĝi estas intime ligita kun Diajo.

kaj malbono. Kaj oni devas diri, ke la stoikuloj, kvankam en reala vivo la plimulto da ili ne intermiksis tiujn konceptojn, tamen ili ne indikis difinitan kriterion (t. e. mezurilon) por distingi inter la bono kaj malbono, kiel tion faris p. e. utilistoj en la 19-a jarcento, metante kiel celon de l' etiko la plejeblan feliĉon por la plejmulto da homoj (Bentham), aŭ ti-kiuj opiniis, ke la socia instinkto denature superregas la personecan (Bacon kaj Darwin), aŭ ti-kiuj enportadis en la etikon la koncepton pri la justo, t. e. egalrajto.

Ĝenerale, estis ĝuste rimarkigite ke la stoikuloj ne disvolvis siajn rezonadojn ĝis la efektiva konstruo de moralteorio sur natura bazo. Vere, kiam la stoikuloj asertis, ke la homo devas vivi konforme al la leĝoj de la naturo, kelkiuj el ili jam indikis ke la homo estas socia animalo kaj, tial, li devas submeti siajn impulsojn al la racio kaj al la celadoj de la tuto. Kaj Cicerono (106-43 j.) eĉ menciis la juston, kiel bazon de l' o morala. Nun vivante konforme al la universala racio la homo trovos saĝon, virton kaj feliĉon, — diris la stoikuloj, — kaj la naturo mem sugestas al ni sanajn moralinstinktojn. — « Sed... kiel malbone sciis la stoikuloj trovi l' on moralan en l'o natura kaj l'on naturan en l'o morala, » — juste rimarkigis Jodl en sia « Historio de Etiko ». Kaj sekve de tiu breĉo en ilia instruo, — cetere, neevitebla en tiu tempo, — kelkaj stoikuloj, kiel Epikteto, venis al kristana etiko, kiu re-

konis la neceson de la dieca revelo por ekkono de l' o morala; aliuj, kiel Cicerono, hezitis inter la natura kaj dieca originò de l' o morala; kaj Marko Aŭrelo, kiu verkis tiel belajn moralajn sentencojn, atingis (en la pledo por oficiale rekonitaj dioj) tion, ke li eĉ allasis kruelan persekutadon den' kristanoj. Lia stoikismo jam transformiĝis en religion kaj religian fanatismon.

Ĝenerale, en la doktrinoj de la stoikuloj estis multo nefindirita kaj eĉ kontraŭdira. Sed, malgraŭ tio, ili postlasis profundan signon en la filozofio de l' o morala. Kelkiuj el ili ĝisvenis al prediko de universala frateco; sed, samtempe, ili ne neis la individualismon, senpasiecon kaj rezignon de la mondo. *Seneko,* — la edukisto de Nerono (pli poste ekzekutita de sia lernanto) kunigis la stoikismon kun la metafiziko de Platono kaj ankaŭ miksis al ĝi la doktrinojn de Epikuro kaj pitagoranoj. Kaj Cicerono senpere inkliniĝis al religia kompreno de la moralo, vidante en ĝi esprimon de la leĝoj de la naturo kaj de diaĵo (1). Sed la ĉefpenso de stoikuloj estis: trovi bazprincipojn de la moralo en la *homa racio*. Ili konsideris la celadon al socia bono — denaska kvalito, kiu disvolviĝis en la homo laŭ mezuro de lia

(1) La naturista panteismo de la unuaj stoikuloj transformiĝis ĉe li en la naturistan teismon, — skribis Jodl. Al tiu modifiĝo de la stoikismo helpis ankaŭ Seneko (Historio de etiko, I, 27).

intelekta evoluo. Estas prudenta, — aldonis ili, — tiu konduto kiu estas konforma al la naturo de l'homo kaj de «ĉiuj kozoj*», t. e. al la naturo ĝenerale. La homo devas konstrui sian filozofion kaj sian moralon sur la konoj, sur la ekkono de si mem kaj de la tuta naturo. Vivi konform' al la naturo signifis, en la ekspozo* de Cicerono, antaŭ ĉio: ekkoni la naturon kaj disvolvi en si la sociemon, t. e. la kapablon deteni la impulsojn, kiuj kondukas al l'o maljusta, alivorte, disvolvadi en si la juston, kuraĝon kaj, ĝenerale, ĉiujn tiel nomatajn civitanajn virtojn. Estas, do, komprENEBLE kial Cicerono fariĝis komunamata verkisto depost la Renesanco kaj, pliposte ankaŭ ĉe la verkistoj de 17-a jarcento, kaj kial li faris tian influon sur Locke, Hobbes, Shaftesbury kaj sur la antaŭirantojn de la Granda Franca Revolucio — Montesquieu, Mably kaj Rousseau.

Do, Eucken tute pravas dirante, ke la ĉefpenso de la stoikismo, t. e. scienca bazado de la moralo kaj ĝia suprenigo ĝis plena alteco kaj sendependo, ĉio ligite kun la kompreno pri la mondo, kiel tutaĵo, — konserviĝis ĝis nun (1). Vivi en la mondo kaj senkonscie al ĝi obei estas malinde por la homo. Oni devas atingi la komprenon pri la universa vivo kaj kompreni ĝin kiel konstantan disvolviĝon

---

(1) Eucken, *Lebensanschauungen grosser Denker*, 7-a eld. 1907, pĝ. 90.

(evoluon) kaj vivi konforme al la leĝoj de tiu evoluo. Tiel komprenis la moralon la plej bonaj el la stoikuloj kaj per tia kompreno la stoikismo forte akcelis al disvolviĝo de la scienco pri la moralo.

Plie, la devizo de la stoikuloj estis: ne indiferente, sed aktive rilati al la socivivo kaj por tio eduki firmecon de la karaktero. Tiun ĉi penson Epikteto disvolvis kun granda forto. « Mi scias nenion, — skribis Paulsen en siaj « Principoj de Etiko », — kio kapablus fari pli profundan impreson ol tiuj lokoj ĉe Epikteto, kie li invitas liberiĝi de la influo de objektoj, kiuj estas ekster nia povo, kaj atinginte internan liberon, apogi sin nur sur si mem (ĉap. I, § 5).

En la vivo estas necesa rigorismo, — skribis la stoikuloj, t. e. severa rilato al siaj propraj malfortaĵoj. *La vivo estas batalo,* sed ne epikura ĝuado de ĉiaj ĝojoj. La plej granda malamiko de la homo estas la foresto de supera celo. Por feliĉa vivo estas bezona interna kuraĝo, sublimeco de la animo, heroeco. Kaj tiaj ideoj kondukis ilin al la penso pri la universala frateco, pri la « homaro », t. e. al la ideo, kiu ne jam aperis ĉe iliaj antaŭirintoj.

Sed apud tiaj belaj aspiroj en ĉiuj eminentaj stoikuloj ni vidas maldecidemon, duecon. En la administrado de la mondo ili vidis ne sole naturleĝojn, sed ankaŭ la volon de la Supera Racio; kaj tia rekono, neeviteble, paralizis sciencan naturesploradon. Ilia mond-

koncepto disduiĝis, kaj tiu dueco kondukis al cedoj, kontraŭdirantaj la bazprincipojn de ilia moralo, — al la paciĝo kun tio, kion ili neis en sia idealo. Ĝi venigis tian pensulon, kiel Marko Aŭrelo al kruela persekutado den* kristanoj. La celado agordigi la personan vivon kun la ĉirkaŭanta vivo reduktiĝis al mizeraj kompromisoj, al interpaciĝo kun la kruda, mizera realo. Kaj tial en la verkoj de stoikuloj estis jam aŭdataj la unuaj resonoj de malespero, — de pesimismo. Tamen, la influo de la stoikuloj estis tre forta. Ĝi preparis la mensojn por alpreno de kristanismo, kaj tiun influon ni sentas eĉ nun ĉe la raciistoj.

# ĈAPITRO SESA

## La kristanismo. — La mezepoko. — La renesanco

*La kristanismo. — La kaŭzo de origino kaj de sukcesoj de l' kristana doktrino. — La kristanismo kiel religio de malriĉularo. — Kristanismo kaj budhismo. — La ĉefa diferenco inter kristanismo kaj budhismo, unuflanke, kaj ĉiuj pli fruaj religioj, aliflanke. — La socia idealo de l' kristanismo. — Aliiĝo de l' prakristanismo. — Alianco inter eklezio kaj ŝtato. — La mezepoko. — Popolprotesto kontraŭ la jugo de la ŝtato kaj de la eklezio. Lukto de l' popolo kontraŭ la oficiala eklezio kaj la ŝtato en la mezepoko. — Liberaj urboj kaj religiaj movadoj (albigensoj, lollardoj, husanoj). — La reformacio. — La renesanco. — Kopernikus kaj Giordano Bruno. — Kepler kaj Galilei. — Francisko Bacon el Verulamo. — Moraldoktrino de Bacon. — Hugo Grotius. — Progreso de moraldoktrinoj en 16-a jarcento.*

Resumante la antaŭkristanan etikon en antikva Grekio, ni vidas, ke la grekaj pensuloj, malgraŭ la diferenco de iliaj eksplikoj* de la moralo, samopiniis pri unu punkto. Kiel fonto de l' moralimpulsoj en la homo ili konsideris liajn naturinklinojn kaj lian racion. Pri la vera esenco de tiuj inklinoj ili, tamen, ne havis

klaran opinion. Sed ili instruis, ke dank' al sia racio, la homo vivante en socio nature disvolvas kaj firmigas siajn moralinklinojn, kiuj servas por subteno de necesa por li sociesto. Tial ili ne serĉis helpon por la homo elekstere de l' supernaturaj fortoj.

Tia estis la esenco de la doktrinoj de Sokrato, Aristotelo, parte eĉ de Platono kaj de unuaj stoikuloj, kaj el ili Aristotelo jam provis konstrui la moralon sur la naturscienca bazo. Nur Platono enportis en la moralon duonreligian elementon. Sed, aliflanke, Epikuro — eble kontraŭpeze al Platono — elmetis novan principon: la racian aspiron de la homo al feliĉo, al plezuro, kaj li penadis prezenti la feliĉo-serĉadon kiel plej gravan fonton de l' o morala en la pensanta homo.

Asertante, ke la ĝuste komprenita aspirado de la homo al persona feliĉo, al pleneco de l' vivo — estas la morala instigilo, Epikuro estis certe prava: homo, kiu plene komprenis kiagrade la sociemo, la justo kaj bona egaleca traktado al la homoj kondukas al la feliĉa vivo, ĉu de la individuo, ĉu de la tuta socio, — tiu homo ne povas esti malmorala. Alivorte, la homo, kiu rekonas ĉies egalecon kaj venis per la vivsperto al identigo de siaj profitoj kun ĉies utilo, povas sendube trovi en tia koncepto pri la persona feliĉo apogon por sia moralo. Sed asertante, ke la racia serĉado de l' feliĉo per si mem kondukos la homon al la morala konduto kontraŭ aliuj, Epikuro,

senbezone malvastigis la efektivan bazon de l' moralo. Li forgesis, ke en la homo, kian ajn tributon li pagus al la egoismo, tamen, ankoraŭ ekzistas la kutimoj de l' sociemo ; en li ekzistas ankaŭ la justokoncepto, kiu kondukas al certagrada rekono de la homa egalrajto ; kaj, fine, ekzistas, eĉ ĉe la homoj, kiuj tre profunde dekadencis morale, ia malklara konscio pri idealo kaj pri la morala belo.

Do, Epikuro malgrandigis la signifon de l' sociaj instinktoj de la homo kaj helpis al li anstataŭigi per praktika rezonemo la justepensantan racion, sen kiu en la socio neniu progresanta evoluo povas okazi. Kaj, aliflanke, li preteratentis la influon de la medio kaj la klasdividon, kiu fariĝas malamika al la moralo, kiam la piramidforma strukturo de l' socio permesas al iuj ti-kion ĝi malpermesas al aliuj.

Efektive, en la manko de moralidealo, metanta la homan egalon kaj la juston, kiel celon de moralo, la adeptoj de Epikuro, sufiĉe multnombraj en la imperio de Aleksandro Macedona kaj poste ankaŭ en la Roma imperio, trovis la pravigon de sia indiferento rilate al la ulceroj de la sociordo ([1]).

---

([1]) M. Guyau en sia bonega studo pri la filozofio de Epikuro montris, ke dum pluraj jarcentoj ĝi unuigis multajn bonegajn homojn ; kaj tio estas tute ĝusta. En la homaro en ĉiu epoko ekzistas kerno da homoj, kiujn neniu ŝaĝumado, ĉu religia, ĉu plene negativa, faros pli bonaj, nek pli malbonaj en socia senco. Sed apud

La protesto kontraŭ la ulceroj de tiama socio kaj kontraŭ la dekadenco de l' socieco estis neevitebla. Kaj ĝi aperis, kiel ni vidis, komence en la doktrino de la stoikuloj kaj poste en la kristanismo.

Jam en la 5-a jarcento antaŭ nia ero* komenciĝis la militoj inter Grekio kaj Persio kaj tiuj militoj iom post iom kondukis al plena dekadenco de tiu sociordo en la liberaj urbrespublikoj de antikva Grekio, en kiu la sciencoj, arto kaj filozofio atingis altgradan disvolviĝon. Plue, en la 4-a jarcento formiĝis la macedona regno kaj komenciĝis la militiroj de Aleksandro la Granda internen de Azio. La florantaj, sendependaj demokratioj de Grekio transformiĝis tiam en regionojn, subigitajn al la nova konkirema imperio: kaj la konkirintoj, kiuj venigadis el la oriento sklavojn kaj rabitajn tie riĉaĵojn, samtempe enkondukis la alcentrigon kaj la neeviteblajn en ĉiu centralizo politikan despotismon kaj rabeman spiriton de l' profitamo. Plie, la riĉaĵoj, venigitaj en Grekion, logis tien el la okcidento rabistojn, kaj jam en la fino de la 3-a jarcento antaŭ nia ero* komenciĝis la konkiron den* Grekio de Romo.

---

ili ekzistas la amasoj da ĉiam hezitantaj homoj, mezkapablaj, kiuj aliĝas al la regantaj iliatempe doktrinoj. Por tiu volmalforta plimulto la filozofio de Epikuro estis pravigo de ilia socia indiferento, dum aliuj, serĉintaj idealon, sin turnis al la religio.

La antikva Grekio, tiu kulturejo de la scienco kaj de la arto, fariĝis nun provinco de la konkirema Roma imperio. La torĉo de la scienco, brulinta en Grekio, estingiĝis por multaj jarcentoj. Sed el Romo vastiĝis ĉiuflanken la rabema centralizita ŝtato, kie la lukso de la superaj klasoj bazis sur sklavlaboro de venkitaj popoloj kaj kie la malvirto de la superaj regantaj klasoj atingis siajn ekstremajn limojn.

Protesto en tiaj kondiĉoj estis neevitebla. Kaj ĝi aperis, — komence kiel resono de nova religio — budhismo, ekĝerminta en Hindio, kiu dekadencis simile al la Roma imperio, kaj post kvarcent jaroj — kiel kristanismo, en Judeo, de kie ĝi vastiĝis tra la grekaj kolonioj en Malgrandazio kaj poste ankaŭ tra Italio, — la centro de la roma potenco.

Estas facile kompreni — kian profundan impreson, precipe sur la malriĉajn klasojn, faris la apero de tiuj du doktrinoj, kiuj havas tiom da komuneco inter si. La informoj pri la nova religio, estiĝinta en Hindio, komencis penetri en Judeon kaj en Malgrandan Azion jam dum la lastaj du centjaroj antaŭ nia ero*.

Cirkulis famo, ke instigata de bezono pri nova kredo, la reĝa filo Gautama forlasis sian palacon kaj sian junan edzinon, forĵetis siajn reĝajn vestojn, rezignis de la riĉo kaj potenco kaj fariĝis servanto de sia popolo. Vivante per almozo, li instruis pri malestimo al riĉo kaj potenco, pri amo al ĉiuj homoj, — al amikoj

kaj al malamikoj, li instruis pri kompato al ĉiuj vivestaĵoj, predikis humilon kaj rekonis egalecon de ĉiuj statoj sociaj, inkludante* la plej malsuperajn.

Inter la popoloj, turmentegitaj de militoj kaj impostegoj, ofendataj en siaj plej bonaj sentoj de la potenculoj, la doktrino de Budho Gautama ([1]) rapide trovis multnombran adeptaron kaj iom post iom ĝi disvastiĝis el la norda Hindio suden kaj orienten tra la tuta Azio. Milionoj da homoj konvertiĝis al budhismo.

La samo okazis post kvarcent jaroj, kiam simila, sed ankoraŭ pli sublima* doktrino de la kristanismo komencis disvastiĝi el Judeo tra la grekaj kolonioj en Malgranda Azio, poste penetris Grekion kaj de tie en Sicilion kaj Italion.

La grundo por la nova religio de malriĉularo ribelinta kontraŭ la malvirto de la riĉularo — estis bone preparita. Kaj, plue, la sponta* transmigrado de tutaj popoloj el Azio en Eŭropon, kiu komenciĝis tiutempe kaj daŭris tutajn dekdu jarcentojn, tiel teruri gis la pensojn, ke bezono je nova kredo nur povis pli kreski ([2]).

---

([1]) La vorto Budho signifas «instruisto».

([2]) Kiam post la Glacia kaj ĝin sekvinta Laga epoko komenciĝis rapida sekiĝo de mezaziaj altebenajoj, kiuj prezentas nun senhomajn dezertojn, sed kun restaĵoj de iam multhomaj urboj, nun sablokovritaj, — tiu ĉi sek-

Meze de la teruroj, tiam travivataj, eĉ sobraj pensuloj perdis la kredon al plibona estonteco de la homaro; sed la amasoj ekvidis en tiuj invadoj la efikon de Malbona Forto. En la mensoj de la homoj sponte* ekestis la imago pri mondpereo, kaj la homoj des pli volonte serĉis savon en la religio.

La ĉefa diferenco inter la kristanismo kaj budhismo unuflanke kaj la plifruaj religioj estis en tio, ke anstataŭ la timo antaŭ la vengemaj dioj, al kies ordonoj devis subiĝi la homoj, — ĉi tiuj du religioj elmetis, kiel ekzemplo por la homoj (kaj ne kiel timigo), *idealan dihomon*. En kristanismo la amo de la dieca instruisto al la homoj, — al ĉiuj homoj sendiference al iliaj deveno kaj stato, sed precipe al la malsuperuloj, — leviĝis ĝis la plej

---

iĝo devigis la loĝantojn de la altebenaĵoj malsupreniri suden, en Hindion kaj norden — al la malaltaĵoj de Gungario kaj Siberio, de kie ili migradis okcidenten, al la fruktoriĉaj ebenaĵoj de Sudrusio kaj de okcidenta Eŭropo. Tutaj popoloj estis transmigrantaj tiamaniere, kaj estas facile imagi kiel terurigas tiuj migradoj la jam loksidajn popolojn sur la ebenaĵoj de Eŭropo. La novaj alvenintoj aŭ rabis la loksidulojn aŭ ekstermadis la loĝantaron de tutaj regionoj, kiuj kontraŭstaris ilin. Kion la rusa popolo suferis en 13-a jarcento dum la mongola invado, samtion Eŭropo travivis en la daŭro de la unuaj sep aŭ ok centjaroj de nia ero*, sekve de transmigradoj de la hordoj, kiuj moviĝis unu post la alia el Mezazio; dume Hispanio kaj Sudfrancio — sekve de la invado de araboj, moviĝintaj pro la samaj kaŭzoj de l' sekiĝado el Norda Afriko en Eŭropon.

sublima heroeco, ĝis la surkruca morto por savi la homaron el la regado de la Malbono.

Anstataŭ la timo antaŭ la venĝema Jehovo aŭ antaŭ la dioj simbolantaj la malbonajn naturfortojn, estis predikata la *amo al la viktimo de l' perforto* kaj instruisto de moralo en la kristanismo estis nek venĝema diaĵo, nek pastro, nek apartenanto al la klerika kasto kaj eĉ ne pensulo aŭ saĝulo, sed la viro el la popolo. Se la fondinto de la budhismo, Gautama, estis ankoraŭ reĝido, kiu memvole fariĝis almozulo, jam la fondinto de la kristanismo estis ĉarpentisto, forlasinta sian hejmon kaj familion kaj vivinta simile al «birdoj ĉielaj», en atendado de la proksima «Lasta Juĝo». La vivo de tiuj du majstroj pasadis ne en temploj aŭ akademioj, sed inter la malriĉularo. Kaj el la sama malriĉularo, sed ne el la templo-servistoj, devenis la apostoloj de Kristo. Kaj se poste, en la kristanismo, samkiel en la budhismo, estiĝis la «Eklezio», t. e. la registaro de «elektitoj» kun neeviteblaj malvirtoj de ĉiu registaro, — tio estis rekta flankeniĝo rilate al la volo de la ambaŭ religifondintoj — kiel ajn oni penadis poste pravigi ĉi-deflankiĝon per citaĵoj el la libroj, verkitaj multajn jarojn post la morto de la majstroj mem.

Alia ĉeftrajto de la kristanismo, kiu faris ĉefe ĝian potencon, estis tio, ke ĝi elmetis kiel gvidfadenon de l' homvivo ne la personan feliĉon, sed la *feliĉon komunan,* kaj, sekve,

la idealon, *idealon socian*, por kiu la homo kapablus fordoni sian vivon (vidu p. e. la dekan kaj la dektrian ĉapitron de la evangelio de Marko). La idealo de l' kristanismo estis: — ne trankvila vivo de greka saĝulo kaj ne la militaj aŭ civilaj agoj de la herooj de la antikva Grekio kaj Romo, sed la predikanto ekribelinta kontraŭ la misagoj de liatempa socio, kaj preta morti por la predikata kredo, konsistanta en justo al ĉiuj, rekono de egalrajto por ĉiuj, amplena rilato al ĉiuj — al proksimuloj, samkiel al fremduloj, kaj, fine, en la *pardonado de ofendoj* — kontraŭe al la ĝenerala tiama regulo pri la nepra venĝo por ofendoj.

Bedaŭrinde, ĝuste tiuj principoj de la kristanismo, precipe la egalrajto kaj la pardono de ofendoj — tre baldaŭ komencis moderiĝi en la predikoj de la nova kredo, kaj poste eĉ tute forgesiĝi. En la kristanismon, samkiel en ĉiujn aliajn moraldoktrinojn tre baldaŭ — jam en la apostolaj tempoj — enŝteliĝis la oportunismo, t. e. la instruo pri la «ora mezo». Kaj tio okazis des pli facile, ke en la kristanismo, kiel ankaŭ en aliaj religioj, ekestis kerno el homoj asertintaj, ke ili, kies devo estas la plenumado de la ritoj kaj de sakramentoj, konservas la doktrinon de Kristo en ĝia tuta puro kaj kondukas batalon kontraŭ la ĉiam aperantaj ĝiaj misinterpretoj.

Estas sendube, ke la cedemo de la apostoloj estas klarigebla ankaŭ certagrade per la

kruelaj persekutoj, de kiuj suferis la unuaj kristanoj en la Roma imperio ĝis kiam la kristanismo ekestis la ŝtatreligio kaj povas esti, ke la cedoj estis farataj nur por ŝajno, dum la interna kerno de la kristanaj komunumoj konservis la doktrinon en ĝia tuta puro. Efektive per longa vico de zorgaj esploroj nun estas konstatite, ke la kvar evangelioj, kiuj estis rekonitaj de la eklezio kiel la plej kredindaj priskriboj de la vivo kaj doktrino de Kristo, samkiel la «Agoj» kaj la «Epistolaro» de la apostoloj — en la konserviĝintaj ĝis nun tekstoj — estis verkitaj ne pli frue ol en la periodo inter 60 kaj 90 jaroj de nia ero*, aŭ eble eĉ pli malfrue — inter 90 kaj 120 jaroj. Sed ankaŭ tiam la evangelioj kaj epistolaro jam estis la kopioj de pli fruaj skribaĵoj, kiuj estis kompletigataj de la kopiistoj, ordinare per legendoj, al ili konataj (1). Sed ĝuste en tiuj ĉi jaroj okazadis la kruelegaj persekutoj de la Roma ŝtato kontraŭ la kristanoj. La ekzekutoj en Galileo komenciĝis jam post la ribelo de Judo Galileano kontraŭ la roma regado, en la 9-a jaro de nia ero*; kaj plue, ankoraŭ pli kruelaj persekutoj kontraŭ la judoj komenciĝis post la ribelo en Judeo, kiu daŭris de 66-a

(1) Pri la ekzisto de multaj tiaj skribaĵoj atestas jam la evangelisto Luko (ĉap. I, versoj 1-4), komence de sia priskribo, en kiu li kunigis kaj kompletigis la pli fruajn skribaĵojn.

ĝis 71-a jaro kaj kaŭzis centojn da ekzekutoj [1].

Sekve de tia persekutado, la kristanaj predikistoj, mem pretaj perei sur la kruco aŭ sur la brulŝtiparo, nature povis en siaj epistoloj al la kredantaro fari malgravajn cedojn, por ne persekutigi la ankoraŭ junajn kristanajn komunumojn. Tiel, p. e. la vortoj : « Donu do al Cezaro la propraĵon de Cezaro kaj al Dio — propraĵon de Dio », tiel ŝate citataj de la regantoj, povis trafi en la evangelion, kiel malsignifa cedo, ne rompanta la esencon de la doktrino, des pli, ke la kristanismo predikis rezignadon de ĉiuj teraj bonaĵoj. Samtempe, ekaperinte en oriento, la kristanismo subiĝis al la influo de ĝiaj kredoj en unu tre grava direkto. La religioj de Egipto, Persio kaj Hindio ne kontentiĝis per simpla homigado de la naturfortoj, kiel tion faris la greka kaj roma idolanismo. Ili vidis en la mondo interbatalon de du egalfortaj potencoj — de la Bono kaj Malbono, de la Lumo kontraŭ Mallumo, — kaj la saman batalon ili transportis en la homan koron. Kaj tiu ideo pri la du malamikaj fortoj, interbatalantaj pro superregado en la mondo, iom post iom penetris la kristanismon, kiel ĝia ĉefa principo. Kaj poste la

---

(1) La ribeloj en Judeo komenciĝis evidente jam dum la jaroj kiam predikis Kristo (vidu Luko, 13, I, kaj Marko, 15, 7).

kristana eklezio larĝe profitis dum pluraj jarcentoj la ideon pri la potenca diablo, ekposedanta la homan animon, por ekstermi kun nekredebla kruelo tiujn, kiuj arogis kritiki ĝiajn elmetitojn [pastrojn].

Tiamaniere, la eklezio senkaŝe malrekonis en la praktika vivo la bonecon kaj la ĉionpardonadon, kiujn predikis la fondinto de la kristanismo kaj kiuj prezentis ĝian distingon de ĉiuj ceteraj religioj, escepte la budhismon. Plie, en la persekutado de siaj kontraŭuloj ĝi ne konis limon de sia kruelo.

Pli poste la adeptoj de Kristo — eĉ la plej proksimaj — ekiris ankoraŭ pluen sur la vojo de cedoj. Ĉiam pli kaj pli deflankiĝante de la origina doktrino, ili venis al tio, ke la kristana eklezio faris plenan aliancon kun la reĝoj; ke la « princoj de la Eklezio » komencis konsideri la veran doktrinon de Kristo eĉ danĝera; ĝis tia grado, ke en la katolika eklezio estis permesate eldoni la evangelion nur en la tute nekomprenebla por la popolo latina lingvo, kaj en Rusio — en la malmulte komprenebla antikve-slava lingvo (1).

---

(1) En Rusio tiu malpermeso validis ĝis 1859 aŭ 1860 j. kaj mi bone memoras — kian impreson faris en Peterburgo la unua apero de l' evangelio en rusa lingvo kaj kiel ni ĉiuj rapidis aĉeti tiun neordinaran eldonaĵon en la sinoda presejo, kiu sola rajtis ĝin vendi.

Sed plej malbone estis, ke fariĝinte ŝtat-eklezio la oficiala kristanismo forgesis la fundamentan diferencon inter la kristanismo kaj ĉiuj pli fruaj religioj, escepte la budhismon. Ĝi forgesis la *pardonon de ofendoj* kaj venĝis ĉiun ofendon ne malpli kruele ol la orientaj despotoj.

Fine, la reprezentantoj de la eklezio baldaŭ ekestis samtiaj posedantoj de servutuloj, kiel la laika nobelaro, kaj iom post iom ili ekposedis la saman profitdonan juĝpovon, kiel la grafoj, dukoj kaj reĝoj, kaj, uzante tiun povon, la princoj de la eklezio estis same venĝemaj kaj avidaj kiel la laikaj potenculoj. Sed kiam en 15-a kaj 16-a jarcentoj komencis disvolviĝi la centralizita povo de reĝoj kaj princoj en la ŝtatoj, kiuj estis aperantaj tiam, la Eklezio, per sia influo kaj riĉaĵoj, ĉie helpis la kreon de ĉi-povo, kaj per sia kruco benis tiajn bestosimilajn potenculojn, kiel Ludoviko XI, Filipo II kaj Johano la Terura. Ĉiun kontraŭstaron al sia povo la Eklezio punis kun vere orienta kruelo — per torturado, kaj brulŝtiparo, kiucele la katolika eklezio kreis eĉ specialan instituaĵon — la «Sanktan» Inkvizicion.

La cedoj al la laika povo, kiuj estis farataj de la unuaj adeptoj de Kristo kondukis do la kristanismon malproksimen for de la doktrino de ĝia fondinto. La pardonado de personaj ofendoj estis forgesita, kiel nebezona balasto kaj tiamaniere estis malaceptita la ĉefa dife-

renco inter la kristanismo kaj ĉiuj plifruaj religioj, escepte la budhismo (1).

Efektive, se ni atente rigardas, sen antaŭjuĝo, ne nur la pli fruajn religiojn, sed eĉ la morojn kaj kutimojn de la plej primitiva triba vivarango, — tiam ni trovas, ke en ĉiuj primitivaj religioj kaj en la plej primitivaj socioj jam ekzistis la ankoraŭ nun valida regulo: « ne faru al la proksimulo, t. e. al via samtribano ti-kion vi ne deziras por vi mem». Laŭ ĉi-regulo jam dum multaj jarmiloj estis konstruataj ĉiuj homsocioj. Sekve, predikante la egalecan rilaton al la homoj de sia tribo, la kristanismo enportadis nenion novan (2).

Efektive, jam en tiom antikva monumento de la tribsocio, kia estas la Malnova Testamento, ni trovas la regulon : « Ne faru venĝon kaj ne havu koleron kontraŭ la filoj de via

---

(1) Pri la antaŭpreparo de la kristanismo flanke de la platona instruo, kaj precipe de lia doktrino pri la animo, samkiel de la doktrinoj de stoikuloj kaj pri certaj prunteprenoj de la kristanismo el plifruaj religioj, ekzistas riĉa literaturo, el kiu estas aparte menciinda la verko de Harnack : « *Die Mission und Ausbreitung des Christenthums in den ersten drei Jahrhunderten* », 1902.

(2) Vidu, ekz. la priskribon de la vivo de la aleutoj, kiuj tiam ankoraŭ daŭrigis prepari ŝtonajn tranĉilojn kaj sagojn (« Memornotoj pri Unalaŝka distrikto », Peterburgo 1840, de la misiisto, pliposta moskva mitropolito Venjaminov) kaj tute similajn priskribojn de la grenlandaj eskimoj, faritajn de la dana ekspedicio.

popolo. Amu vian proksimulon kiel vin mem ». Tiel estis dirite en la nomo de Dio en la tria libro de Moseo (Levidoj 19, 18). La sama regulo estas aplikata ankaŭ al fremdulo : — « Kiel indiĝeno elinter vi estu por vi la fremdulo, kiu eklоĝis ĉe vi, kaj amu lin kiel vin mem, ĉar vi estis ankaŭ fremduloj en la lando Egipta » (Levidoj 19, 34).

Kaj eĉ la aserto de la evangeliistoj, ke ne ekzistas pli supera merito ol sinofero por la samgentanoj, — tiel poezie esprimita en la evangelio de Marko (ĉap. 13), — eĉ tiu alvoko ne estas konsiderebla, kiel distinga trajto de la kristanismo, ĉar la sinofero pro siaj samtribanoj estis laŭdata de ĉiuj idolanoj, kaj la defendo de siaj proksimuloj riskante la propran vivon estis ordinara fenomeno, ne nur ĉe la plej sovaĝaj gentoj, sed ankaŭ ĉe la plimulto de la sociemaj animaloj.

La samo estas direnda pri la bonfarado, kiu ofte estas prezentata kiel distinga trajto de la kristanismo, kontraŭe al la antikva idolkulto. Cetere, jam en la tempo de triborganizo, ĉiam estis kaj ĝis nun restas konsiderata kiel krimo — rifuzi al samtribano, aŭ eĉ al fremdulo-migranto, rifuĝon, aŭ ne dividi kun li sian manĝon. Mi jam menciis en unu el la antaŭaj ĉapitro, ke hazarde malriĉiĝinta burjato rajte sin nutras ĉe ajna el siaj samgentanoj laŭ vico, ankaŭ ke la loĝantoj de la Fajrolando, la afrikaj hotentotoj kaj ĉiuj ceteraj « sovaĝuloj » dividas poegale inter si ĉiun donacitan

manĝopecon. Se do en la roma imperio, precipe en la urboj, ĉi-kutimoj de triborganizo efektive malaperis, pri tio oni kulpigu ne la idolanismon, sed la tutan politikan strukturon de la konkirema imperio. Mi tamen rimarkigu, ke en la idolana Italio, en la tempo de Numa Pompilius kaj ankaŭ multe pli poste, en la epoko de la imperio, estis forte disvolvitaj la kolegioj (collegia), t. e. metiistaj korporacioj, kiuj pli poste, en la Mezepoko, estis nomataj «gildoj». En tiuj kolegioj estis praktikata la sama deviga interhelpo kaj estis aranĝataj devigaj komunaj manĝoj dum certaj tagoj k. t. p., kiuj poste servis kiel distinga trajto de ĉiu gildo. Kaj tial aperas la demando: ĉu efektive al la roma antaŭkristana socio estis fremda la interhelpo, kiel asertas kelkaj verkistoj, indikantaj la foreston de *ŝtata* kaj *religia* bonfarado. Ĉu ne montriĝis rimarkebla la bezono pri tiu bonfaro pliposte, rezulte de malfortiĝo de korporacia organizo de la «kolegioj», samgrade, kiel progresis la fortiĝo de la ŝtata centralizo.

Ni devas, sekve, konfesi ke, predikante fratecon kaj interhelpon en sia popolo, la kristanismo ne enportis iun novan moralelementon. Sed la efektive nova elemento, kiun enportis la kristanismo kaj budhismo en la vivon de l' homaro, — estis la postulo al la homo pri *plena pardono de la malbono al li farita.* Ĝis tiam la tribmoralo de ĉiuj popoloj postulis venĝon — personan aŭ eĉ triban, — por ĉiu

malutilo : por murdo, kripligo, por vundo, por ofendo. La doktrino de Kristo en ĝia primitiva formo neis la venĝon kaj juĝan persekuton, postulante de la suferinto rezignon de ĉiu « rekompenco » kaj plenan « pardonon de ofendo » ; kaj ne unu- aŭ du-foje, sed ĉiam, ĉiukaze. En la vortoj : « Ne faru venĝon kontraŭ malamikoj » kuŝas la vera majesto de l' kristanismo ([1]).

Sed la ĉefa regulo de Kristo, ordonanta rifuzi de venĝo, estis tre baldaŭ malakceptita de la kristanoj. Jam la apostoloj rekonis ĝin nur en tre modera formo. « Ne repagu malbonon kontraŭ malbono, nek insulton kontraŭ insulto, sed benadu », — skribis apostolo Petro en sia unua epistolo (3, 9). Sed jam ĉe apostolo Paŭlo troviĝas nur malforta aludo pri la

---

([1]) En la leĝo Mosea, en la supre menciita loko el la libro « Levidoj » jam troviĝas la vortoj : — « Ne faru venĝon kaj ne portu koleron kontraŭ la filoj de via popolo ». Sed tiu ĉi ordono staras izole kaj en la plua historio de Izraelo ne estas rimarkebla ĝia postsigno. Sed en alia loko, nome en « Eliro », estis leĝigata la provizora sklaveco nur por aĉetita sklavo-hebreo (21, 22) ; estis permesate senpune bati sian sklavon aŭ servistinon, se nur ili ne mortu la saman aŭ sekvantan tagon post la batado ; kaj fine, kiel ĉe la popoloj vivantaj ĝis nun en tribsocio, se fariĝis interbatalo kaj « se rezultos malutilo, tiam fordonu animon por animo, okulon por okulo, denton por dento, manon por mano, piedon por piedo, brulvundon por brulvundo, vundon por vundo, kontuzon por kontuzo » (21, 20, 23-25).

pardono de ofendoj kaj eĉ tiu lasta havas egoistan formon; — « Sekve, vi estas nedefendebla, ho, ĉiu homo juĝanta, ĉar dum vi juĝas aliun, vi kondamnas vin mem » (Epistolo al la romanoj, 2, 1). Ĝenerale, anstataŭ la difinitaj instruoj de Kristo, kiuj neis la venĝon, la apostoloj donas timeman konsilon « prokrastigi la venĝon » kaj, ĝenerale, predikas pri amo. Tiamaniere, finfine la perjuĝa venĝo, eĉ en la plej kruelaj formoj, fariĝis necesa esenco de ti-kio estas nomata justo en la kristanaj ŝtatoj kaj en la kristana eklezio. Ne vane la pastro staras apud la ekzekutisto sur la eŝafodo.

La samo okazis al alia ĉefprincipo de la doktrino de Kristo. Lia instruo estis tiu de egalo. La sklavo kaj la libera roma civitano egale estis por ĝi fratoj, diaj filoj. « Kiu deziras esti unua inter vi, tiu estu sklavo de ĉiuj », — tiel instruis Kristo (Marko, 10, 44). Sed jam ĉe la apostoloj ni trovas alion. La sklavoj kaj regatoj egalas al siaj sinjoroj... « en Kristo ». Kaj en realo la obeo de regatoj al regantoj « kun timo kaj tremo », ĉar ili estas aŭtoritatoj nomitaj de Dio, kaj la obeo de sklavoj al siaj sinjoroj estas ekspozataj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo kiel fundamenta kristana virto; dume al la sklavposedantoj la samaj du apostoloj konsilas nur pli mildan konduton kontraŭ siaj servistoj, sed tute ne rezignon *de la sklavposedaj rajtoj*, eĉ se la sinjoroj de la sklavoj estos « fidelaj kaj

amataj », t. e. la konvertitoj al la kristanismo [1].

La kondutregulojn de la apostoloj oni certe povas klarigi per ilia deziro gardi siajn adeptojn kontraŭ la ekzekutoj de kruelaj romaj imperiestroj. Sed per sia prediko pri la obeo al la bestiĝintaj cezaroj *kiel al la diaj nomitoj*, t. e. rekono den* tiuj bestoj, kiel diaj metitoj, la kristanismo direktis kontraŭ sin mem frapon, de kiu ĝi ne povas refortiĝi ĝis

(1) « Submetu vin al ĉiu homa instituo pro la sinjoro; ĉu al la reĝo, la superreganto; ĉu al regantoj, kiel liaj senditoj por venĝo al malbonaguloj kaj por laŭdo al bonaguloj » — skribis apostolo Petro, kiam en Romo regis tiaj bestoj, kiel Kaligulo kaj Nerono (Unua epistolo, 2, 13-14). Kaj plue: « Servantoj, submetu vin al viaj sinjoroj en ĉia timo; ne sole al la bonaj kaj malseveraj, sed ankaŭ al la malbonhumoraj », k. t. p. (samloke, 18-25). Pri la konsiloj, kiujn ap. Paŭlo donis al sia herdo, estas eĉ malagrable paroli: ili estas senkaŝa neo de la krista doktrino. — « Ĉiu animo submetiĝu al la superaj aŭtoritatoj, ĉar aŭtoritato ne ekzistas escepte el Dio »: « ĉar li (t. e. la reganto) estas servanto de Dio », — skribis ap. Paŭlo al la romanoj (13, 1-5). Al la sklavoj li sakrilegie ordonas obei al siaj sinjoroj — « kiel al Kristo »; tiel estas skribite en lia epistolo al la efesanoj, kiun la kristanaj eklezioj rekonas kiel aŭtentan* epistolon de la apostolo. Sed al la estroj, kontraŭe, anstataŭ konsili rifuzon de la sklavlaboro, Paŭlo konsilas agi modere — « moderigante la severon » (Efesanoj 6, 9; Koloseanoj 3, 22; I Timoteo 6, 3) kaj Paŭlo precipe ordonis, ke obeu ĝuste tiuj sklavoj « kiuj havas kredantajn estrojn, ne malestimu ilin tial, ke ili estas fratoj, sed servu al ili tiom pli, ĉar ili estas fidelaj kaj amataj » (Timoteo, I, 6, 2; ankaŭ Tito 2, 9 kaj 3, 1).

nun. Ĝi ĉesis esti la religio de l' krucumita Kristo por fariĝi ŝtatreligio.

Rezulte la sklaveco kaj la sklavobeo al la povo, subtenataj de la eklezio konserviĝis dum dekunu jarcentoj — ĝis la unuaj urbaj kaj kamparanaj ribeloj en la 11-a kaj 12-a jarcentoj. *Johano la Orbuŝa* (*Krizostoma*), *Papo Gregoro,* kiun la eklezio nomis la *Granda,* kaj diversaj aliuj, kanonizitaj de la eklezio, aprobis la sklavecon, kaj la «Sankta» *Aŭgusteno* eĉ pravigis ĝin, asertante, ke sklaviĝis la pekuloj pro siaj pekoj. Eĉ la kompare liberala filozofo *Tomaso Akvinato* asertis, ke la sklaveco estas «dia leĝo». Nur kelkaj sklavposedantoj liberigis siajn sklavojn kaj kelkaj episkopoj kolektis monon por aĉetliberigi sklavojn. Kaj nur en la komenco de l' Krucmilitiroj liberiĝis tiuj sklavoj, kiuj kun kruco sur maniko iris al oriento por liberigi Jerusalemon.

La eklezion, ĉu malkaŝe, ĉu silente, postiris ankaŭ la plimulto de filozofoj. Nur en 18-a jarcento, antaŭtage de la franca revolucio laŭtiĝis la voĉoj de liberpensuloj kontraŭ la sklaveco. La revolucio, sed ne la eklezio, neniigis la sklavsistemon en la francaj kolonioj kaj la servuton en Francio mem. En daŭro de la tuta unua duono de l' 19-a jarcento la negocado per nigraj sklavoj floris en Eŭropo kaj en Ameriko, — kaj la eklezio silentis. Apenaŭ en 1861-a jaro la nuligo de la sklaveco, nomita en Rusio servuto, estis okazinta fakto, post kiam ĝi estis preparita de la komplotoj de

la decembristoj en 1825 j., de la Petraŝevski-rondetoj en 1848 j. kaj de kamparanaj ribeloj en la kvindekaj jaroj, kiuj kaŭzis inter la nobelaro timon antaŭ nova Pugaĉov-ribelo. En 1864 j. la nuligo de sklavsistemo okazis ankaŭ en la « profunde religiaj » Unuigitaj Ŝtatoj. Post sangverŝa milito kontraŭ la sklavposedantoj, la sklavoj estis deklaritaj liberaj. Sed oni donis al ili nek unu pecon de la tero, de ili kulturita, por plua subteno de la vivo.

En luktado kontraŭ avido de sklavposedantoj kaj de sklavnegocistoj, la kristanismo montriĝis senforta. La sklaveco plu daŭris ĝis kiam la plialtiĝinta produktivo de maŝinoj ebligis riĉiĝi per dunglaboro pli rapide, ol per laboro de sklavoj kaj servutuloj kaj ĝis kiam la sklavoj mem ekribelis.

Tiamaniere la du ĉefordonoj de la kristanismo — la egaleco kaj la pardono al ofendoj — estis malakceptitaj de ĝiaj adeptoj kaj instruistoj. Kaj pasis dekkvin jarcentoj antaŭ ol kelkaj verkistoj, forlasinte la religion, decidis rekoni unu el tiuj ordonoj — la egalrajton — kiel bazon de la civito.

Fine, necesas ankoraŭ rimarkigi, ke la kristanismo konfirmis la kredon al diablo kaj ĝia militistaro, kiel al potencaj kontraŭbatalantoj de la Bono. La kredo pri potenco de la Malbona Forto precipe firmiĝis dum la epoko de grandaj popolmigradoj. Kaj la eklezio poste vaste eluzis tiun kredon por ekstermi tiujn « servistojn de diablo », kiuj arogis kritiki

ĝiajn gvidantojn. Ankoraŭ pli ol tio: la roma eklezio rilatis eĉ al la kristana malpermeso venĝi, kiel al eraro de la tro milda Majstro kaj en la loko de la mizerikordo metis sian glavon kaj brulŝtiparojn por ekstermi ti-kiujn ĝi deklaris herezuloj [1].

---

[1] Eugène Suë en sia rimarkinda romano « *Les Mystères du Peuple, Histoire d'une famille de prolétaires à travers les âges* » (La misteroj de l'popolo. Historio de proleta familio tra la jarcentoj) donis emociigan scenon, en kiu la granda inkvizitoro riproĉas Kriston pri la eraro de li farita, kiam li rilatis tro kompate al la homo. Dostojevski, kiu tre ŝatis E. Suë, inkludis', kiel estas konate, similan scenon en sian romanon « Fratoj Karamazov ». Por kompreni kiagrade la eklezio malakcelis liberan evoluon de la etiko, samkiel de ĉiuj natursciencoj, sufiĉas rememori pri la potenco de l'inkvizicio ĝis la 19-a jarcento. En Hispanio ĝi estis likvidita nur en 1808 jaro de la franca armeo, post kiam al ĝia juĝo kaj preskaŭ ĉiam al ĝiaj torturoj jam estis submetitaj dum 320 jaroj pli ol 340.000 homoj, el kiuj 32.000 estis bruligitaj « proprapersone », 17.659 anstataŭite de pupoj kaj 291.450 submetiĝis al diversaj aliaj suferigaj punoj. En Francio la inkvizicio estis likvidita nur en 1772 j. kaj ĝia forto estis tiom granda, ke eĉ tiom moderan verkiston, kiel Buffon, ĝi devigis publike rifuzi de siaj geologiaj konsideroj pri l' antikveco de geologiaj tavoloj (vidu unuan volumon de lia rimarkinda priskribo de animaloj, loĝantaj sur la terglobo). En Italio, kvankam l'inkvizicio likvidiĝis kelkaloke en la fino de l' 18-a jarcento, ĝi baldaŭ reestabliĝis kaj ekzistis en Meza Italio ĝis la mezo de l' 19-a jarcento. Kaj en Romo, t. e. en la papa Romo ĝiaj restaĵoj ekzistas ĝis nun en la formo de l' sekreta juĝo; kaj parto da jezuitoj en Hispanio, Belgio kaj Germanio ĝis nun luktas por restarigo de la Inkvizicio.

II. *La mezepoko. — Renesanco.* — Kiom ajn estis persekutataj la kristanoj en Roma imperio, kiom ajn malmultaj estis la kristanaj komunumoj dum la unuaj jarcentoj, — tamen la kristanismo daŭrigis almiliti la mensojn, antaŭe en Malgranda Azio kaj poste en Grekio, en Sicilio, en Italio kaj, ĝenerale, en Okcidenta Eŭropo. De unu flanko ĝi prezentis proteston kontraŭ la tuta tiama vivo en la Roma imperio kaj kontraŭ la idealoj de tiu vivo, en kiu la komforto de l' regantaj klasoj estis bazata sur la terura mizero de la kamparanaro kaj de l' urba proletaro, dum la «kulturo» de bonhavaj homoj reduktiĝis nur al la disvolvo de la vivkomforto kaj al certa ekstera brilo apud la plena malŝato al superaj spiritaj bezonoj, kiel intelektaj, tiel moralaj (1). Sed jam tiam al multiuj tedis la subtilaj plezuroj en la superaj klasoj, kunigitaj kun ĝenerala krudeco de l' moroj kaj tial ne nur la malriĉularo al kiu la kristanismo promesis la emancipiĝon, sed ankaŭ kelkaj apartaj personoj el la liberaj kaj riĉaj klasoj, serĉis en la kristanismo la pli spiritan vivon.

---

(1) Lastatempe oni ofte miksas, precipe en Germanio kaj Rusio, la konceptojn « kulturo » kaj « civilizo », t. e. klerigo. Tamen, en la sesdekaj jaroj ili estis severe distingataj. Kulturo oni nomis tiam la disvolviĝon de la eksteraj vivkomfortaĵoj, de higieno, de komunikiloj, la eleganto de la loĝejo k. s. Dume civilizo, aŭ klerigado, signifis la evoluon de kono, de pensado, la kreivan agadon kaj la aspiradon al pli bona vivarangô.

Tamen, samtempe evoluis ankaŭ malfido al la homa naturo. Tiu malfido estis jam konturiĝanta en la grek-roma mondo de post la epoko de Platono kaj de liaj disĉiploj. Kaj nun, sub la influo de malserenaj vivkondiĉoj dum la granda transmigro de popoloj, de malvirtaĵoj de l' roma socio kaj ankaŭ sub orientaj influoj disvolviĝis la pesimismo: perdiĝis la kredo pri la atingeblo de pli bona futuro per la penado de la mem homo. Formiĝis la certeco pri triumfo de la malbona forto sur la tero, kaj la homoj volonte serĉis konsolon en la kredo pri la postmorta vivo, en kiu ne plu ekzistos la tera malbono, nek suferoj.

En tiaj kondiĉoj la kristanismo akiris ĉiam pli kaj pli grandan povon super la intelektoj. Sed estas rimarkinde, ke ĝi ne faris ian esencan ŝanĝon en la vivordo. Efektive, ĝi ne nur ne kreis novajn formojn de l' vivo pli-malpli larĝe disvastigitajn, sed ĝi paciĝis samkiel antaŭe tion faris la idolanismo kun la roma sklavordo, kun la normanda servuto kaj kun abomenaĵoj de l' roma aŭtokratio. La kristana klerikularo baldaŭ eĉ fariĝis la apogo de l' imperiestroj. La ekonomia malegalo kaj politika premo restis samkiaj antaŭe; kaj la nivelo de intelekta disvolviĝo de la socio grave malaltiĝis. Novajn sociformojn la kristanismo ne estigis. En esenco, atendante proksiman finon de la mondo, ĝi pri tio malmulte zorgis, kaj pasis pli ol mil jaroj antaŭ ol en Eŭropo, komence ĉe la bordoj de Mediteraneo kaj pli-

poste ankaŭ meze de la kontinento, ekaperis — el tute aliaj fontoj — nova sociordo en la urboj, proklamintaj sin sendependaj. En tiuj novaj centroj de libera vivo, similaj tiurilate al la liberaj urboj de l' antikva Grekio, komencîĝis ankaŭ la renaskiĝo de l' sciencoj, kiuj estis sufokitaj en Eŭropo de post la tempo de la Macedona kaj Roma imperio.

En la epoko de apostoloj la adeptoj de Kristo, kiuj vivis en atendo de la proksima dua alveno, zorgis ĉefe pri la disvastigo de la doktrino, kiu promesis al la homoj savon. Ili rapidis diskonigi la « ĝojan sciigon », kaj, se necese, ili pereadis martire. Sed jam en la 2-a jarcento de l' kristana ero* komencis formiĝi la kristana « eklezio ». Estas konate kiel facile en la oriento novaj religioj dividiĝas en multaj sektoj. Ĉiu laŭ sia maniero interpretas la aperantan doktrinon kaj pasie persistas en sia interpreto, kaj ankaŭ al la kristanismo minacis la sama dispartiĝo, des pli, ke en Malgranda Azio kaj en Egipto, kie ĝi precipe vastiĝis, al ĝi konstante almiksiĝis aliuj religiaj doktrinoj: budhismo kaj antikva idolanismo (1). Sekve

(1) Draper en sia « Historio de la konflikto inter scienco kaj religio » rimarkigis — kiom multe almiksiĝis al la kristanismo el idolanaj kultoj de l' Malgranda Azio, Egipto k. t. p. Sed li ne sufiĉe atentigis la ankoraŭ pli grandan influon de l' budhismo, ĝis nun ne jam sufiĉe esploritan.

de tio, jam de fruaj tempoj la instruistoj de l' kristanismo celis krei, laŭ la modelo de l' malnova testamento, la «eklezion», t. e. intime interligitan grupon de instruistoj, gardantaj la doktrinon en ĝia vera pureco, aŭ almenaŭ en ĝia unueca formo.

Sed se estis kreitaj eklezioj, kiel gardantoj de la doktrino kaj de ĝiaj ritoj, — kreiĝis, samkiel en la budhismo, unuflanke monakeco, t. e. izoliĝo de la parto de instruistoj for de la socio, kaj aliflanke formiĝis aparta potenca kasto — la pastraro, kiu ĉiam proksimiĝis kun la laika aŭtoritato. Defendante ti-kion ĝi konsideris pura kredo kaj persekutante ti-kion ĝi opiniis ties kripligo kaj krima herezo, la eklezio baldaŭ atingis en sia persekutado den* «apostatoj» ekstreman kruelon. Kaj por sukcesi en tiu lukto ĝi antaŭe serĉis kaj poste postulis la subtenon de laikaj aŭtoritatoj, kiuj siavice postulis de la eklezio favoran rilaton al si kaj subtenon de la religio por sia tiraneca povo super la popolo.

Tiamaniere estis forgesata la ĉefa ideo de l' kristana doktrino — ĝia modesto, ĝia spirito de «saĝa humilo». La movado, kiu komenciĝis kiel protesto kontraŭ maldecaĵoj de la aŭtoritatoj, fariĝis nun la armilo de tiu aŭtoritato; la beno de l' eklezio ne nur pardonis al la regantoj iliajn krimojn: ĝi ilin prezentis kiel plenumon de l' diaj ordonoj.

Samtempe la kristana eklezio uzis ĉiujn fortojn por malhelpi al la kristanoj studi la

«idolanan antikvon». La monumentoj kaj manuskriptoj de la antikva Grekio, — la solaj fontoj de l' scio en tiu tempo, — estis ekstermataj, ĉar la eklezio opiniis ilin nur «fieraĵo» kaj «nekredo», sugestataj de l' diablo. Kaj ĝiaj malpermesoj estis tiom severaj kaj tiom konformiĝis kun la ĝenerala spirito de l'kristana maltoleremo, ke kelkaj verkoj de grekaj pensuloj tute malaperis kaj ili atingis Okcidentan Eŭropon nur dank' al tio, ke ili konserviĝis ĉe la araboj, en arabaj tradukoj. Tiel zorge ekstermis la kristanoj la grekan saĝon [1].

Intertempe tamen la feŭda reĝimo kun ĝia servuta rajto, establiĝinta en Eŭropo post la disfalo de la Roma imperio, komencis malkomponiĝi, precipe depost la tempo de l'krucmilitiroj kaj post vico da gravaj ribeloj de la vilaĝanoj kaj urbanoj [2]. Dank' al la komunikiĝoj kun la Oriento kaj al la kresko de la surmara kaj enlanda komerco, metioj kaj artoj, disvolviĝis ankaŭ la spirito de la libero kaj komencante de la 10-a jarcento ĉi-urboj

---

(1) La verkoj de la granda fondinto de l' natursciencoj Aristotelo fariĝis unuafoje konataj en la mezepoka Eŭropo laŭ la latina traduko el araba lingvo.

(2) La krucmilitiroj sekvigis grandajn translokiĝojn de l' loĝantaro, kaj la sklavo-kamparano, kiu alkudris la krucsignon sur la maniko kaj aliĝis al la krucmilitantoj, — estis liberigata el la sklavesto.

komencis faligi la povon de siaj laikaj regantoj kaj de l' episkopoj. Tiaj ribeloj komencis rapide disvastiĝi. La loĝantoj de l' ribelintaj urboj mem ellaboradis la « ĉartojn », aŭ « aktojn » de siaj liberoj kaj devigis la sinjorojn rekoni kaj subskribi tiujn ĉartojn, aŭ ili simple forpeladis siajn sinjorojn kaj ĵuris inter si gardi kaj sekvi siajn novajn aktojn de l' liberoj. La urbanoj antaŭ ĉio rifuzis rekoni la princan, aŭ episkopan juĝon kaj mem elektadis siajn proprajn juĝistojn; ili kreadis sian propran urban milicon por defendi la urbon kaj nomis al ĝi estron kaj fine ili unuiĝis, federiĝis kun aliuj, egale liberaj urboj.

Multaj urboj liberigis ankaŭ la najbarajn vilaĝanojn el la servuta jugo de laikaj kaj klerikaj sinjoroj, sendante helpe al la vilaĝoj siajn urbajn milicojn. Tiel faris p.e. Genovo jam en la 10-a jarcento. Kaj iom post iom la liberiĝo de l' urboj kaj apero de liberaj komunumoj disvastiĝis tra la tuta Eŭropo: antaŭe en Italio kaj Hispanio, poste, en 12-a jarcento, en Francio, en Nederlando, en Anglio kaj fine tra la tuta meza Eŭropo, inklude* Bohemio, Polio kaj eĉ Nord-Okcidenta Rusio, kie Novgorod kaj Pskov kun iliaj kolonioj ĉe Vjatka, Vologda k. a. ekzistis, kiel liberaj respublikoj dum kelkaj jarcentoj. En la liberaj urboj renaskiĝis tiamaniere tiu libera politika ordo, dank' al kiu 1500 jarojn antaŭe lukse disfloris la klereco en l' antikva Grekio. Nun la samo

ripetiĝis en la liberaj urboj de l'Okcidenta kaj Meza Eŭropo [1].

Samtempe kun la renaskiĝo de la nova libera vivo komenciĝis la renaskiĝo de l'scio, arto, liberpenso, kiu ricevis en la historio la nomon de la « Renesanco » (Epoko de Renaskiĝo).

Tamen tie ĉi mi ne esploru detale la kaŭzojn, kiuj kondukis Eŭropon antaŭe al la « Renaskiĝo » (Renesanco), kaj poste, en 16-a kaj 17-a jarcentoj al la tiel nomata « Epoko de l'Klerigo », ne nur tial, ke pri ĉi-vekiĝo de l'homa menso el longa dormo ekzistas pluraj bonegaj verkoj kaj ilia eĉ mallonga revuo kondukus nin tre malproksimen for de nia senpera celo. Sed mi devus ekzameni, — multe pli detale, ol ĝi estis farata ĝis nun, — ne nur la influon sur la evoluo de l'sciencoj kaj de l'artoj, kiun havis la eltrovo de la restaĵoj de l'antikva-greka scienco, arto kaj filozofio, samkiel la influon de l'malproksimaj navigadoj kaj vojaĝoj, entreprenataj en tiuj jaroj de la negocado kun la oriento, la eltrovo de Ameriko, k. t. p., — sed ankaŭ la influon de l'*novaj formoj de l'socia vivo*, formiĝinta tiam en la liberaj urboj. Plue, estus

---

[1] Pri tiu-ĉi periodo ekzistas multaj bonegaj studoj, kiuj estas prisilentataj en niaj ŝtatlernejoj kaj universitatoj. Ilian liston la leganto trovos en mia libro « Interhelpo », kie estas donita ankaŭ mallonga skizo pri la vivo de l'liberaj mezepokaj urboj.

necesa ankaŭ montri, kiel tiuj novaj kondiĉoj de l' urba vivo kaj la vekiĝo de l'kampara loĝantaro kondukis al la nova kompreno pri la kristanismo kaj al la profundaj popolaj movadoj, en kiuj la protesto kontraŭ la povo de l'eklezio kunfluiĝis kun la celado al liberiĝo el la servuta jugo.

Tiaj ribeloj disfluegis per larĝa ondo tra tuta Eŭropo. Ili komenciĝis kun la movado de *albigensoj* (albigeois) en suda Francio, en la 11-a kaj 12-a jarcento. Poste, en la fino de de l'14-a jarcento, en Anglio okazis vilaĝanaj ribeloj de *John Boll, Wat Tyler,* kaj de *lollardoj,* direktitaj kontraŭ la lordoj kaj ŝtato kaj ligitaj kun la religia protestanta movado de *Wicleff.* En Bohemio disvolviĝis la doktrino de la granda reformanto kaj martiro *Johano Hus* (bruligita de la eklezio en 1415 j.), kies multnombraj adeptoj ekribelis, kiel kontraŭ la katolika eklezio, samkiel kontraŭ la jugo de la feŭdaj sinjoroj; poste komenciĝis komunistaj movadoj de la *Moravaj fratoj* en Moravio kaj de la *anabaptistoj* (rebaptanoj) en Holando, Okcidenta Germanio kaj Svisio, kaj ili ĉiuj celis ne nur purigi la kristanismon de la ŝaŭmaĵo, kiu kolektiĝis sur ĝi pro la laika povo de la pastraro, sed ankaŭ rekonstrui la tutan sociordon en la senco de l'egalo kaj komunismo. Fine, oni devus atenti ankaŭ la grandajn kamparanajn militojn en Germanio en la 16-a jarcento, kiuj komenciĝis interligite kun la protestantismo, samkiel la ribelojn

kontraŭ la papismo, bienuloj kaj reĝoj, ribeloj, kiuj larĝe vastiĝis en Anglio de la 1639-a ĝis la 1648 j., kaj finiĝis per la ekzekuto de la reĝo kaj neniigo de l' feŭda sistemo! Certe, neniu el tiuj movadoj atingis siajn politikajn, ekonomiajn kaj moralajn celojn, kiujn ili al si fiksis. Sed ĉiukaze, ili kreis en Eŭropo du relative liberajn kunfederaĵojn, — la svisan kaj la holandan, kaj tuj post tiam — du relative liberajn ŝtatojn — Anglion kaj Francion, kie la intelektoj estis jam tiom preparitaj, ke la doktrinoj de l' liberpensaj verkistoj trovadis multajn adeptojn kaj kie la pensuloj povis verki kaj eĉ iafoje presi siajn verkojn sen risko esti bruligitaj sur la ŝtiparo de la kristaneklezia princoj, aŭ esti enkarcerigitaj por la tuta vivdaŭro.

Por plene klarigi la ekfloron de l'filozofia penso, kiu distingis la 17-an jarcenton, estus do necese analizi la influon de la tiam eltrovitaj restaĵoj de l'antikva greka skribarto, pri kiuj oni tiel volonte parolas en la historio de la Renesanco, forgesante pri popolaj movadoj. Sed tia esploro en la domeno* de l' ĝenerala filozofio de l'historio, kondukas nin tro malproksimen de nia celo. Kaj tial mi limigos min per la indiko, ke ĉiuj ĉi kaŭzoj *kune* helpis krei novan, pli liberan vivaranĝon kaj donante novan direkton al la pensado, ili helpis estigi la novan *sciencon,* kiu iom post iom liberiĝis el sub la kuratoreco de la teologio, la novan filozofion, kiu celis ampleksi la vivon

de l' tuta naturo kaj ekspliki* ĝin per natura vojo kaj, fine, veki la kreivon de l' homa intelekto. Samtempe mi penos montri, kiel ĉiam pli hele kaj ageme komencis elpaŝi depost tiu tempo en la morala domeno* la *libera persono*, kiu proklamis sian sendependon de la eklezio, ŝtato kaj de la establiĝintaj tradicioj.

Dum la unuaj dek jarcentoj de nia ero* la kristana eklezio konsideris studon de l' naturo, kiel io nebezona kaj eĉ malutila, kondukanta al tromemfido, al fiereco; kaj la fiereco estis persekutata, kiel fonto de malkredo. La eklezio asertis, ke l' o morala en la homo havas sian devenon ne en lia naturo, kiu povas instigi nur al la malbono, sed eksklude* el la dia revelo. Ĉiu esploro de l' naturfontoj de l' o morala en la homo estis forigata kaj tial la greka scienco, kiu provis bazi la moralon sur la naturo, estis senkondiĉe malakceptata. Feliĉe, la sciencoj, ekflorintaj en Grekio, trovis rifuĝejon ĉe la araboj, kiuj tradukis el grekaj verkistoj en sian lingvon kaj kiuj mem pligrandigis niajn konojn, precipe pri la terglobo kaj pri la astroj kaj samtempe ĝenerale la matematan* konon kaj la medicinon; la ekkonon de l' o morala la araba scienco, samkiel la greka, konsideris nur kiel parton de la ekkono pri la naturo. Sed tian konon la kristana eklezio malakceptis, kiel herezan. Tiel daŭris pli ol mil jaroj, kaj nur en la dekunua jarcento, kiam en Eŭropo komenciĝis ribeloj

de urboj, ankaŭ estiĝis liberpensa (racionalista) movado. Oni komencis fervore elserĉi konserviĝintajn kelkloke restaĵojn de l'antikva greka scienco kaj filozofio; kaj per ili oni komencis studi geometrion, fizikon, astronomion kaj filozofion. Meze de profunda mallumo, kiu regis en Eŭropo dum tiom da jarcentoj, la eltrovo de iu manuskripto de Platono, aŭ de Aristotelo kaj ĝia traduko estis okazintaĵo de tutmonda signifo: — ili malfermis novan, nekonatan horizonton; ili vekis la mensojn, revivigis la senton de l'belo kaj ravo antaŭ la naturo kaj, samtempe, vekis la kredon pri la forto de l'homa intelekto, de kiu tiom zorge malkutimigis la homojn la kristana eklezio.

Depost tiu tempo komenciĝis la renaskiĝo — antaŭe en la sciencoj kaj poste ĝenerale, ankaŭ en la esploroj pri la esenco kaj fundamentoj de l'moralo. La suferulo *Abälard* (1079-1142) jam en la komenco de l'12-a jarcento kuraĝis aserti, samkiel la pensuloj de l'antikva Grekio, ke la homo portas en si mem la ĝermojn de l'moralaj konceptoj. Sed por tia herezo li ne trovis subtenon kaj nur en sekvinta jarcento, en Francio aperis la pensulo *Tomaso Akvinato* (1225-1278), kiu penis kunigi la doktrinon de l'kristana eklezio kun parto de la doktrino de Aristotelo; kaj en Anglio *Roger Bacon* (1214-1294), proksimume en la sama tempo provis fine forĵeti la supernaturajn fortojn el la eksplikado* pri

la naturo ĝenerale, samkiel pri la moralaj konceptoj de l' homo.

Tiu ĉi direkto estis tamen baldaŭ subpremita. Estis bezonataj la suprecititaj popolaj movadoj, kiuj vastiĝis tra Bohemio, Moravio, tra la landoj, nun apartenantaj al la Germana Imperio, tra Svisio, Francio (precipe suda), tra Nederlando kaj Anglio; estis bezonate, ke centmiloj da homoj pereu de fajro kaj glavo kaj iliaj gvidantoj suferu inferajn torturojn, — unuvorte estis bezonata la grandoza skuo, kiu iom post iom vastiĝis de l' 12-a ĝis 16-a jarcento tra la tuta Eŭropo, por ke la Eklezio kaj la gvidataj de ĝi laikaj registoj permesu al la pensuloj paroli kaj skribi pri la *socia instinkto de l' homo*, kiel pri fonto de l' moralaj konceptoj kaj pri la signifo de l' *homa intelekto* por formado de l' moralaj principoj. Sed ankaŭ tie-ĉi la pensado, liberiĝinta de la eklezia premego, preferis atribui al la saĝaj regantoj kaj leĝdonantoj tion, kio estis antaŭe atribuata al la dia revelo, — antaŭ ol la nova pensfluo kuraĝis konfesi, ke la formado de l' moralaj fundamentoj estis afero de komune-homa kreado.

En la mezo de 16-a jarcento, kelkatempe antaŭ la morto de *Kopernikus* (1473-1543), aperis lia libro pri la strukturo de nia planeda sistemo, kiu donis fortan puŝon al la natur-scienca pensado. En ĝi estis pruvata, ke la tero tute ne troviĝas en la centro de l' Universo, ne eĉ en la centro de nia planeda

sistemo, ke la suno kaj la steloj tute ne turniĝas ĉirkaŭ ĝi, kiel tio ŝajnas al ni; kaj ke ne nur nia tero, sed ankaŭ la suno, ĉirkaŭ kiu ĝi rondiras, estas simplaj sableroj inter la sennombraj mondoj. Ĉi-ideoj tre malsamis kompare al la doktrinoj de la eklezio, kiu asertis, ke la tero estas centro de l'universo kaj ke la homo estas objekto de specialaj zorgoj de la naturkreinto kaj kompreneble estas, ke la eklezio komencis kruele persekuti tiun-ĉi doktrinon kaj multaj homoj pereis, kiel viktimoj de tiu persekutado. Tiel italo *Giordano Bruno* (nask. 1548 j.) estis bruligita de la inkvizicio en Romo, en 1600 j. pro la verko « Spaccio della bestia trionfante » [1], kie li samopiniis kun la herezo de Kopernikus. Sed la nova direkto jam estis donita de la astronomoj kaj pligraviĝis ĝenerale la signifo de precizaj observoj kaj de ilia matematata* prilaboro, samkiel de la kono, bazita sur la eksperimento, kontraŭe al la deduktoj, bazitaj sur la metafiziko. En Firenzo eĉ formiĝis akademio del Cimento, t. e. de la eksperimento.

Baldaŭ poste, en 1609 kaj 1619 jaroj, la detalaj esploroj de *Kepler* (1571-1630) pri la leĝoj de l' planeda movado ĉirkaŭ la suno konfirmis la konkludojn de Kopernikus; kaj post dudek jaroj la itala scienculo *Galilei* (1564-1642) aperigis siajn ĉefajn verkojn, kiuj

[1] En rusa originalo erare presita « Saggio », anstataŭ « Spaccio ».

ne nur konfirmis la instruon de Kopernikus, sed ankoraŭ montris — kien kondukas la fiziko, bazita sur la eksperimento. Por la rekono de la instruo de Kopernikus la eklezio en 1633 j. torturis Galilei kaj pere de torturado igis lin rezigni de tia herezo. Sed la penso jam liberiĝadis el sub la jugo de l'kristanaj kaj antikve-hebreaj doktrinoj kaj en la angla pensulo kaj esploristo *Francisko Bacon* (Verulama) la naturscienco trovis ne nur la daŭriganton de la kuraĝaj esploroj de Kopernikus, Kepler kaj Galilei, sed ankaŭ la fondinton de l' nova metodo de scienca esploro — *indukta metodo*, bazita sur zorga studo de naturfaktoj kaj sur la akirataj konkludoj el tiuj ĉi faktoj, anstataŭ ekspliki' la naturon dedukte, t. e. sur la bazo de la antaŭe deduktitaj abstraktaj silogismoj. Plie, Bacon skizis la grundelementojn de l' nova scienco, bazita en ĉiuj siaj ĉefaj fakoj sur observado kaj eksperimento. En Anglio dum tiu epoko jam okazis grava fermentado de l' mensoj, kiu baldaŭ kondukis al la revolucio (1639-1648 jaroj) de vilaĝanoj kaj precipe de la meza stato en la urboj; tiu revolucio finiĝis kun la proklamo de la respubliko kaj kun la ekzekuto de la reĝo. Kaj apude kun la ekonomia kaj politika renverso, t. e. kun la neniigo de la feŭdestra povo kaj kun la pov-uzurpo de la urba meza stato estis okazanta emancipiĝo de l' mensoj el sub la eklezia jugo kaj formiĝo de l' nova filozofio — nova kompreno pri la naturo,

bazita ne sur la spekulado (pure-abstrakta rezonado), sed sur serioza studo pri la naturo kaj pri laŭgrada disvolviĝo de l' vivo, t. e. pri la evoluo, kiu prezentas la bazon de l' moderna scienco.

Bacon kaj Galilei estis la antaŭirantoj de tiu scienco, kiu en la dua parto de la 17-a jarcento ĉiam pli klare komencis ekkoni sian forton kaj neceson plene liberiĝi de la katolika, samkiel de la novaj protestantaj eklezioj. Por tiu celo la scienculoj komencis unuiĝi inter si kaj fondi sciencajn « Akademiojn », t. e. la societojn, kiuj laboris por la libera studo de de l' naturo. Kaj en tiuj akademioj estis rekonata, kiel ĉefa principo la *eksperimenta esploro,* anstataŭ la antaŭaj diskutadoj. Tian celon havis la akademioj, aperintaj antaŭe en Italio, poste la « Reĝa Societo », fondita en Anglio en la 17-a jarcento kaj fariĝinta depost tiu tempo la citadelo de la natur-scienca kono kaj la modelo por ĉiuj similaj societoj, fonditaj en Francio, Holando, Prusio, k. t. p.

Tia turno en la sciencoj nature efikis ankaŭ la sciencon pri la moralo. Francisko Bacon jam kelkajn jarojn antaŭ la angla revolucio faris provon, — cetere tre singardan, — liberigi la problemon pri la origino kaj esenco de l' moralaj konceptoj — de la religio. Li kuraĝis eldiri, ke al la foresto de religiaj konvinkoj oni ne devas atribui detruivan influon sur la moralon : ke eĉ ateisto povas esti honesta civitano, dum aliflanke, la superstiĉa reli-

gio, se ĝi entreprenas gvidadon de l'homa moralo, prezentas efektivan danĝeron. Bacon sin esprimis tre modere, — aliel en lia tempo oni ne povis sin esprimi. Sed la esenco de lia penso estis komprenebla, kaj detiam la sama penso komencis ĉiam pli laŭte kaj pli klare esprimiĝi en Anglio kaj Francio. Tiam oni rememoris pri la filozofio de Epikuro kaj de la stoikuloj kaj komenciĝis la evoluo de l'*racionalisma etiko*, t. e. de la etiko, science bazita per la verkoj de *Hobbes*, *Locke*, *Shaftesbury*, *Cudworth*, *Hutcheson*, *Hume*, *Ad. Smith*, k. a. en Anglio kaj Skotlando kaj de *Gassendi*, *Helvetius*, *Holbach*, k. m. a. en Francio (1).

Tamen estas rimarkinde, ke la ĉefa trajto de la ekspliko* pri la moralo, donita de Bacon (kiun mi indikis jam en la tria ĉapitro), nome tio, ke jam la *instinkto de la sociemo eĉ en la animaloj estas pli forta kaj pli konstanta, ol la instinkto de la memkonservo,* estis preterlasita senatente de liaj disĉiploj kaj

---

(1) La rimarkinda verko de Giordano Bruno *Saggio (Spaccio?) della bestia trionfante*, eldonita en 1584 j. pasis preskaŭ nerimarkite. Same la libro de Charron *Traité de la Sagesse*, eldon. 1601 j. (en la eldono 1604 j. estis forstrekita la kuraĝa loko pri religio), kie estis farita provo bazi la moralon sur la simpla komuna senco, ŝajne ne havis grandan disvastiĝon ekster Francio. *Essais* (Eksperimentoj) de Montaigne (1588), kiu pravigis la multaspektecon de religioj, havis tamen grandan sukceson.

eĉ de la kuraĝaj pledantoj por la laŭnatura ekspliko* de l' moralo (1).

Nur *Darwin*, en la fino de sia vivo, kuraĝis ripeti la penson de Bacon, bazante ĝin sur sia propra observo de la naturo kaj metis ĝin fundamente de kelkaj rimarkindaj paĝoj en « Origino de la homo » pri la deveno de moralaj sentoj (vidu supre la trian ĉapitron), sed ankoraŭ nun la etikistoj preteriras tiun penson, kiu devus esti bazo de la racia etiko, des pli ke, kvankam en malpli difinita formo, ĝi tamen rimarkebliĝis en ĉiuj doktrinoj, kiuj serĉis eksplikon* de la moralo en la naturo mem de la homo.

Post Bacon, elinter la filozofoj de la 17-a jarcento la samon perfekte komprenis kaj ankoraŭ pli klare esprimis *Hugo Grotius* en sia verko *De jure bellis* (Pri la juro de militoj), en 1625 j. Post kelkaj rimarkoj pri la kreinto kaj pri lia influo sur kreadon de moralaj konceptoj, ne senpere, sed per la « kvankam de li kreita, tamen neŝanĝebla

---

(1) Estas rimarkinde, ke ankaŭ Jodl, la historiisto de la etiko, — eksterordinare sentiva al ĉiuj novaj influoj en la etika filozofio, — same ne sufiĉe taksis la valoron de tiuj malmultaj vortoj, en kiuj Bacon esprimis sian penson. Li vidis en ili eĥon de l' greka filozofio, aŭ de la tiel nomata natura leĝo, *lex naturalis* (1573); dume Bacon devenigante la moralon el la sociemo, propra al la homo, samkiel al plimulto da animaloj, donis novan, natur-sciencan esplikon* por la fundamentoj de la moralo.

*racia naturo »*, — Grotius ne hezitis konfesi, ke la fonto de l'« juro » kaj de la moralaj konceptoj, intime ligitaj kun ĝi, estis : *la naturo kaj racio ĝin ekkonanta.*

La religian moralon kaj la regulojn de la ritoj li apartigis el la regiono de l'natura moralo kaj sin okupis sole per studado de la lasta. Kaj kiel naturon li konsideris la homan naturon kaj neis, ke ĝi ne povas distingi la pravecon de la malpraveco, ĉar en la homo kaj en la animaloj estas disvolvita la *sociemo,* kiu nepre kondukas la homon al kreado de trankvila kunvivo kun siaj similuloj.

« Apud tiu forta socia stimulo, — daŭrigis Grotius, — la homo dank'al la lingvo, kapablas dedukti ĝeneralajn regulojn por subteni la komunvivon kaj konduti konforme al ili ; kaj tiu-ĉi zorgo pri la komunvivo fariĝas fonto de la establiĝintaj kutimoj kaj de la tiel nomata *natura, aŭ tradicia rajto.* Al la formiĝo de tiuj establaĵoj akcelas ankaŭ la *koncepto pri komuna utilo* kaj la derivita koncepto pri *ti-kio estas rekonita kiel justa.* Sed estus tute erare aserti, diris li plue, ke la homojn devigis zorgi pri la rajto iu povo, staranta super ili, aŭ ke ili zorgis pri ĝi pro la sola utilo. Al tio logis la homon lia propra naturinklino.

« Ĉar, — skribis Grotius, — kelkaj animaloj moderigas kaj certagrade forgesas zorgi pri si mem pro siaj idoj, aŭ pro siaj similuloj. Tio okazas pro iu ekkona principo, kiu venas

elekstere kaj konsistigas la esencon de tiaj agoj, ĉar en aliaj malpli gravaj agoj, la sama instinkto ne estas rimarkebla (1).

La sama inklino fari bonon al aliuj estas rimarkebla certagrade ĉe infanoj. Samdirekte agas ankaŭ la sana juĝo (§ 9). « La natura rajto, — skribis Grotius plie, — estas la regulo de la racio, kaŭze de kiu ni juĝas pri la morala neceso, aŭ malneceso de iu konduto, laŭ ĝia konformo, aŭ malkonformo kun la racia naturo mem (Libro I, ĉap. I, § X, 1).

Plie, — daŭrigis Grotius, — la natura rajto estas tiom neŝanĝebla, ke Dio mem ne povas ĝin ŝanĝi. Ĉar kvankam la povo de Dio estas grandega, tamen oni povas diri, ke ekzistas certaj kazoj, sur kiujn ĝi ne etendiĝas. (Libro I, § X, 5).

Alivorte, el unuiĝo de la doktrinoj de Bacon kaj Grotius elklariĝas la origino de moralaj konceptoj, se estas rekonite, ke la ĉefa trajto de l'homo estas la *instinkto de l'sociemo*. (Kaŭze de tiu instinkto formiĝas la socia vivo kun certaj, neeviteblaj cedoj al la persona egoismo ; kaj ĝi akcelas, siavice, al formado de la konceptoj pri la *triba moralo,* la konceptoj, trovataj de ni en ĉiuj primitivaj sovaĝuloj). Plue, sur la bazo de l'vivo, kiu formiĝas sub la influo de la evidente forta sociema instinkto, konstante laboras la racio, kiu kondukas la homon al kreado de vivreguloj, ĉiam

---

(1) Hugo Grotius. *De jure bellis.* Enkonduko, § 7.

pli komplikaj kaj samtempe ĉiam plifortigantaj la stimulojn de l' socia instinkto kaj la kutimojn de ĝi influitajn. Tiel formiĝas naturmaniere ti-kio estas nomata juro.

Do, estas klare, ke la morala konstituo kaj la konceptoj de la homo tute ne bezonas supernaturan eksplikon* kaj efektive, en la dua parto de 17-a jarcento kaj en 18-a jarcento la plejmulto de la verkistoj, kiuj skribis pri la moralo, montris ĝian devenon el du fontoj : el la denaska sento, aŭ socia instinkto kaj el la racio, kiu fortikigas kaj disvolvas tion, kio estas al ĝi diktita de la hereda sento kaj de la instinkte-kreitaj kutimoj.

Kiu tamen nepre volis enkonduki en la etikon la supernaturan, diecan principon, tiu eksplikis* la instinkton kaj sociemajn kutimojn en la homo per dia sugesto, tute malatentante, ke la kutimoj kaj la instinkto de l' sociemo estas propraj al la plejmulto de la animaloj ; kaj nun, — ni aldonu, — ni ekscias, ke la kutimoj de la sociemo prezentas la plej fidindan armilon en la porekzista batalo kaj tial ili ĉiam pli kaj pli fortikiĝas en la sociemaj specoj.

La konceptado pri la moralo, akceptita de Bacon kaj Hugo Grotius neeviteble tamen elmetis la demandon : — Sur kio baziĝas la racio en formado de la moralkonceptoj ?

Pri tiu ĉi demando ekzistas aludoj jam en la antikva Grekio, kaj tiam ĝi estis respondata diversmaniere. Platono, precipe en la dua

periodo de sia vivo kaj liaj adeptoj, eksplikante* la moralkonceptojn de la homo per la « amo », sugestata al li de la supernaturaj fortoj, nature destinis al la racio tre modestan lokon. La homa racio servis nur kiel interpretanto por la « Racio de la Naturo », aŭ por sugestoj de la supernatura forto.

La skeptikaj skoloj de la sofistoj kaj pliposte Epikuro kaj lia skolo helpis al la pensuloj de la antikva Grekio liberiĝi de la religia etiko. Tamen tiuj du skoloj, kiuj simile al la cirenuloj kaj la adeptoj de Aristotelo neis la intervenon de supera volo, lasis al la racio, kvankam atribuante al ĝi grandan signifon, nur tre limigitan rolon, nome: nur taksi la valordiferencon inter diversaj kondutoj kaj vivmanieroj por fiksi — kiuj el ili pli certe kondukas la homon al feliĉo. Estas morala vivmaniero, — diris ili, — ti-kiu kondukas al la plej granda persona feliĉo kaj al la plej kontenta ĝenerala stato ne nur apartan individuon, sed samtempe la socian tutaĵon. La feliĉo estas libero de ĉiuj malbonoj; kaj dank'al nia racio ni povas, rifuzante de la momentaj plezuroj pro la estontaj pli daŭrefirmaj ĝojoj, elekti en nia vivo tion, kio nin pli sekure kondukas al la stato de egalpezo, de ĝenerala kontentiĝo, al harmonia vivo, en konsento kun ni mem, ankaŭ al malvolviĝo de nia personeco, konforme al ĝiaj individuaj proprecoj.

Do, en tiu ĉi etiko estas rezignata la sen-

intenca aspirado al la justo, aŭ t. n. virto. Malmulta atento estas ankaŭ turnata al la vivo, gvidata de la amidealo, kiun predikis Platono. Al *racio* estas atribuata grava signifo — precipe de Aristotelo. Tamen la funkciadon de la racio li vidas prefere en *praktika rezonemo kaj prudento*, ol en kuraĝa decido de libera penso. Lia idealo estis « regula » pensado, bridado de la agoj, kiujn la homo estas faronta sub forta impreso, kaj la volo, kiu ĉiam elektas « saĝan mezon », konforman al la naturo de ĉiu aparta homo.

Aristotelo forĵetadis la metafizikon kaj staris sur la praktika grundo, konsiderante, ke la elirpunkto de ĉiu agado estas la aspiro al feliĉo, la memamo (egoismo). La saman vidpunkton ankoraŭ pli defendis, kiel ni jam vidis, Epikuro, kaj post li, liaj adeptoj dum kvin aŭ preskaŭ ses jarcentoj. Kaj depost la Renesanco, t. e. depost 16-a jarcento, tiun vidpunkton dividis vico da pensuloj, inkludante* pliposte la enciklopedistojn de 18-a jarcento kaj la nunajn utilistojn (Bentham, Mill) kaj naturistojn (Darwin, Spencer).

Kvankam tiuj ĉi doktrinoj ĝuis grandan sukceson, precipe ti-kiam la homaro sentis la bezonon liberiĝi el sub la jugo de l' eklezio kaj penadis trovi novajn vojojn por la disvolvo de la sociformoj, — tamen ili ne solvis la problemon pri la origino de la moralaj konceptoj en la homo.

Diri, ke la homo ĉiam celas al la feliĉo

kaj al plejeble plena liberiĝo de la malbono, signifas esprimi jam delonge evidentan, sed ankoraŭ suprajan veron, entenatan eĉ en proverboj. Efektive, jam plurfoje estis rimarkite, ke ĉiu moralo jam delonge malaperus de la tero, se la morala vivo kondukus la homon al malfeliĉo. Sed tia ĝenerala rimarko ne sufiĉas. Neniu dubo ekzistas, ke la deziro de la plej granda feliĉo ĉiam estas propra al ĉiu vivulo: en sia lasta analizo la homo ĉiam estas gvidata ĝuste de tiu deziro. Sed la demando, kiu nin interesas, konsistas ĝuste en tio: — « Kial, kaŭze de tiu intelekta aŭ senta procedo la homo tiom ofte pro iuj konsideroj, nomataj de ni « moralaj », rifuzas de tio, kio sendube devus havigi al li plezuron? Kial li ofte toleras diversajn mankojn, sole por ne perfidi la formiĝintan en li moralan idealon? ». Kaj la respondo, donita de la ĵus cititaj pensuloj-utilistoj, ne kontentigas nian intelekton: ni sentas, ke tie ĉi ne temas sole pri prudenta pesado de plezuroj kaj ne pri persona rezigno for de etaj ĝojoj pro aliuj, pli fortaj kaj pli daŭraj. Ni konscias, ke ni havas tie ĉi ion pli komplikan kaj samtempe multe pli ĝeneralan.

Aristotelo parte tion komprenis, kiam li skribis, ke la homo, kiu devas elekti inter du eblaj solvoj, agas racie, se li alprenas la decidon, kiu *ne enportas malagordon en lian internan « mion » kaj donas al li pli grandan kontentiĝon pri si mem*. Ĝojon, honoron, estimon, k. t. p., — skribis li, — ni

celas ne nur pro ili mem, sed ĉefe — *pro la de ili alportata sento de la kontentiĝo de nia racio*. La samon en ankoraŭ pli bona formo ripetis, kiel ni vidis, Epikuro. Sed se la rolo de l' racio estas rekonita en tia formo, tiam aperas la demando: — « *Kio nome estas kontentigata tiaokaze en nia racio?* » Kaj kiam la demando estos metita en tia formo, la respondo, kiel ni vidos plue, nepre estos tiela: — « La bezono pri la justo », t. e. pri la egalrajto; dume Aristotelo kaj Epikuro, se eĉ ili metis antaŭ si tiun demandon, tamen similan respondon ne donis: la tuta strukturo de tiama socio, en kies grundo kuŝis la sklaveco por la plejmulto da homoj, tuta spirito de la socio estis tiom malproksimaj de la justo kaj de la neevitebla ĝia konkludo — egalrajto, — ke similan demandon Aristotelo kaj Epikuro eble eĉ ne metis antaŭ si.

Tamen, nun, kiam la malnova mondrigardo forvivis sian tempon, ni jam ne povas kontentiĝi pri la solvo de la du menciitaj pensuloj kaj ni demandas: « *Kial la pli disvolvita intelekto trovas la plej grandan kontentiĝon ĝuste en tiaj solvoj, kiuj estas plej bonaj en ĉies interesoj?* Ĉu ne ekzistas tie ĉi iu profunda fiziologia kaŭzo?

La respondon de Bacon kaj post li ankaŭ de Darwin al tiu ĉi demando ni jam vidis (vidu ĉap. III). — « En la homo, — diris ili, — samkiel en ĉiuj herde vivantaj animaloj, la sociema instinkto estas tiom evoluinta, ke ĝi

estas *pli konstanta kaj pli forta,* ol la instinktoj, ampleksеblaj sub la komuna nomo de la sinkonserva instinkto. Krome, en la homo, kiel en estaĵo racia, socivivanta jam dum dekoj da jarmiloj, — la racio helpis al la disvolvo kaj konservo de tiaj moroj, kutimoj kaj reguloj de la vivo, kiuj akcelis pli plenan disvolviĝon de la socia vivo kaj, samtempe, la disvolviĝon de ĉiu aparta persono.

Sed ankaŭ tiu ĉi respondo nin ne povas plene kontentigi. El nia vivsperto ni scias, kiel ofte en la batalo inter diversaj stimuloj la pure egoistaj sentoj superas la sociemajn sentojn. Ni tion vidas kiel en apartaj homoj, tiel en tutaj socioj. Kaj tial ni venas al la konvinko, ke se en la homa racio ne ekzistus la propra al ĝi trajto enporti en siajn rezonojn la korekton de socia karaktero, tiam la pure-egoistaj decidoj konstante venkus la tendencojn sociajn. Kaj tia korekto, kiel ni vidos en la sekvantaj ĉapitroj, estas efektive enportata — unuflanka de la profunde radikiĝinta en ni socieme instinkto kaj de la disvolviĝanta dum socia vivo kun-sento el tiuj, kun kiuj ni vivas, kaj aliflanke, — plej multe, — de la propra al nia racio *ideo pri la justo.*

Tiu ĉi konkludo estos konfirmata de la plua historio de la moraldoktrinoj.

# KLARIGOJ

pri kelkaj vortoj, uzitaj en tiu-ĉi libro kaj eble ne tuj komprenataj de la leganto.

---

ABNORMA, eksternorma, anomalia.

AMORALA, senmorala, fremda al moralo.

ANIMALIO, regno de animaloj, faŭnaro, animalmondo.

ANIMALO, organizita estaĵo; vivulo kun vivenergio, sentivo kaj libervole sinmovanta. Ampleksas: birdojn, fiŝojn, insektojn, reptilojn, bestojn. *Ĉiuj bestoj estas animaloj; sed ankaŭ fiŝoj kaj birdoj estas animaloj.*

-ATR- *(sufikso)*, simila. *Simiatra = simio-simila.*

AŬTENTA, anstataŭ *aŭtentika.*

AVANTAĜO, pluso, supero, profitaĵo, utilaĵo. *La avantaĝo de la labora klaso estas ĝia solidareco.*

BESTO, kvarpieda animalo, difere de fiŝoj, insektoj, birdoj. *Bovo, ĉevalo, porko estas bestoj.*

CIRENULOJ, filozofia skolo, fondita de Aristipo en Cireno; ĝi konsideris la ĝuon esti la celo de l' vivo.

ĈARTO, historia akto, aŭ dokumento pri emancipo. *Ĉarto de Libero.*

DEN (de-n), akuzativa formo de genitivo por montri la direkton de la ago, kiam estas uzataj du genitivoj sinsekve. *Eksplutado den laboristoj de la ŝtato kaj kapitalismo.*

DIFERI, anstataŭ *diferenci.*

DOMENO *(nova signifo)*, spirita kampo, agadsfero, agadbranĉo.

DOMINI, superregi, sinjori.

EKSKLUDE, anstataŭ *ekskluzive*. Escepte, malkrom.

EKSPLIKI, komprenigi, interpreti, kialigi, disvolvi la sencon de io, klarigi la kaŭzon kaj ĝian ligon kun sekvoj. Diferencas de *klarigi* = igi klara, malkaŝi. *Li longe eksplikis al mi la teorion de la ŝtato, sed neniel sukcesis al mi klarigi ĝian bezonon por la laboristaro.*

EKSPOZI, elmeti, esprimi la esencon; ankaŭ elmeti publike por observi. *La Marxa teorio en la ekspozo de Kautski.*

ERO, anstataŭ *erao*. Tempokalkulo, tempokomputo.

ESTABLI, starigi, institui, enkonduki leĝe, aŭ per uzado. *Establi firmon, bankon, moron, instituaĵon, kontrolon super produktado.*

FUTURO, estonta tempo.

ĜERBOSO, speco de mordetulo, saltmuso, termuso, terleporo.

HERDO, organizita grupo, aro da bestoj: bestkolektivo. Ekz.: *ĉevalherdo, bovinherdo, ŝafherdo.*

INKLUDE, anstataŭ *inkluzive*. Entene, enhave, malescepte.

INSTITUO, anstataŭ *institucio*.

INTERHELPO. Rilate tiun vorton ni trovis interesan noton en la rememoroj pri Kropotkin de unu el liaj proksimaj amikoj (Vidu artikolon de Atabekjan en *Poĉin* [Iniciato] N-o 3, Febr. 1922). Kropotkin en siaj verkoj ne observis severan limon inter la konceptoj « interhelpo » kaj « sociemo ». Ofte li uzas tiujn du konceptojn kiel sinonimaj, dum la plejparto da observoj menciitaj de Kropotkin indikas ĝuste la fenomenojn de « sociemo » kaj ne de « reciproka helpo » en rekta senco de la vorto. La helpo farata en animalaj kaj homaj socioj ne ĉiam havas la karakteron de reciprokeco.

Kropotkin mem konfesis en unu konverso tiutema, ke la vorto « reciproka » (uzata en rusa kaj aliaj lingvoj) ne tute ĝuste transdonas la penson. En la franca eldono li uzis la vorton « entr'aide » (laŭlitere « inter-helpo »), kvankam tia esprimo en franca

lingvo ne estas uzata. Li longe hezitis antaŭ ol uzi ĝin. Tiam Elisée Reclus sin turnis al la franca akademiano Michel Bréal kaj petis lian opinion. Tiu respondis, ke li trovis nur unufoje ĉe La Fontaine la verbon « s'entr'aider », sed ke li konsideras plene allasebla la vorton « entr'aide » kaj salutas tiun novaĵon. Post tio Kropotkin definitive decidis uzi tiun vorton.

Samtempe Kropotkin rimarkigis, ke precipe krude sonas la germana traduko de « interhelpo » : « Gegenseitige Hilfe » (laŭlitere « kontraŭflanka helpo »).

Do, ni povas konkludi, ke la esperanta vorto « interhelpo » estas la plej ĝusta traduko de la respektiva rusa esprimo kaj de la aŭtor-penso.

-IV- *(sufikso)*, difere de *-ebl-* montras aktivan kapablon, povon, econ; kiu povas... kiu kapablas... *Sentiva* : kiu kapablas senti. *Eksplodiva, instruiva, kreiva*, k. t. p.

KOZO, objekto en filozofia kaj abstrakta senco.

L'O, la o, la aĵo aŭ eco; ti-kio estas. La plej abstrakta ĝeneraligo.

MATEMATA, anstataŭ *matematika*.

MELO (lat. *meles*), foshundo.

MENSO, spirita kapablo de homo. Kontr. al materio.

MILICO, anstataŭ *milicio*, analoge al *polico*.

MIS- *(prefikso)*, erare, malĝuste. *Miskompreni, misgvidantoj*.

MURDI, perforte mortigi.

-OZ- *(sufikso)*, provizita de, plena de, riĉa kun. *Poroza, grandoza, ŝtonoza, sabloza*.

REDEMTI, anstataŭ *redempti*. Elaĉeti pekulon, savi per ofero. *Redemti sian pekon. Kristo-Redemtanto*.

RETRO- *(prefikso)* montras movon inversdirektan, returnan. *Retropoŝte, retrosendi*. Difere de *re-*, kiu signifas nur ripeton.

REVELO, anstataŭ *revelacio*. Senpera malkaŝo flanke de Dio.

ROMANTA, anstataŭ *romantika.*

SEKURA, sendanĝera, garantiita kontraŭ danĝero, certigita. *Libero de personeco neniam estas sekura en la ŝtato. Moderna aviado fariĝas ĉiam pli sekura.*

SELEKTO *(biol.),* naturelekto de plej vivkapabla.

SITUO, anstataŭ *situacio.*

SKOLASTA, anstataŭ *skolastika.*

SORIKO *(sorex vulgaris),* mambesto insektomanĝa.

SPONTA, anstataŭ *spontanea* kaj *spontana.* Memdevena, elmema, propramova.

STABILA, daŭra, firma, ne faliva.

STATO *(nova signifo),* parto, divido de la socio en antaŭkapitalista, feŭda epoko; socikasto. *Dum la Granda Franca Revolucio elpaŝis la « tria », aŭ « meza » stato, kontraŭ la du unuaj : « nobela stato » kaj « pastra stato ».*

STILZBIRDOJ, longekruraj marĉbirdoj.

SUBLIMA, altega spirite, morale; alteca.

TRIBO, familiaro, primitiva gentoformo.

VARO, komercaĵo, ĉiu objekto de l'aĉeto kaj vendo sur la merkato. *Specifa trajto de kapitalista sociordo estas, ke ĉiuj laborproduktoj fariĝas varoj.*

*La Tradukintoj.*

# TABELO DE ENHAVO

Paĝoj

ANTAŬPAROLO DE PROF. N. KABANOV . . . . . . . 9

ĈAPITRO I. **La moderna bezono konstrui fundamenton de la moralo.** — La sukcesoj de la scienco kaj filozofio dum la lasta jarcento. — La progreso de l' moderna tekniko. — Kreeblo de l' etiko, bazanta sur la naturscienco j. — Modernaj moralteorioj. — La ĉefa manko de modernaj etiksistemoj. — La teorio de porekzista batalo ; ĝia malĝusta interpretado. — Interhelpo en la naturo. — La naturo ne estas amorala. — L' unuaj instruoj pri moralo estas akirataj de la homo el observo de la naturo. . 11

ĈAPITRO II. **Aperetantaj elementoj de nova etiko.** — Kio baras la progreson de la moralo. — Disvolviĝo de l' sociema instinkto. — Inspiriva forto de evolua etiko. — Ideoj kaj moralkonceptoj. — Devosento. — Du specoj de moralaj agoj. — Signifo de memagivo. — Bezono pri individua kreado. — *Interhelpo, Justo, Moralo,* kiel ĉefprincipoj de la scienca etiko. . . . . . 39

ĈAPITRO III. **Morala principo en la naturo.** — La teorio de Darwin pri la origino de morala sento ĉe la homo. — Ĝermoj de moralaj sentoj ĉe l' animaloj. — Origino de la devosento ĉe la homo. — Interhelpo, kiel ĝermofonto de l' etikaj

Paĝoj

sentoj ĉe la homo. — Sociemo en la animalio. — Interrilatoj de sovaĝuloj kun animaloj. — Estiĝo de la koncepto pri justo ĉe primitivaj gentoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 59

ĈAPITRO IV. **Moralaj konceptoj ĉe primitivaj popoloj.** Evoluo de l' socia instinkto ĉe sovaĝuloj. — Dueca karaktero de moralaj postuloj ĉe sovaĝaj popoloj : Kelkiuj el ili estas *devigaj,* dume la plenumado de aliuj estas nur *dezirata.* Metodoj de sociefiko kontraŭ aparta homo inter sovaĝuloj en okazo de malobeo al devigaj postuloj. — Establiĝo de kutimoj kaj moroj (mœurs) utilaj al la socio. — Triborganizo kaj tribjusto. Divido de l' socio je klasoj kaj statoj kaj tendencoj de apartaj grupoj al la povo kaj sinjorado super aliuj. — Evoluo de primitivaj moralkonceptoj. — Neceso de la studo pri tiu evoluo kaj difino de la bazoprincipoj de la etiko . . . 105

ĈAPITRO V. **Evoluo de moraldoktrinoj. — L'antikva Grekio.** — Moralaj ideoj de antikvaj grekoj. — La moraldoktrino de la sofistoj. — Sokrato. — Platono. — Aristotelo. — Epikuro. — Stoikuloj. 137

ĈAPITRO VI. **Kristanismo. — Mezepoko. — Renesanco.** — Kristanismo. — Kaŭzoj de origino kaj de sukceso de la kristana doktrino. — Kristanismo, kiel religio de malriĉularo. — Kristanismo kaj budhismo. — La ĉefa difero inter kristanismo kaj budhismo unuflanke kaj ĉiuj plifruaj religioj aliflanke. — Socia idealo de kristanismo. — Aliiĝo de l' prakristanismo. — Alianco de eklezio kaj ŝtato. — Mezepoko. — Popola protesto kontraŭ la jugo de l' ŝtato kaj de la eklezio. — Batalo de l' popolo kon-

Paĝoj

traŭ oficiala eklezio kaj ŝtato en la mezepoko. — Liberaj urboj kaj religiaj movadoj (albigensoj, lollardoj, husanoj). — Reformacio. — — Renesanco. — Koperniko kaj Giordano Bruno. — Kepler kaj Galilei. — Francisko Bacon el Verulamo. — Moraldoktrino de Bacon. — Hugo Grotius. — Progreso de moraldoktrinoj en 16-a jarcento. . . . . . . . . . . 181

KLARIGOJ DE NOVAJ VORTOJ . . . . . . . . . . . . 229

---

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

# KIO ESTAS S. A. T.?

## (Sennacieca Asocio Tutmonda)

**S. A. T.** estas organizaĵo celanta *utiligi Esperanton por la servo de la proletaro tutmonda.*

**S. A. T.** celas emancipi la manlaboristojn je la gviduzurpemo de la poliglotaj intelektuloj, kiuj *fakte* estas la solaj perantaj agentoj inter la diverslandaj proletoj.

**S. A. T.** *ne estas politika, sed proletara kulturorganizaĵo,* klopodanta eduki kaj klerigi siajn membrojn en *sennacieca* spirito.

**S. A. T.** devigas siajn membrojn laŭstatute ne nur servi al la internacia laborista movado, sed ankaŭ doni helpon kaj konsilon al ĉiu membro, en internaciaj rilatoj.

## Por plenumi tiujn taskojn S.A.T. eldonas:

1) **Sennaciulo,** semajna gazeto, 8-10 p., formato 23×31 cm.
Postulu provekzempleron!
Redaktejo: 14, av. de Corbéra, *Paris XII* (Francio).
Administrejo: Colmstrasse 1, *Leipzig O-27* (Germanio).

2) **Sennacieca Revuo,** monata revuo scienc-literatur-pedagogia, 20 paĝoj, formato 14×22 cm.
Postulu provekzempleron!
Redaktejo: 1-a Tverskaja-Jamskaja 35 kv. 5, *Moskvo I* (U. S. S. R.)
Administrejo: Colmstrasse 1, *Leipzig O-27* (Germanio).

3) **Jarlibron,** kiu entenas la adreson de ĉiuj membroj de SAT, oficialajn kaj praktikajn informojn, statuton kaj enciklopedian parton.

4) **Bibliotekon,** el valoraj verkoj (vidi liston sur apuda paĝo.)

---

### Por pluaj informoj sin turni:

al Asocia sidejo: S. A. T., 23, rue Boyer, *Paris-XX* (Francio).

al Administrejo: S. A. T., Colmstrasse 1-III, *Leipzig O-27* (Germanio).

# Libroj eldonitaj de SAT

Se vi deziras perfektiĝi en la scio de Esperanto,
☆ legu la librojn eldonitajn de SAT! ☆

| | Prezo en g.mk. |
|---|---|
| **Ni legu!** Brunulo. (Internacia legolibro) (3-a eldono) 112 p. 12×17 | 1, » |
| **Nur volu!** Izgur. 16 p. 14×21 (2-a eldono) | 0,35 |
| **Faŭsto,** Goethe. 156 p. 11×17 | 1,20 |
| **Eklumo en Abismo,** Barbusse. (broŝ.) 96 p. 11×17 | 0,80 |
| — — — (bind.) — — | 1,50 |
| **La Komunista Manifesto** (2-a eldono), 48 p. 11×16 | 0,60 |
| **Dokumentoj de Komunismo,** 132 p. 11×17 | 1, » |
| **A B C de Sennaciismo,** V. Elsudo. 60 p. 11×18 | 0,50 |
| **For la Neŭtralismon!** (2-a eldono) 24 p. 11×18 | 0,25 |
| **El la Mondbildo de l' Nova Fiziko,** 52 p. 11×17 | 0,60 |
| **Malgranda Terbiblio** (Prolet. Atlaso), Szerėni | 1,80 |
| **Proletaria Kantaro** (74 kantoj kun muziknotoj), 180 p. 11×17 | 3, » |
| **Petro** (kursa lernolibro laŭ parola metodo), 64 p. 12×17 | 0,70 |
| **La Kemio de l' Universo,** Fersman, 80 p. 11×14 | 0,60 |
| **Kontraŭ Dio!** (ateista krestomatio), 28 p. 14×22 | 0,40 |
| **La Morto de Blanjo,** Jean Tousseul, 72 p. 11×14 | 0,60 |
| **Tri Verkoj de Tolstoj,** 78 p. 12×19 | 0,80 |
| **Ruĝo kaj Blanko** (orig. verk. de L. Ivn), 68 p. 11×14 | 0,60 |
| **Sekspsikologio** (orig. verk. de S. Ziegler), 56 p. 11×14 | 0,60 |
| **Orienta Blovo** | 0,40 |
| **En la Katenoj de l' Maljusteco** | 0,60 |
| **Etiko,** P. Kropotkin | 2, » |
| **Karl Marx. Lia Vivo kaj lia Verko** (en presado) | 0,60 |
| **Je la Nomo de l' Vivo** (originalo de Izgur) | baldaŭ aperos |
| **Ŝtato kaj Revolucio** (Lenin) | — — |
| **Petro** (en « brajla », por blinduloj) | — — |

**Poŝtkarto** (kun SAT propaganda teksto), 100 ekz. **1** g. mk.— 25 ekz. **0,30** g. mk. + 10 % por afranko.

**Poŝtkarto ilustrita** por SAT propagando, baldaŭ aperos.

## SAT-insigno

| | | |
|---|---|---|
| Diametro 18 mm (pinglo, broĉo, butono) | **0,80** | mk. g. |
| — 12 mm (nur pinglo) | **0,60** | — |
| — 12 mm sen surskribo (pinglo) | **0,60** | — |

La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj.

**Aĉeteblaj ĉe Administracio de SAT**

**Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O 27**

Poŝtĉek-Konto 6835

Centra Presejo Esperantista
(V. Polgar)
33, rue Lacépède, Paris-5e

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
1354 I

Biblioteka Uniwersytecka KUL
1001147354